


The Australian Esperantist

Numero 253

JANUARO-FEBRUARO 1989

Registered by Australia Post

Publication no. WBG 2488



Saluto de la prezidanto...p.3

De la redaktoro...p.4

Provu vian vortoscion...p.6

Recenzo: Esperanto (de David Richardson)...p.9

Lingva angulo...p.12

Recenzo: Aŭstralia Antologio...p.13

Recenzo: Suplemento al P.I.V....p.17

Ekskurso en Britio...p.21

Odlo Bokserp...p.23

English Supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Baker's Hill WA 6562.

Prezidanto: S-ro Trevor Steele, 7 O'Callaghan St, Holland Park QLD 4121.

Vicprezidantoj: S-ino Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: S-ro Roy Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: S-ro Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: S-ro Owen Loncragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-servo: S-ro T. Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Membreco: \$25, por individuo, klubo, aŭ federacio; \$5 por aldona familiano ĉe la sama adreso; \$15 (minimуме) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi kotizojn al la kasisto.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adreslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdatoj por alsendo de presotaĵoj: la 15a de marto, majo, julio, septembro, novembro).

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST, "ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu al ni tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin!

SALUTO DE LA PREZIDANTO

Dum la septembra AEA-kongreso okazis pluraj ŝanĝoj en la estaro de nia Asocio. Owen Loneragan el Perto restas la kasisto, sed la nova sekretario estas Roy Ross (Brisbano). La du vicprezidantoj estas Vera Payne (Perto) kaj Kep Enderby (Sidnejo), kaj mi transprenis la prezidadon.

Mia unua tasko estas danki mian antaŭulon, Ralph Harry. Pro sia eminenteco en la diplomatia mondo Ralph havis kaj havas pli valorajn kontaktojn ol iu ajn alia movadano. Sed ĉefe imponas liaj sindediĉo, energio kaj organizkapablo, kaj nelaste lia malavara financa subteno al Esperanto. Esti la posteulo de Ralph estos tre malfacila tasko.

Male al la sperto de niaj samideanoj en la giganta Cinio, ni aŭstralianoj ankoraŭ ne povas kalkuli je oficiala apogo por la internacia lingvo. Ankoraŭ ni devos plugi la propran sulkon, daŭrigi ĉefe sur la nivelo de lokaj grupoj, varbi inter niaj konatoj, uzi laŭeble la ekzistantajn komunikilojn. Du aliajn aferojn ni ne subtaksu: Ni plibonigu nian lingvoscion kaj plue kultivu la amikecon, kiu estas tradicie unu el la allogoj de nia movado.

Samideane vin salutas
Trevor Steele

* * *

Mi preparas manuskripton de esperantlingva traduko de la fama greka filozofia verko CIVITANISMO de Platono. Eble vi konas la verkon per la klasika titolo "La Respubliko". La kompleta reviziita manuskripto estos preta ĉirkaŭ la mezo de ĉi tiu jaro. Se iu persono dezirus disponigi al mi helpon por publikigo de la libro mi estus tre danka. La traduko estas rekte el la greka originalo, kaj la esperanta manuskripto estas kontrolita de Trevor Steele.

Donald Broadribb

46 Great Eastern Highway, Baker's Hill WA 6562

DE LA REDAKTORO

Kiel ĉiu leganto jam divenis, THE AUSTRALIAN ESPERANTIST havas novan redaktoron, novan presmetodon kaj novan enhavon. Sed antaŭ ol diskuti la venontecon de la revuo, mi devas esprimi dankon al Herbert Koppel pro lia longedaŭra kaj eksperta redaktado. Nur persono kiu redaktis revuon povas kompreni kiom da laboro kaj ŝvitado ĉiu numero necesigas. Do nome de ĉiuj legantoj, mi deklaras nian komunan, elkoran dankon, Herbert. Cetere, Herbert estis preskaŭ la unua persono, certe la unua esperantisto, kiun mi renkontis, kiam mi venis al Aŭstralio el Usono en 1962. Li kaj Fay bonkore bonvenigis min kaj mian edzinon, kaj sen ilia helpo ni plene perdiĝintus.

Kompreneble kun nova redaktoro venas multaj ŝanĝoj. La plej okulfrapa estas la perkomputila kompostado. Sed ankaŭ la enhavo ricevas novan karakteron. En la brisbana kongreso estis proponite ke The Australian Esperantist aperu nur en Esperanto, sed ne vinktitita en la kajeron ĉiufoje estos anglalingva suplemento kiun neanglemuloj povos elŝuti se ili deziros, kaj al kiu niaj amikoj kiuj ne kapablas legi Esperanton povos sin turni. Tiu suplemento havos artikolojn speciale interesajn por la personoj kiuj ne legas Esperanton, kaj estos regula rubriko "Window On the World" en kiu aperos informoj pri la plej novaj eventoj en la esperantista mondo laŭ raportoj en la esperantista gazetaro.

Pro pluraj petoj, en ĉiu numero de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST aperos nova serio "Provu vian vortoscion", Tiu serio celas helpi kreskigi la esperantan vortoscion de la legantoj. Sekve, ĉiufoje mi inkludos "facilajn" vortojn por la studentoj de Esperanto, "kaprompajn" vortojn por la ekspertoj, kaj utilajn vortojn ne ofte renkontatajn, por ĉiu interesato. Ankaŭ aliajn lingvajn kaj literaturajn rubrikojn vi trovos por distri kaj eduki vian esperantistan cerbon.

Do jen la unua kajero por 1989 - ĝuu la legadon!

VIA KOTIZO

Nia asocio staras en krizo.

La nombro de niaj membroj ĉiujare malkreskas.

La nombro de niaj membroj forgesintaj pagi sian kotizon ĉiujare kreskas.

Unu persono leganta ĉi tiun gazeton forgesis pagi sian kotizon kaj por 1987 kaj 1988.

Pli ol tridek personoj legantaj ĉi tiun gazeton forgesis pagi sian kotizon por 1988.

Kiom da legantoj de ĉi tiu gazeto jam pagis sian kotizon por 1989?

Oni konjektas ke estas eble 600 esperantistoj en Aŭstralio. El ili apenaŭ 200 estas membroj de AEA. Malpli ol 200 efektive pagis sian kotizon.

Oni kalkulis ke se la statistiko ne radikale ŝanĝiĝos, en la jaro 2000 ekzistos eĉ ne unu membro en AEA.

Ĉu nia multkultura Aŭstralio tute perdos Esperanton?

Kiom da esperantistoj vi konas kiuj aĝas malpli ol 35 jarojn?

Kial necesas inkludi anglalingvajn paĝojn en The Australian Esperantist? Kiom da membroj de AEA do vere kapablas legi Esperanton?

Via adreslipe sur la lasta paĝo de ĉi tiu numero indikas la lastan monaton por kiu vi pagis vian kotizon.

La marta numero estos sendita nur al personoj kies adres-slipe diros DEC1989.

Bonvolu atenti.

PROVU VIAN VORTOSCION

1. ĉu **jonio*** estas
 - (a) speco de fiŝo
 - (b) profeto en la Biblio
 - (c) ŝtona sekssimbolo

2. ĉu "**po**" estas ĝuste uzita en:
 - (a) li veturas cent kilometrojn po horo
 - (b) li veturas po cent kilometrojn hore
 - (c) li veturas po cent kilometroj hore

3. ĉu ĝusta estas
 - (a) ŝi nomis ŝin sia filino
 - (b) ŝi nomis ŝin ŝian filinon
 - (c) ŝi nomiĝis sia filino

4. ĉu **hejti** estas
 - (a) kariba insulo
 - (b) varmigi
 - (c) rapide kuri

5. ĉu **linko** estas
 - (a) besto
 - (b) metala ero kiu kunligas ĉenon
 - (c) poezia vorto signifanta "maldekstra mano"

6. ĉu **pudingo** estas
 - (a) neologismo signifanta "seksmodesteco"
 - (b) speco de angla kuko
 - (c) afrika birdo

7. ĉu **pufo** estas
 - (a) speco de sidilo
 - (b) besto simila al rano
 - (c) aerbloveto

8. ĉu **gruo** estas
 - (a) speco de truo
 - (b) birdo
 - (c) mallongigo de kangaruo

9. ĉu **garaĝo** estas
 (a) aútejo
 (b) maljuneco
 (c) defia mieno
10. ĉu **reliefo** estas
 (a) trankviliĝo post ŝoko
 (b) rapida forkuro
 (c) speco de skulptaĵo
11. ĉu **bovlo** estas
 (a) speco de fungo
 (b) malforta vento
 (c) larĝa taso (el la angla vorto "bowl")
12. ĉu **koturno** estas
 (a) birdo
 (b) fiŝo
 (c) kotizpago
13. ĉu **halo** estas
 (a) publika ĉambrego
 (b) salutvorto kiam oni telefonas
 (c) luma cirklo ĉirkaŭ astro
14. ĉu **kavalerio** estas
 (a) sistemo trakti kambiojn
 (b) ĉevalaro
 (c) armeestro
15. ĉu **ĝermo** estas
 (a) bakterio
 (b) tre juna planto
 (c) dorso de kamelo

Respondoj sur paĝo 20.

*neoficiala vorto
 Vortoj kaj difinoj laŭ P.I.V.
 Kompilita de Donald Broadribb

TRIBUTO AL HERBERT KOPPEL

Nia Asocio esprimas elkoran dankon al Herbert Koppel, kiu dum multaj jaroj regule redaktis kaj ekspedis nian organon. Herbert estas mem elstara uzanto de Esperanto, kaj pro tio ni ĝuis dum tiuj jaroj lingvo-nivelon en T.A.E. probable ne malsuperan al tiu de iu ajn alia landa gazeto. La redaktinto ĝuu sian "emeritecon"; ni scias, ke lia koro apartenas al la movado.

KAJ AL ALAN TOWSEY

Nun ni havas nian belaspektan AŬSTRALIAN ANTOLOGION, pri kiu ni sopiris dum tiom da jaroj - pro tio ni devas danki la redaktinton, Alan Towsey, kiu elspezis multcent horojn por ĝin prepari kaj eldonigi. Kvankam multaj homoj kunlaboris por produkti la libron, la ĉefan kaj tre pezan ŝarĝon portis Alan. Li akceptu la elkoran dankon de ni ĉiuj.

*

LA LIBRO DE LA JARO

Ĉiu el vi legis pri ĝi, sed pli valore estas vidi kaj legi ĝin! Belaspekta volumo, kun bildo de la sidneja Oper-Domo sur la kovrilo, ĝi prezentas la literaturan kulturon de Aŭstralio al la mondo. Sur pli ol 400 paĝoj estas la verkoj de 66 aŭstraliaj aŭtoroj, ĉiu kun nelonga antaŭparolo pri la aŭtoro kaj la verko. De 1813 ĝis 1988, ni legas la rakonton pri kiuj ni estas kaj kion ni celas, kiel ĝin prezentas niaj plej eminentaj verkistoj.

Viaj amikoj eksterlandaj volonte ricevos kiel donacon ĉi tiun libron, kiu konigas nian landon, ĝian popolon, ĝian pensaron. Vin mem surprizos la riĉo de nia literaturo, kaj la iom-post-ioma maturiĝo de nia kulturo.

Mendu de la Libroservo de A.E.A., P.O. Box 230, Matraville NSW 2036. \$30 plus poŝtkostoj.

RECENZO

ESPERANTO * LEARNING AND USING THE INTERNATIONAL LANGUAGE

de David Richardson. Orcas Publishing Company, Eastsound, Washington, Usono, 1988. 368p., bindita. Prezo en usonaj dolaroj \$14.95 plus poŝtkosto. Mendebila de la Esperanto League for North America, Inc., P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94350, Usono.

Ankoraŭ kreskas la tablo da frandaĵoj kiujn vi nepre devus gustumi! Richardson komentas en sia libro, ke nuntempe la plej valoraj esperantaj libroj venas de ekster Eŭropo, kaj li ja pravas. Rigardu la rikolton en 1988 - La Aŭstralia Antologio, Sed Nur Fragmento (el Brazilo, kvankam verkita de nia Trevor Steele), kaj nun ĉi tiu verko el Usono - kaj ili ja ne estas la solaj.

Ĉi tiu libro estas ĝuste la libro kiun bezonas via amiko kiu volas scii, kio estas Esperanto - sen propagando, blago, kaj miskomprenoj; ĝin bezonas viaj publikaj, lernejoj, kaj universitataj bibliotekoj, por tiu bibliotek-uzanto kiu ankaŭ volas scii. Kaj eĉ vi mem plejverŝajne trovos ĝin utila por propra lerno.

David Richardson estas unu el la plej malnovaj esperantistoj en Usono, kaj lia libro estas tre zorge preparita informlibro kiu celas respondi al la demando de anglalingva intereso: kio estas Esperanto? La libro havas kvar partojn -

Parto 1, "Communication and the Language Barrier" (64p.), eksplikas kial Esperanto estas bezonata, kaj klare kaj sobre resumas la historion de Esperanto ekde ĝia komenco ĝis 1988. Richardson delikate manovras inter Scila kaj Karibda, senofende sed klare skizante la Esperanto-movadon, la rolon de UEA kaj de aliaj organizoj, kaj li ankaŭ diskutas la skismojn, inkluzive tiujn, kiuj ekzistas aŭ okazas nun. SAT ricevas bone verkitan kaj senpartian priskribon, kiel ankaŭ MEM, kaj oni legas multajn interesajn faktojn pri kelkaj el la ne multe konataj esperantistaj grupoj kaj asocioj.

rolon de komputiloj en tradukado, sed ial li ne mencias la utiligon de Esperanto en tiu fako. Li bone priskribas la planon de Ralphy Harry por enkonduko de Esperanto en la traduko-programon de UN. Entute, ĉi tiu ĉapitro skizas la historion kaj utiligadon de Esperanto kreive kaj findinde. La tutan libron ilustras multaj bone elektitaj bildoj (plejparte fotoj).

Parto 2 (108p.) konsistas el 10 Lecionoj, "A Short Course in Esperanto". Kvankam tro konciza por utiligo kiel instrulibro, ĝi estas modele prezentita, kun ekzercoj kaj vortlistoj zorge preparitaj. La utilo de ĉi tiu ĉapitro estas duobla: unue, ĝi prezentas Esperanton al la interesato, por ke ŝ/li povu scii ĝuste kia kaj kio estas nia lingvo. La organizo de la gramatikaj eksplikoj estas rimarkinde klara, tiel ke eĉ progresinta studento povas uzi la libron kiel konsult-libron por malfacilaj temoj, kiaj la ĝusta uzado de "da" kaj "po", la participaj formoj, la akuzativo, kaj la vortordoj permeseblaj kaj nepermeseblaj en Esperanto. Mi trovis nur unu eraron (sur p.293), pri la uzado de "de" post pasivaj participoj. Tio estas stranga, ĉar la libro klare estis verkita post la deklaro de la Akademio pri tiu temo. Ankaŭ iom ĝenas ke Richardson ne klarigas la prononcon de la literkombinoj "aj" kaj "uj", kaj nur post plurfoja uzado de vortoj kun "oj" li klarigas la prononcon de tiu diftongo. Komencanto sekvanta lian prononc-tabelon misprononcus tiujn diftongojn. Cetere, la prononc-tabelo celas usonanojn, kaj la klarigo pri la vokaloj kaj kelkaj konsonantoj estus miskomprenataj en Aŭstralio. Bedaŭrinde, ĉar Richardson povintus fari klarigon uzeblan en ĉiu anglalingva lando, se li elektintus pli zorge la anglalingvajn vortojn uzatajn por ilustrati la vokalojn kc.

Parto 3 (129p.), "An Esperanto Reader" estas rekomendenda por ĉiu "progresinta" lernanto. Granda kvanto da tekstoj mallongaj kaj mezlongaj provizas al la leganto abundan bonstilan Esperanton, kaj multaj piednotoj eksplikas la konstruon kaj sencon de malfacilaj vortoj kaj vortkombinoj. Mi neniam antaŭe vidis tiel rekomendindan legolibron taŭgan ne nur por komencantoj

sed ankaŭ por progresinta studanto. Inter tekstoj verkitaj ekde Zamenhof ĝis Auld ankaŭ estas daŭranta rakonto en 18 partoj, al kiu la leganto revenas regule, ĉiam post diverstemaj tekstoj, tiel ke la leganto konstante plu legas, por atingi la sekvantan parton de la rakonto - genia ideo.

La lasta parto konsistas el la respondoj por la ekzercoj kaj 44-paĝa vortaro Esperanto-angla (preskaŭ kvarmil radikoj). Mi menciuj ke la tuta ekzercaro en la lecionparto de la libro strebas paroligi kaj skribigi en Esperanto. Oni ne povas resti pasiva leganto.

La libro estas kompostita per komputilo, kaj eble pro tio preskaŭ plene mankas preseraroj. Mi rimarkis nur unu. Sendube ekzistas aliaj, sed ili estas malfacile troveblaj. Eble tio ankaŭ eksplikas la eksterordinare malaltan prezon de ĉi tiu vere havinda libro.

Donald Broadribb

...

LINGVA ANGULO

Sub ĉi tiu rubriko aperos diskutoj pri lingvaj temoj kiuj perpleksigas multajn legantojn, kaj respondoj al prilingvaj demandoj senditaj de la legantoj. En ĉi tiu numero mi pritraktas du temojn: prepoziciojn post verboj kaj la ordon de radikoj en kombinvortoj.

Por multaj el niaj legantoj, kaj efektive por esperantistoj ĉie en la mondo, estas malfacile memori ĉu verbo estas transitiva aŭ netransitiva. Niaj instrulibroj diras ke oni devas ligi netransitivan verbon kun substantivo per prepozicio, sed por kunligi transitivan verbon kun substantivo oni devas uzi akuzativon. Ekzemple: kreski estas netransitiva verbo, do oni devas uzi post ĝi prepozicion, "mia filo kreskis **je** du centimetroj ĉimonate". Vidi estas transitiva, do "Mia filo vidis amikinon."

Sed kion oni faru se oni ne memoras ĉu verbo ja estas aŭ ne estas transitiva? La Fundamento diras pri tio "El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri iu verbo ne

scias, ĉu ĝi estas aktiva aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon. Ekzemple ni povas diri 'obei al la patro' kaj 'obei la patron' (anstataŭ 'obei je la patro.')

La principo estas, do, ke se oni ne estas certa ĉu aŭ ne uzi prepozicion, oni rajtas uzi akuzativon sen prepozicio. Do "mia filo kreskis du centimetrojn ĉi-monate" estas permesebla - kaj efektive, la plej multaj aŭtoroj preferas esprimi sin tiel.

Aliaj ekzemploj: "mi telefonas al vi" aŭ "mi telefonas vin"? Ambaŭ estas permeseblaj. Same pri "tiu donaco plaĉas al mi" kaj "tiu donaco plaĉas min"; "ili eliris el la domo" kaj "ili eliris la domon". Pri ĉiu el tiuj ekzemploj oni disputis aŭ disputas, sed la regulo en la Fundamento estas klara: oni povas anstataŭigi prepozicion per la akuzativo se la senco restas neambigua.

Pri la ordo de radikoj ofte ekzistas konfuzo, speciale inter anglalingvuloj. La regulo en la Fundamento estas ankaŭ simpla: "Compound words are formed by the simple junction of roots (the principal word standing last)". Do, ĉu "tagmezo" aŭ "meztago"? Ambaŭ estas bonaj vortoj, sed ili havas malsamajn signifojn:

"Tagmezo": la ĉefa radiko estas "mez" laŭ la regulo. Oni do demandas al si: "la mezo de kio?" Respondo: "de la tago". Do tagmezo = la 12a horo, kiam la suno estas rekte super niaj kapoj.

"Meztago": la ĉefa radiko estas "tag" laŭ la regulo. Oni do demandas al si: "kiu tago?" Respondo: "la tago ĉe la mezo". Dum la semajno la meztago estas merkredo; dum monato kun tridek unu tagoj la meztago estas la 16a, kc.

Ĉu "semajnfino" aŭ "finsemajno"? Semajnfino: temas pri fino. La fino de kio? De la semajno. Finsemajno: temas pri semajno. Kiu semajno? La fina. Do: "Ni ferios dum la tuta monato aŭgusto. Dum la finsemajno ni estos en Toronto". Kaj "La meteorologoj diras ke la pluvado ĉesos vendrede kaj la semajnfino estos bela kaj sunplena." - DB

ESPERANTO SUMMER SCHOOL IN ADELAIDE

This year's Australian Esperanto Summer School (Mon.- Fri. Jan. 9-20) was opened with a minimum of ceremony by Dr Peter Ellyard. President of the South Australian Esperanto Society in Aquinas College, North Adelaide. Teachers and students moved immediately into classrooms to begin an intensive fortnight's study.

COURSES

There were three-hour core courses at four different levels and a number of electives. The core courses ranged from beginners' classes to very advanced. Elective courses included "paroligaj aktivoj" (oral practice), a choir, a writers' group, an Esperanto literature study group, and an Australian literature translation group. There were also video tapes, one each afternoon after lunch.

WORK AND FUN

Evening activities began strongly with two talks, in Esperanto, by Ralph Harry, now retired Australian diplomat and retired president of the Australian Esperanto Association. Arthur Cocking spoke on Zamenhof's translation of the Old Testament. Dr Margaret Furness gave illustrated talks on the Galapagos Islands and on foetal ultrasound. Verse readings were given by Indrani Berharry-Lall and Herbert Koppel. Sylvia Burkitt spoke about how to prepare for international events in Esperanto. Our international guest, Ms Anita Altherr, gave an illustrated talk on the Swiss Esperanto Centre in La Chaux-de-Fonds. Controversial topics were debated in the Park - they ranged from S.A.T. (a politically motivated international Esperanto association) to Esperanto vocabulary. Members of all classes acted in sketches for a very successful concert which featured the Esperanto Choir Group. Alex Dembski also gave virtuoso solo performances on the didgeridoo and on the piano. Many light-hearted activities also occupied us: an

of the Adelaide markets and the "night-life" centre, Hindley Street. An ecumenical church service took place in Adelaide's oldest place of worship, in Quaker style but with, among other things, four Hare Krishna mantras.

THE TEACHERS

No report would be complete without mention of the very dedicated teachers without whom the Summer School could not exist. Special thanks must be paid to Vera Payne, Arthur Cocking, Marcel Leereveld, Marjorie Ellyard, John Lehane, Fay and Herbert Koppel, Bob Felby, as well as the speakers already mentioned. The Summer School was thus graced by an unusually large group of professionally experienced teachers, guaranteeing a high level of well presented and well absorbed Esperanto instruction. The Summer School in Adelaide was a combination of quantity and quality throughout.

We hope to see you at the next Summer School, in 1990.

INTERNATIONAL PHOTO EXHIBITION

The Esperanto Club "Kolombo de Paco" ("Dove of Peace") is organising an international photo exhibition to be held in Drogozic in the Ukraine, and then to tour the Soviet Union and other countries. The theme of the exhibition is "Life on Our Planet". Photos in colour or black and white may be submitted. Suggested topics are the Esperanto movement, peace, the beauty of nature, ecology, politics, national customs, tourism, sport, leisure etc. Photos measuring approximately 30x40 centimetres are preferred, but other sizes may be submitted. Amateurs and professionals may participate. Please label each photo with your surname, profession, and address. Prizes for the best photos will be awarded, and all participants will receive an illustrated catalogue of the exhibition. Send your entries to: Vasil Stanovic, 293720 DROGOZIC, Lvov obl. Ukraine, P K 20, U.S.S.R.

THE ESPERANTO YOUTH TRAVELLING FUND T.E.J.O.

The Esperanto Youth Travelling Fund T.E.J.O. has been established in honour of the late Dr Tim Einihovici, one of Australia's best known and most beloved Esperantists. The purpose of the Fund is to enable a young Australian Esperantist to represent Australia each year at the International Esperanto Youth Congress of T.E.J.O. (The World Esperantist Youth Organisation). The fund has been set up for investment from which the interest would pay the full travel expenses of a young Esperantist to the International Esperanto Youth Congress, living expenses while at the Congress to be catered for by arrangement with the World Esperanto Youth Organisation (T.E.J.O.) and the Esperanto Passport scheme. The latter is a system whereby a family provides hospitality for a travelling Esperantist in return for receiving such hospitality from another family enrolled in the scheme.

Clearly a very large amount of capital is required for this fund. The Curators of the Fund are Vera Payne, Dulcie Sawkins, and Idyss Einihovici. A good beginning has been made. If you wish to support this worthy project, cheques should be made payable to The Esperanto Youth Travelling Fund T.E.J.O. and may be sent to Idyss Einihovici, 88 Newry St, Floreat Park WA 6014, or to any of the curators.

*

SPECIAL PRIZE

A \$1000 prize is being offered to a young person who began study of Esperanto no earlier than June 1988 and is most successful in passing the "Supera" ("Higher") Examination in Esperanto in June 1989. Students throughout Australia are eligible, please contact your local Esperanto group to enrol. The prize is being given by Mrs Idyss Einihovici, whom local groups may contact for details.

1990 INTERNATIONAL LITERACY YEAR
A PLAN FOR THE UN

In 1978 the then Australian Ambassador to the UN Ralph Harry outlined a plan for the gradual introduction of Esperanto as a bridge language for use in UN meetings and translation of documents. Preliminary calculations show that although there would be an initial extra financial burden, savings due to the implementation of the plan would bring about an overall reduction of costs even before the entire plan was implemented. Now that next year has been proclaimed International Literacy Year, a new submission of this plan is being planned. In broad outline it sketches a five year program for the introduction of Esperanto -

Year 1: Preparation and checking of terminology for use in publishing UN documents in Esperanto. Training in Esperanto for the UN interpreters of the UN's six official languages (English, French, Chinese, Russian, Spanish, Italian).

Year 2: Instruction of permanent delegations of member states and members of the Secretariat in understanding Esperanto. Training in Esperanto for interpreters of six additional languages.

Year 3: Documents to be available in Esperanto as well as the six official languages. Interpretation from Esperanto into the twelve languages available.

Year 4: Documents to be published by the UN only in their original language and in Esperanto. (Translations into other languages to be paid for by the countries wishing such translations.)

Year 5: Delegates may speak in their own languages, but only Esperanto interpretation will be provided. Encouragement of delegates to speak in Esperanto.

RECENZO

Aŭstralia Antologio, red. Alan Towsey. Pizo: Edistudio, 1988. 431p., bindita. Prezo: \$30, de la Libroservo de AEA.

En sia "Enkonduko" al la **Aŭstralia Antologio** Alan Towsey informas nin, ke la ideo kompili aron da aŭstraliaj verkoj tradukitaj en Esperanton estis unue sugestita antaŭ pli ol 40 jaroj. Tamen, fruaj provoj sisteme kolekti enhavon estis malsukcesaj, ĝis oni vere serioze kaj daŭre strebis pretigi la verkon ĝustatempe "por memorfesti la Centjaran Jubileon de Esperanto en 1987 kaj la Ducentjaran Jubileon de Aŭstralio en 1988". Evidente la tasko estis kompletigita ĝustatempe - kvankam lastmomente - sed longe post kiam oni forgesis pri la kunligo kun la du menciitaj memorfestoj. Pli verŝajne la **Aŭstralia Antologio** restos, kiel klare videbla monumento al la strebado, sindono kaj sinofero de la tre malgranda grupo da personoj, kies sindediĉo kaj persistado sukcesis plenumi ĉi tiun ambician projekton. Negrave kiuj mankoj aŭ kritikindaĵoj estas troveblaj en ĉi tiu libro, ili nepre ne malgrandigas la elstaran meriton de la laboro de la redaktoro, Alan Towsey, kaj liaj kunlaborantoj, precipe Ralph Harry, Donald Broadribb kaj Trevor Steele - kiuj ĉiuj havis, oni notu, ankaŭ aliajn gravajn taskojn dum la tempo, kiam la antologio estis kompilata.

Unu el la plej malfacilaj problemoj, kiujn devas alfronti la redaktoro de antologio de nacia literaturo estas, kion inkludi. Kiuj aŭtoroj kaj verkoj estas inkludotaj, kaj kiuj ellasotaj. Kiam temas pri la **Aŭstralia Antologio**, la decido ne estis farita de unu persono. Laŭ la Enkonduko, "La liston de aŭstraliaj verkistoj reprezentataj en ĉi tiu libro finpreparis grupo da spertaj aŭstraliaj Esperantistoj ĉe Somerlernejo en Armidale, Nova Sud-Kimrujo, en januaro 1983, surbaze de provizora listo preparita de la tiama prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, S-ro R.L. Harry...kaj la redaktoro de la nuna antologio". Estas klare, ke multe da konsiderado kaj kolektiva decidado estis la bazo, sur kiu

estis la bazo, sur kiu la elektado de la aŭtoroj estis farita, sed malgraŭ tio, probable ĉiu leganto trovos, ke estas nekredeble, ke oni ellasis kelkajn el liaj aŭ ŝiaj plej alte aprecataj aŭtoroj. Mi mem estis surprizita de la ellaso de Randolph Stow, Neville Shute, Elizabeth Jolley, David Williamson, Dorothy Hewett, Norman Lindsay, Hal Colebatch, Fay Zwicky, Rodney Hall kaj pluraj aliaj aŭtoroj, kies merito estas pruvita. Nu, la redaktinto plene konscias pri sia bezono defendi sian elekton de aŭtoroj, kaj sur paĝo 7 estas ĉi tiu apologio -

Se iu tradukaĵo ne estis inkludita, mi humile petas pardonon, sed ĝenerale la kialo estis aŭ manko de spaco - la libro estas jam pli granda, ol ni planis! - aŭ manko de kopirajtpermeso.

Kaj li mencias, kiel ekzemplon, Audrey Childs-Mee.

kies bonega traduko de **La Magia Pudingo** de Norman Lindsay, tamen, bedaŭrinde ne povis esti inkludita pro rifuzo de kopirajtpermeso

Nu, la manko de spaco estas kialo, kiun ĉiu persono povas kompreni, kiel la kaŭzon, pro kio ne estis inkluditaj tiom da aŭtoroj kaj ekstraktoj, kiom oni volus, sed ĝi ankoraŭ ne provizas al mi kontentigan eksplikon, kial Morris West estis preferita al Neville Shute, Peter Carey kaj Robert Drew al Randolph Stow kaj Hal Colebatch, kaj Douglas Stewart al David Williamson.

Kiu filozofio estis la motivo por la elekto de la 63 aŭtoroj, kiujn oni fine akceptis? Estis plaĉe al mi, legi la honestan kaj koncizan deklaron pri la celoj de la **Aŭstralia Antologio**, kiu estis inkludita en la Enkonduko de la redaktinto. Li skribas:

Kiel ĉe ĉiuj antologioj, sendube estiĝos bedaŭroj, ke iu aŭ alia verkisto estas eksterlasita. Tamen, en libro de ĉi tiu modesta amplekso, kies intenco estas doni al ne-Aŭstralianoj ian ideon de la gamo kaj naturo de la aŭstralia literaturo, kompreneble estas

neeble prezenti ekzemplojn de la verkado de ĉiu el la multaj centoj da personoj, kiuj jam faris valorajn kontribuaĵojn al nia beletro.

Plue, nia elekto ne estis farita sole el la "plej bonaj" verkistoj, sed inkludis tiujn, kies verkoj estas vaste legataj kaj popularaj inter tiel nomataj "ordinaraj" Aŭstralianoj - alivorte, ĉi tiu antologio celas ne la specialiston (kiu ĉiuokaze preskaŭ certe scipovus legi la originalojn!), sed la mezkleran ne-aŭstralian Esperantiston, kiu volas konatiĝi kun iom de la aŭstralia literaturo.

Probable mia sola kvalifiko por recenzi ĉi tiun verkon estas, ke mi estas "mezklara ne-aŭstralia Esperantisto" kaj, ĉar mi estas tia, al mi estis prezentita transversa sekco de la aŭstralia literaturo, kovranta 431 paĝojn kaj konsistanta el 70 verkoj verkitaj de 63 aŭtoroj. 33 el la ekstraktoj estas poemoj, kaj 3 estas ekstraktoj el dramoj. Mi estis antaŭe leginta nur 6 el la verkoj, do mi legis la tutan antologion zorge kaj atente - sed ne, domaĝe, kun plezuro. Leginte la tutan libron, mi estis tre desapontita, ĉar la elektitaj porcioj - mi ne parolas pri la aŭtoroj - ne estis elektitaj laŭ la samaj principoj, kiel tiuj uzitaj de Leonie Kramer kaj Adrian Mitchell, la redaktintoj de la **Oxford Anthology of Australian Literature**. "Kiam ajn eble," ili skribis en sia Enkonduko, "ni evitis ekstrakti tekstojn. Ni devis fari escepton okaze de la ĝenerala prozo. La ĉefaj romanistoj, kiel Henry Handel Richardson, Boyd, White kaj aliaj, estas reprezentataj nur de mallongaj verkoj."

Bedaŭrinde, en la **Aŭstralia Antologio** estas sume 23 porcioj ekstrakitaj el grandaj romanoj, plus 3 ekstraktoj el dramoj, kaj el ili konsistas multe pli ol duono de la libro. Estas vere malfacile, legi ĉi tiun senkoheran aron da fragmentoj el longaj verkoj kun sento de kontento aŭ, efektive, kompreno. Ekzemple, la signifo de la ekstrakto el **My Brother Jack** (parto de ĉapitro 13) tute simple ne povas esti komprenata se oni ne jam legis la antaŭan ĉapitron kaj ankaŭ la reston de la ĉapitro 13.

Izole, la paĝoj elektitaj por la antologio donas al la leganto nur tre malmultan komprenon pri kio okazas kaj kial ĝi okazas.

Necesas aldoni, ke la noveloj de Henry Lawson, Vance Palmer kaj Hal Porter estis tre plezuriga legaĵo, kiun oni tre ĝuas. Se nur estus pli... !

Rilate al la poezio, mi povas diri nur, ke malgraŭ la apero de la nomoj William Auld kaj Marjorie Boulton inter la tradukintoj, nenio gustis bone al mi. Tamen, mi ne havis sufiĉan tempon por plene digesti kaj studi 33 poemojn, el kiuj pluraj ŝajnis al mi tre malfacilaj. De-nove, kiam mi konsideras la tre grandan kvanton da poezio, baladoj kaj simpla rimaĉado verkitan kaj eldonitan en Aŭstralio, mi estas surprizita, ke la elekto estis tiel nealloga. Mi preferus vidi "Bricks of Beer" de "Dryblower" en ĉi tiu antologio ol 30 el la 33 poemoj, kiujn oni inkludis.

Sed mi malakceptas min kiel juĝanton de tradukita aŭstralia poezio, kaj mi esperas, ke aliaj legantoj aprecos ĉi tiujn verkojn multe pli favore ol mi. Mi finu per pozitiva komento, laŭdante la zorge preparitajn kaj informoplenajn biografiajn notojn donitajn pri ĉiu el la aŭtoroj (sed bonvolu noti, ke la naskiĝdatoj ne estis menciitaj por Hal Porter kaj Steele Rudd). La organizado de la verko estas profesie kaj kompetente farita.

David Poulson

...
..
.
..
...

Ankoraŭ alia verko, ĉifoje romano, de aŭstralia verkanto aperis pasintjare, **Sed Nur Fragmento** de Trevor Steele. Domaĝe stoko por disvendado ankoraŭ ne atingis nian libroservon, sed ni publikigos recenzon pri ĝi, kiam ĝi estos aĉetebla. - DB

RECENZO

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto: Suplemento. Parizo: Sennacienca Asocio Tutmonda, 1987. 45p, broŝurita. Prezo: \$8 de la AEA Libroservo.

Kvankam jam preskaŭ dujaraĝa, ĉi tiu libreto ne ricevis la atenton kiun ĝi meritas. Tial ĉi tie mi donas iom longan kaj pripensigan recenzon.

La originala **PLENA VORTARO DE ESPERANTO** aperis en 1930 kun proksimume 6800 difinitaj radikoj. Dua, kompletigita kaj korektita eldono aperis en 1934, kun 6900 difinitaj radikoj. En 1953 oni eldonis suplementon, kun 966, do entute 7866 radikoj. En tiu tempo Profesoro G. Waringhien, la estro de la kompilado, kalkulis ke el ili 4425 estis oficialaj (t.e. en la Fundamento kaj en la postaj Oficialaj Aldonoj), kaj li atentigis ke Zamenhof mem uzis 1294 radikojn neniam oficialigitajn.

Esperanto evoluas rapide. Kvankam la nombro da esperantistoj ne multe kreskis en la plej multaj landoj de la mondo, la aplikado de Esperanto konstante vastiĝas. Kiam do S.A.T. fine riskis (finance) eldoni tute reverkitan eldonon de la leksikono, nomitan **PLENA ILUSTRITA VORTARO**, en 1970, la nova verko jam enhavis iom pli ol 15 250 "artikolojn", t.e. aparte difinitajn radikojn. Do en 20 jaroj oni kolektis duoblon de la jama vortnombro. Kaj nun, 17 jaroj poste, suplemento al PIV donas al ni ankoraŭ pli - ĉirkaŭ 400 "novajn" radikojn plus ŝanĝoj, korektoj kaj aldonoj al proksimume 400 radikoj jam pritrakitaj en la PIV.

Kelkaj - mirinde ke ne pli multaj! - personoj levis siajn voĉojn por protesti pri la giganta kresko de nia preskaŭ oficiala leksikono. (Estas memorende, tamen, ke la Akademio de Esperanto ĝis nun neniam oficialigis leksikonon nek gramatiklibron - saĝe, laŭ mia opinio.) La alarmo ne estas vere pravigebla. La averaĝa "homo sur la strato" scipovas ĉ. 10 000 vortojn de sia ĉiutaga lingvo, kaj kompleta leksikono de ĉiu etna lingvo enhavas plurcent mil apartajn vortojn. Se Esperanto devas rivali

la anglan lingvon rilate al esprimpovo (kaj nur tiel ni ja povas pravigi nian pretendon ke Esperanto estas pli dezirinda ol la angla lingvo), ĝi devas havi vortprovizon adekvatan por tio - kaj kvankam 15 000 radikoj estas pli ol la averaĝa scipovo anglalingva, ĝi estas apenaŭ dekono de la nombro da terminoj enhavata de eĉ malgranda ĉiutaga leksikono anglalingva.

Sed io tre atentinda okazis, kio komencas ĝeni multajn legantojn, inkluzive min: la etnalingvaj leksikonoj limigas sin al registrado de la jam uzataj terminoj, kaj donas konsilojn pri uzado, sed ne preskribas novajn, ankoraŭ ne uzitajn terminojn. Profesoro Waringhien, estro de la PIV kaj Suplemento prave atentigas ke Esperanto bezonegas multe pli grandan terminaron por diversaj fakoj: la komputila fako (komputera? komputora?), muzika, elektronika, kc. La iama eldonado de apartaj leksikonetoj por la diversaj fakoj ne estis kontentiga, ĉar kiu ne aĉetis muzikterminan leksikonon ja ne povas kompreni tekston kiu uzas ties terminojn, ĉu ne? Sekve, estas logike ke la PIV kombinas ĉiujn ĉefajn fakojn kaj disponigas al la tuta esperantistaro ĉiujn terminojn - almenaŭ ideale, se ne praktike. Tamen samtempe ekekestas danĝero: ĉar por la plej multaj esperantistoj la PV kaj poste la PIV akiris preskaŭoficialan akcepton, oni ektimas uzi terminon ne trovatan en la PIV, aŭ malobei ĝiajn rekomendojn, kiuj kvankam plejofte saĝaj tute ne estas di-donitaj ordonoj.

Nun pri ĉi tiu Suplemento mem kaj ĝiaj "fortaj" kaj "malfortaj" aspektoj. Unue, kaj tre grave, ĝi listigas la proks. 200 radikojn oficialigitajn per la Oka Oficiala Aldono, kiu aperis en 1974, kaj enhavas (sen averto) ĉe apartaj difinoj la ŝanĝon de kategorio de multaj radikoj, kaj la ŝanĝon de difinoj proklamitaj per tiu Aldono. Efektive, por plene sciigi sin pri la oficiala stato de nia vortaro nuntempa la leganto bezonas aĉeti ankaŭ ekzempleron de la AKTOJ DE LA AKADEMIO II, (1974), en kiu aperas ne nur la "Baza Radikaro Oficiala" (aparte eldonita en 1979) sed valoraj diskutoj pri vortuzado kaj difinoj. Jes ja, ni vere bezonas tute novan reviziitan

duan eldonon de la tuta PLENA VORTARO ILUSTRITA. Sed ne forgesu spiradi dum vi atendas, ĉar ĝia epifanio verŝajne okazos nur dum la 21a jarcento.

Mi ne estas certa ke mi pravis dirante ke Esperanto devas rivali la anglan lingvon. Legante ĉi tiun SUPLEMENTON mi komencas kredi ke ni jam unuigis la anglan lingvon kaj Esperanton kaj faris el ili nur unu lingvon. Kion alian oni konkludu pro la apero de "fajnajto" (angla "finite"!!!). finiŝo (jes, "the finish!"), interkomo (tiu familiara "intercom" per kiu vi komunikas), rori (kiel leono, kompreneble), krita ("critical", ĉar la Fundamenta kriza estas tro eksmoda, sendube), kontenero (por ŝipi vian frajton, kompreneble. Jes ja, mi ne ŝercas, rigardu en PIV kaj ĝia Suplemento)...

Sed ne supozu ke mi volas tro forte kritiki la Suplementon. Sur paĝo 42 ĝi ja donas al ni tre inspiran homilion pri kial ni ne uzu toksikajn drogojn (12 linioj da teksto por tiu moralaverto!). Estas vere ke ĝi ne modifas la marksistan (??) difinon de milito, kiun inventis PIV ("Tiu perforta, sanga, k detrua formo, kiun alprenas la politiko, por solvi la grandajn ekonomikajn konfliktojn inter la nacioj aŭ la klasoj" p.696) por anstataŭi la malpli eruditajn difinon donitan en la antaŭa PV ("Batala agado inter militantoj").

Malgraŭ miaj plendoj, estas fakto ke ĉi tiu Suplemento estas havenda se vi volas kompreni la aktualan staton de Esperanto, ĝiajn vortaron kaj gramatikon

Tamen fojfoje mi pensas...memoras...nostalgias pri la grandaj prozistoj en nia esperanta historio: Zamenhof... Szilágyi... Engholm... jes, kaj Waringhien mem... kiuj neniam hezitis uzi la vortojn necesajn kaj la gramatikan ĵongladon taŭgan por la verko preparata, sed neniam klopodis kaŝi mankon de talento per superŝuto de anglismoj por imponi la leganton. Kaj mi demandas al mi, ĉu iel perdiĝas la animo de nia lingvo pro nia strebo ĉiam pliperfektigi ĝin?

Donald Broadribb

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

1.c; 2.c; 3.a; 4.b; 5.a; 6.b; 7.a; 8.b; 9.a; 10.c; 11.c;
12.a; 13.a; 14.a; 15.b.

DU KONKURSOJ
VORTO

The Australian Esperantist establas specialan konkurson por trovi la plej longan fareblan Esperanto-vorton, kiu malgraŭ sia longeco estas sencoplana kaj gramatike ĝusta.

La vorto uzita sur p.27 de Odlo Bokserp ekzempligas la principojn: ĉiamakuratfidindaperado. Tiu 23-litera vorto certe estas nana, kompare kun vortoj fareblaj. La sporto de longvortkonstruado estas de multaj jarcentoj familiara al germanoj kaj kimroj. Esperanto ja povas superi ĉiun etnan lingvon rilate al ĉiu literatura sukceso, ĉu ne? Do ek al viaj leksikonoj, kunbatalantoj!. La plej longa gramatike kaj sence akceptebla vorto gajnos por sia farinto premion: ekzempleron de mia libro THE DREAM STORY. (Kondiĉo estas, ke almenaŭ 10 personoj sendu vortojn.)

Por partopreni la konkurson, sendu via(j)n vorto(j)n al D-ro Donald Broadribb, 17 Harrison St, Willagee WA 6156, antaŭ la 15a de marto.

.....

POR NIAJ KANTO-AMANTOJ

Meredith Willson komponis la plej longan unufrazan kanton en la angla lingvo. Kiu povas nomi por ni tiun kanton kaj traduki ĝian tekston Esperanten? Limdato estas la 15a de junio. Trafe respondintoj ricevos premion.

ATENTU!

Se vi ankoraŭ ne pagis vian kotizon por la pasinta jaro, ĉi tiu numero estas la lasta kiun vi ricevos. Vidu p. 5.

POSTKONGRESA EKSKURSO EN BRITIO!

La 74a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Brajtono, Anglio, la 29an de julio ĝis la 5a de aŭgusto. La Esperanto Vojaĝ-Servo aranĝas specialan ekskurson per kiu post via partopreno en la Kongreso mem vi povos ĝui aŭtobusan veturon de Brajtono al Edinburgo. Nia granda poeto William Auld servos kiel interpretisto kaj gastiganto. (Se vi supozas ke aŭstraliano ne bezonas interpretiston en Skotlando, malagrabla surprizo atendas vin!)

La Esperanto Vojaĝ-Servo en Usono organizas ĉi tiun ekskurson, kaj ĝi volas kunmiksi usonanojn kaj neusonanojn en la ekskurso. Por detaloj kaj registriĝo, kontaktu: Esperanto Vojaĝservo, 578 Grand Ave., Oakland CA 94610, Usono. La limdato por pagi la koston estas la 27a de majo. La suma kosto de la ekskurso estas US\$1098 (por unuopulo, US\$1298). Tiu prezo inkludas hotelkoston post la Kongreso, la koston de la baza ekskurso mem, maten- kaj vespermanĝojn dum la ekskurso. Se vi volas mendi hotelĉambrojn ankaŭ por la kongresa semajno, la Vojaĝ-Servo povas aranĝi tion, je US\$120 ĉiunokte por unupersona ĉambro, aŭ US\$78 por lito en dupersona ĉambro. La suma baza kosto por paro do estos \$US4302 = proksimume \$5740 aŭstralia mono. Atentu ke la kongreskostoj estas aparte pagendaj kaj ne inkluditaj en la ekskursprezo.

La ekskurso de Brajtono al Edinburgo donos al vi oportunon vidi multajn famajn kaj ofte belajn partojn de Britio. Dum la unua tago vi veturos al Stratford-upon-Avon, kie vi ne nur vizitos la ŝekspiran muzeon sed ankaŭ aŭdos William-Auldon deklami el ŝekspiraj verkoj. Kaj en Skotlando vi aŭdos vortojn de kaj pri alia iomete konata skota poeto, Robert Burns. Intertempe vi povos serĉi la monstron ĉe Loch Ness (ne forgesu kunpreni fotografilon!), revii ĉe la "bonnie banks" de Loch Lomand, eble eĉ renkonti la fantomon de Robin Hood dum vi preterpasos la arbaron Sherwood. (Nepre akiru asekuron por viaj juveloj kaj oro!) Ensume oktaga ekskurso, komenciĝonta tuj post la Kongreso. Feliĉan vojaĝon!

DE LA KLUBOJ

ZAMENHOF-VESPEROJ

^
 Ciujare laŭ delonge establita tradicio oni honoras Doktoron L. L. Zamenhof meze de decembro. Jen du raportoj pri la Zamenhof-vesperoj de lokaj grupoj:

Sud-Aŭstralio: oni festis je la 12a de decembro, en la Kvakera kunveno en Adelajdo. 28 personoj partoprenis, inter ili speciala vizitanto, Anita Altherr el Triesto. Paroladis Petro Ellyard kaj Bob Felby kaj kompletigis la vesperon skeĉoj kaj deklamado de la ŝercpoemo "Estas mi esperantisto" de Julio Baghy.*

Kvinslando: la festo okazis la 17an de decembro en la klubejo. Entute 31 anoj kaj vizitantoj partoprenis. La ĉefpunkto de la vespero estis prezento de magiaj trukoĵ far Ross Robbins. Ankaŭ menciindas la prezento de kantoj kaj karoloj far brisbana kantgrupo - kristnasko ja ne forgesiĝis ĉi tie!

.....nek instruado: je la 6a de februaro komenciĝis la nova instruaro, kaj oni vigle reklamadas por alvenigi lernontojn al la klaso por komencantoj.

Aliaj raportoj ne atingis la redaktoron. Mi deziras esprimi dankon al Ray Ross kaj Bob Felby pro iliaj raportoj, el kiuj la supraj informoj estas ĉerpitaj.

(*Demando de la redaktoro: kiu povas sciigi al mi la ĝustan prononcon de tiu nomo? - D.B.)

*

La desegno sur la unua paĝo de ĉi tiu numero de The Australian Esperantist estas la verko de Jadviga Poulson, al kiu la redakcio multe dankas. Laŭ ŝia originala plano la desegno estus kolorita, sed la stato de la AEA-kaso ne permesis plenumi tiun celon.

Perkomputile kompostita de DB. Presita de Snap, jan. 1989

NIAJ KUNLABORANTOJ (1)
ODLO BOKSERP

Por ĉiu periodaĵo laboras malantaŭ la kulisoj granda stabo de ekspertoj, kaj nur dank' al ilia konstanta influo eblas ke la periodaĵo konservu sian saltan kvaliton. La nova redaktoro de ĉi tiu, nia THE AUSTRALIAN ESPERANTIST bonvolis dungi min - je nekredeble alta salajro por helpi je ĉiamakuratfidindaperado. La legantoj en Okcidenta Αυστραλίο jam bone konas mian laboradon, pro mia konstanta helpado en la pretigo de la tie publikigata revuo LA NIGRA CIGNO. Mi fieras ke mi povas diri ke post ok jaroj da intensa laborado mi sukcesis malgrandigi la nombron da legantoj de tiu revuo de 98 al 13*. Fojfoje min speciale δυνγισ ankaŭ la administracio de ĉi tiu nia mondfama nacia gazeto, ekzemple por la pretigo de la speciala suplemento pri komputado, kiu akompanis (daŭrigo p.33

Mi ricevis mian diplomon de presfuŝado ĉe la Universitato de la Nigra Arbaro, Germanio, kaj dum pluraj jaroj mi servis kiel pretiganto de la instrukcilibro por la mondkonata Volkswagen Kompanio. Mi komencis ĉe la "plej malalta ŝtupo" en tiu fama kompanio, kaj post dek jaroj mi fariĝis la verkinto de la japanlingva eldono de la instrukcilibro, post studado de la japana lingvo dum tri tagoj, kaj pro tio mi ricevis la Nobelpremion por literaturo. La juĝistoj, kiuj ne kapablas legi japane, diris ke mia verko estas "monumento al la Zen-koanaro" kaj ke ĉiu paĝo aspektas... "kiel kolora bildo nigre-blanke pentrita".

Tamen mi plej fieras pri mia sublima sukceso dum la preparado de la eminenta PLENA ILUSTRITA VORTARO, el kiu mi forŝtelis la ĉefan difinon de la vorto radio, universale uzatan en la esperantista mondo. Vi do rajtas fieri ke mi nun laboras por vi, karaj legantoj.

O.B.


*Morgan-Gallup-enketo 3 novembro 1986. El tiuj 13, dekdu respondis ke ili legas almenaŭ la daton supre de la unua paĝo antaŭ ol enrubejigi la gazeton.

The Australian Esperantist

Numero 256

JULIO-AUGUSTO 1989

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



Kiu klare aludas (Niĉjo Nicholas)...p.3

Esperanto kaj kulturo (Ralph Harry)...p.5

Provu vian vortoscion (Donald Broadribb)...p.15

Gurukmun, la rano (Folkloro, tr. David Poulsen)...p.17

Kritiko pri la vortaro de J.C. Wells (Bernard Golden) p.21

Recenzo: Apple Macintosh Esperanto-kurso (Niĉjo Nicholas)...p.23

Novaj libroj ĉe la libro-servo...p.25

Radio en Melburno kaj aliaj esperantistaĵoj...p.26

English supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Hedaktoro: D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill
WA 6562. Telefono: (09) 574 1307.

Prezidanto: S-ro Trevor Steele, 7 O'Callaghan St, Holland Park QLD
4121.

Vicprezidantoj: S-ino Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.
Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: S-ro Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: S-ro Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: S-ro Owen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-servo: S-ro T. Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Membreco: \$25, por individuo, klubo, aŭ federacio; \$30 por familia mem-
breco (ĉiuj ĉe la sama adreso); \$15 (minimуме) por pensiulo aŭ stud-
ento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-Servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la
adreslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la
redaktoro. Limdato por alsendo de presotaĵoj por la venonta numero: 1
septembro.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron
de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST, "ni vere bezonas artikolon pri..."? Do
sendu al ni tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de
vidpunkto, ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston,
bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare
tajpita, kun duobla spaco inter la linioj, kaj marĝenoj de almenaŭ 2
centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaĵaj tekstoj
estos malakceptitaj. Por konservi la lingvonivelon de ĉi tiu gazeto la
redaktoro rajtas lingve korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Se la
disponibla spaco aŭ la stilo de la verko necesigos tion, la verko povos
esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la
tuj sekvonta numero, krom se temas pri kronologie urĝaj tekstoj. Ankaŭ
anglalingvajn tekstojn por la angla suplemento ni bonvenigos.

KIU KLARE ALUDAS

Ho, potenculoj falegas,
eĉ dum ili popolon pistas
tanke, kaj fajron sur homojn sagas,
kaj venĝe teroron insistas.

Ili tamen falas,
kaj falas tre malalten, ruine;
punpagas, pro ke antaŭe patrolis
la mensojn, juĝiĝas fine.

Morta.

Kuraĝu, homoj, vi kuraĝos!
Neniel feras ilia volo.
Antaŭ homuro ili fuĝos,
fuĝos antaŭ popolo.

Tre morta,
li kuŝas tie, sangolinio en defluilon.
Kial morta? Vorteble, vortu, vortu,
sed ne malfareble.

Kaj eĉ falante, ili
barakte provas aserti mensogojn:
hastas ekzekuti, torturi, makiaveli,
deklari vante monologojn.

Ne malfareble,
li kuŝas sub nebulo de larmigogaso,
disipiĝanta pro maŝinpafilaj ekkrakoj;
policanoj preterkuras kun bastonoj,
Ĵurnalistoj kaŝfilmas
lin, solan en la placo.
Li ne leviĝos.

Ho, potenculoj falegas,
 eĉ dum ili animojn turmentas
 karcere, maljuston sur homojn plagas;
 eĉ dum homaro lamentas.

Li ne leviĝos.
 Kugloj haltigis la demonstracion. Lin memoru.
 Vi scias, pri kie mi parolas.

Ho, potenculoj falegos.

Ho, potenculoj falegos.

Ho, potenculoj falegos.

Niĉjo Nicholas

| * | * | * | * |

Neniu homo estas insulo, kompleta en si mem; ĉiu homo estas parto de la kontinento, parto de la ĉeftero. Se la maro forlavas bulon, Eŭropo estas pli malgranda, kvazaŭ promontoro malaperus, kvazaŭ domo de viaj amikoj aŭ de vi mem; la morto de kiu ajn min malgrandigas, ĉar mi estas parto de la homaro; sekve, ne demandu pri kiu mortsonoras; oni sonorigas pro vi.

John Donne

ESPERANTO KAJ KULTURO

Kultura interŝanĝo en multkultura mondo
Kulturaj valoroj de la Esperanta Komunumo
en Unuiĝanta Mondo

Esperanto kaj la Registaroj

En alia parolado mi preparolis la rilatojn de la Esperanto-Movado kun la registaroj dum la 100 jaroj de nia historio, pri la klopodoj de la landaj asocioj akiri la komprenon kaj permeson de la registaroj, pri la tragedioj de diktatoraj naciismaj reĝimoj, kiuj malpermesis la instruadon, persekutis la Esperantistojn, bruligis esperantajn librojn. Mi menciis ankaŭ la helpon, kiun donis kelkaj registaroj, kiuj celis internacian kunagadon, aŭ kiuj trovis en Esperanto ilon por nacia informado aŭ propagando.

Mi notis, konklude, ke oni persvadis kelkajn internaciajn organizojn uzi Esperanton por informado kaj en kelkaj limigitaj programoj - mi menciis la Internacian Labor-Organizon kaj UNESKO-n ekzemple - sed ke ni ne sukcesis atingi decidon de la registaroj uzi Esperanton kiel oficialan lingvon en la Ligo de Nacioj aŭ en Unuiĝintaj Nacioj, aŭ en kiu ajn grava interŝtata politika organizo. Ni ne konvinkis la registarojn, ke tiaj organizoj bezonas neŭtralan (t.e. nenacian) internacian lingvon.

Tio estis, por mi persone, bedaŭrinda situacio, ĉar kiel diplomato, kiu pasigis multajn jarojn kiel reprezentanto de Aŭstralio en diversaj internaciaj organizoj, mi pli kaj pli konvinkiĝis, ke la diplomat-oj pli efike agus kaj ke internaciaj organizoj pli bone funkcius, se ili akceptus Esperanton. Almenaŭ ĉiuj ŝtato-membroj estus egalaj! Mi certe esperas, ke la Esperanto-movado ne ĉesigos sian agadon sur tiu kampo.

La Raŭmismoj

Sed, kiel mi notis, estas skolo (la "raŭmismoj"), kies membroj konsideras, ke la klopodado celanta oficialigon de la lingvo estas perdo de tempo, eĉ malsaĝaĵo, ke Esperanto ne estas preta, aŭ ke la momento ne venis por persvadi registarojn fari tian decidan paŝon. Mi firme kredas, ke laŭ lingva vidpunkto Esperanto estas jam preta. Mi helpis traduki sufiĉe da internaciaj dokumentoj en Esperanton por

atesti pri tio. Sed mi respektas ankaŭ la argumentojn de la amikoj, kiuj rekomendas la alian vojon. Ni tion ekzameni.

Diskutoj en Segedo, Hungario, en Julio de la pasinta jaro emfazis "la bezonon, ke la esperantistaro kapablu realigi, tuj kaj minoritate, sian modelon de internacia travivaĵo..." Oni substrekis la "kvalitajn bezonojn" de la ekzistantaj esperantistoj, tra kies kontentigo, oni argumentis, "Esperanto fariĝas pli alloga, pli influa, pli granda, kaj la bildo de Esperanto entute pli prestiĝa". Mi citos la finan alineon:

La ekspansio de la fenomeno "Esperanto" estas nedisigebla de la ekspansio de ĝiaj kulturvaloroj. Ĉia taktiko, kiu ne konsideros ĉi tiun strategian celon ŝajnas kondamnita al fiasko.

Do ni ekzameni la kulturajn valorojn kaj ilian situacion en nia multkultura mondo:

- (a) la signifon por la paco kaj bonstato de la mondo de interkompreno per la kultura interŝanĝo, kaj la rolo de Esperanto tiurilate;
- (b) la apartajn kulturajn valorojn de la Esperanto-movado kaj la ebleco, ke tiaj valoroj allogus homojn kaj persvadu ilin lerni nian lingvon;
- (c) kiel ni povus informi la publikon pri tiuj valoroj, kaj kiel ni povus pligrandigi tiajn valorojn.

Eble la sperto rilate komunajn lingvojn en multkulturaj landoj helpos en la analizo de la situacio kaj la eblecoj.

Aŭstralio - Multkultura Lando

Ni multe parolas en Aŭstralio pri nia multkultura socio, kies ĉefaj trajtoj, mi sugestas, estas:

1. Agnosko ke enmigrintoj kunportis gravajn kulturajn valorojn. Bedaŭrinde, kelkaj ankaŭ kunportis antikvajn kverelojn, kiuj ne estas aferoj, kiuj tuŝas la interesojn de Aŭstralianoj.
2. La rajto paroli la lingvon de la antaŭa patrolando, kaj instrui ĝin al siaj infanoj;
3. La rajto praktiki la religion aŭ sekton de antaŭa lando;

4. La rajto organizi etnajn komunumojn por konservi, praktiki kaj eĉ diskonigi sian kulturon.

Kompreneble, kiam mi parolas pri "kulturo" mi ne aludas nur al literaturo, arto, dancado, muziko ktp sed ankaŭ pri manĝaĵo, vestoj, kaj ĉiuj familiaj kaj sociaj kutimoj.

La multkultureco de Aŭstralio, tamen, evoluas en la kadro de la nacio "Aŭstralio" - la kultura diverseco estas aspekto de unuigita ŝtato, kiu havas sendependan juran personecon en la mondo.

Estas kelkaj esencaj elementoj en la nacia unueco:

1. La juro estas, kaj devas resti, la sama por ĉiuj civitanoj;
2. La politikaj kaj aliaj homaj rajtoj estas la samaj por ĉiuj civitanoj;
3. Ĉiu civitano havas la samajn devojn rilate la ŝtaton.

Por ĉiuj kaj ekzerci la samajn rajtojn, egale, civitanoj nepre devas posedi la komunan lingvon kaj havas devon ĝin lerni. Kompreneble, dum ili lernas, se ĝi ne estas la gepatra lingvo, ili rajtas ricevi helpon de la ŝtato por kompreni la juron, la aferojn de la socio, siajn rajtojn kaj oportunojn ktp - ekzemple en tribunaloj, en la fabrikoj, rilate voĉdonojn, en hospitaloj, dum referendumo. Kiam mi vizitis hospitalon por radiografio estis afiŝo, kiu min pridemandis en dek lingvoj: "ĉu vi estas graveda?"

Aŭstralio jam havas komunan lingvon, la aŭstralian anglan, do internacia lingvo ne havas gravan rolon ĉi tie por interkomprenigi etnajn komunumojn, kvankam tio eble iomete okazas. Esperanto servis, laŭ mia sperto, en tiu rolo en Belgio... sed en lando kun nur du lingvoj oni povas simple lerni la alian! Ĝi povus servi en Svislando, kie malmulte da svisoj posedas ĉiujn kvar lingvojn.

Fakte, Aŭstralio estas bona modelo de la neceso de komuna lingvo en multkultura socio, aparte en tutmonda socio aŭ komunumo.

En Aŭstralio, per la komuna lingvo, ĉiu komunumo kaj individuo povas komuniki kun ĉiu alia, diskonigi siajn kulturajn trezorojn, sed samtempe oni povas, uzante, se oni deziras, etnan lingvon - eĉ la anglan - praktiki sian ŝtatatan kulturon.

En Aŭstralio oni ne multe lernas la lingvojn de aliaj komunumoj - kelkaj lernas la italan kaj la germanan, sed ne multaj lernas la nederlandan aŭ la modernan grekan - ĉiuj lernas iom pri la aborigena kulturo sed tre malmultaj neaborigenoj lernas aborigenan lingvon - oni iomete tradukas la literaturon de Aŭstraliaj verkistoj el la greka, hispana kaj serbokroata en la anglan.

Sed ankaŭ oni povas observi, ke, post 200 jaroj, evoluis aparta aŭstralia kulturo. La fakto, ke la komuna lingvo estas la angla helpis pligrandigi la influon de la brita-irlanda kulturo de la unuaj setlantoj, kaj de la ĉefaj enmiĝintoj de la 19-a jarcento. Sed oni akceptis elementojn de la germana, la itala, la japana kaj ĉina, eĉ la vjetnama kaj la usona!

Multkultura Mondo

La mondo de nia planedo estas treege multkultura, kun diversaj lingvoj, religioj kaj regsistemoj. Tiuj kulturoj intermiksiĝas kiam estas komuna lingvo kaj politika komunumo - kiel okazis en la imperioj romia, portugala, hispana, brita, franca kaj rusa.

Estas verŝajne, almenaŭ teorie, ke se oni akceptus internacian lingvon, estiĝus internacia komunumo, kies kulturo enhavus elementojn el ĉiuj signifaj naciaj kulturoj. Sed tio evoluus laŭ etapo.

La unua etapo estis konatiĝo de aliaj kulturoj, per tradukado aŭ originalaj priskriboj de ekzistantaj kulturoj. La fiera nacio elektus verkojn "gravajn" aŭ ŝtatatajn por traduko. La okupata leganto elektus verkojn, kiujn, laŭ la recenzoj aŭ spertoj li konsideras la plej interesaj. Tio estis la bazo de la frua tradukado de klasikaj ĉefverkoj kaj la eldono de antologioj. Kiel ni scias novaĵ gravaj antologioj kaj tradukoj de kompletaj verkoj aperis en la jaro de la Centjara Jubileo de Esperanto.

Dua etapo estis verko de libroj kiaj "Aŭstralio: Lando kaj Popolo", "Jugoslavio kaj Ĝiaj Popoloj", "La Fenomeno Svislando" kaj "Sepdek-sep Slosiloj al Japana Kulturo". Tiuj estas pli ol nur turistaj broŝuroj kaj doris al Esperantistoj resuman erkondukon en la vivon de aliaj landoj kaj ties historio.

Samtempe, per la internacia lingvo oni partoprenis en vojaĝoj kaj kongresoj kaj faris personajn kontaktojn per senpera sperto de la kutimoj kaj vidpunkto de aliaj per procezo de "natura selekto".

Kulturaj Interŝanĝoj

Dum multaj jaroj la ŝtatoj agnoskis la valoron de tiaj interŝanĝoj. La fama komisiono pri intelektaj interŝanĝoj de la Ligo de Nacioj sub prezidado de la filozofo Henri Bergson de Francio ne oficialigis Esperanton, sed ĝi kuraĝigis kelkajn kontaktojn inter ekzemple la instancoj de naciaj muzeoj. La Ligo de Nacioj ankaŭ eldonis utilan raporton pri la instruado de la internacia lingvo.

UNESKO, kreita post la Dua Mondmilito, havis noblan celon - helpi pri la konservado de la paco per forigo de miskomprenoj kaj malpacaj ideoj en la mensoj de homoj. Sed ĝi heredis kelkajn nesufiĉajn kutimojn de sia antaŭulo, la Komisiono pri Intelektaj Interŝanĝoj. La Ĝenerala Konferenco de 1949 decidis antaŭenigi la reciprokan interkomprenon de la popoloj de la mondo per interŝanĝo de kulturaj ekspozicioj preparitaj de membroŝtatoj! Kaj Aŭstralio preparis ekspozicion pri la Aborigenoj!

Sed UNESKO poste plilarĝigis siajn programojn. Ĝi stimulis kaj helpis la konservadon de gravaj arkitekturaj artaĵoj (ekzemple Abdu Simnel apud la Rivero Nilo, kaj temploj en Azio) kaj naturaj fenomenoj (ekzemple la arbaroj de Sud-okcidenta Tasmanio!). Ĝi kunordigis kaj kuraĝigis sciencistojn, ĝi helpis malriĉajn landojn forigi analfabetecojn.

En 1954 la Ĝenerala Konferenco akceptis rezolucion, kiu agnoskis la gravecon de Esperanto rilate la celojn de UNESKO. Tiu rezolucio estis la rezulto de jaroj da laboro en multaj landoj - ekzemple en Aŭstralio ni preparis por la registaro, kiu sendis ĝin al UNESKO, raporton pri la rezultoj atingitaj por kaj per Esperanto en ĉi tiu lando. Kaj dum la Konferenco en Montevideo la urugvajaj Esperantistoj kaj internacia teamo sub la gvido de Ivo Lapenna triumfis super ĉiuj obstakloj. UEA konsekvence ekhavis konsultan statuson ĉe UNESKO kaj poste ĉe UN. UNESKO eldonis informan broŝuron en Esperanto kaj afiŝojn kaj unu-du rezoluciojn pri internacia edukado kun Esperanto-tekstoj.

Eble la plej signifa paŝo sur la kampo de kultura interŝanĝo estis la komenco, sub la aŭspicio de UNESKO, de la eldon-serio Oriento-Okcidento, en kiu aperis ĝis nun pli ol 20 gravaj literaturaj verkoj el Japanio, Hindio, Ĉinio, Anglio, Francio, Portugalio kaj aliaj landoj, do vere signifa kontribuo al la interŝanĝo de literatura kulturo inter Oriento kaj Okcidento. Multaj aliaj ĉefverkoj aperis dum la unua jarcento de Esperanto - centoj, el preskaŭ ĉiuj landoj.

Strange, oni ne inkludis en la Serio Oriento-Okcidento la unikajn antologiojn de nacia literaturo, kiuj aperis en Esperanto en dekduo da landoj. Eniris tiun serion nur la libro "Elpafu la Sagon", la kolekto de kantoj el la evoluantaj landoj, elserĉita kaj tradukita de Tibor Sekelj, la jugoslava antropologo kaj esploristo.

Sed UEA akceptis nian Aŭstralian Antologion. Mi argumentis, ke tia antologio, kiu prezentas ekzemplojn de la verkado de multaj aŭtoroj (64 aperas en la A.A.) estas eĉ pli utila kontribuo al kultura interŝanĝo ol ununura elstara romano aŭ poemaro de unu nacia aŭtoro. Do ĝi partoprenas la kulturalan programon de UNESKO.

Kompreneble oni ankaŭ helpis internacian komprenon per tradukoj en la naciajn lingvojn, sed la esperantaj antologioj estas unika aro. Multaj estas el lingvoj kaj literaturoj ne multe konataj ekster la koncernaj landoj. Kiam mi iris al Svislando en 1953 kiel Ĝenerala Konsulo de Aŭstralio mi lernis pri la svisa literaturo en la germana, itala kaj romanĉa lingvoj pere de Svisa Antologio (mi jam scipovis la francan lingvon). Same pri la flandra kaj valona literaturo de Belgio mi legis en Esperanto en 1965, kiam mi fariĝis Ambasadoro en Bruselo.

La antologioj ne estas nur pli ampleksaj ol la tradukaĵoj en naciaj lingvoj, sed ili estas faritaj de personoj, kiuj vere amas kaj sian propran lingvon kaj nian "verdan" lingvon.

La Eksto kaj Evoluo de Internaciaj Etiko kaj Kulturo

Same kiel fruaj esploristoj, kiam ili raportis pri kanĉuruoj, estis nomitaj frenezuloj, ĉar tia besto ne povas ekzisti(!), tiel kelkfoje eĉ honestaj homoj, kiuj neniam rerkontis Esperanton, asertas, ke artefarita lingvo ne povas havi literaturon, ĉar la lingvo ne estas uzata de aparta komunumo.

^ Nu, mi scias, ke estas vigla kaj valora literaturo en Esperanto. Du tio provas, ke estas ja aparta internacia komunuo, kun speciala kulturo, kiu generis tiun literaturon? Mi kredas, ke jes, kaj ankaŭ ke tiuj internaciaj komunumo kaj etiko evoluas paralele kun la komunumo de la Esperanto-movado.

En sia grupo Fay Koppel, same kiel ŝi faris en pluraj Aŭstraliaj Kongresoj, prezentas la originalan Esperantan literaturon. Mi esperas, ke ĉiuj el vi ĝuas la legadon de la romanoj, poezio, eseoj, noveloj kaj aliaj verkoj de talentaj esperantaj aŭtoroj. Tio estas por konvinkita Esperantisto vera plezuro, eĉ se li/ŝi ne perfekte posedas la lingvon. Konatiĝo kun nia literaturo estas ofte la konvinka fakto, kiu persvadas homojn serioze tralerni Esperanton.

La demando, ĉu la originala Esperanta literaturo estas grava objekte, laŭ tutmondaj normoj, estas malfacila, ĉar nur spertulo pri literaturo kaj pri la esperanta lingvo povus ĝin taksi. Tamen mi observas, ke la komitato por aljuĝi Nobel-premiojn kutimas kompari la verkaron de aŭtoroj el multaj landoj ... verkaron, kiu ofte konsistas el multaj volumoj. Oni povas starigi kriteriojn, kiuj aplikiĝus ankaŭ al verkado en internacia lingvo. Ekzemple, ĉu la koncerna aŭtoro estas legata ekster sia propra lando, ĉu liaj verkoj estas tradukitaj en aliajn lingvojn ktp.

Mi ne atendas, ke oni akceptu mian propran takson, ke la plej bonaj esperantaj novelistoj, romanistoj, kaj poetoj ne suferas per komparo kun tiuj de kelkaj gajnintoj de la Nobel-premio, aŭ de la premio Booker (por romanoj verkita en la angla lingvo). Mi ne estas specialisto pri literaturo, kaj eble ionete neobjektiva! Ni apliku la testojn objektivajn.

Multaj verkoj en Esperanto ja estas tradukitaj en aliajn lingvojn. Laŭ "Esperanto en Persektivo" ĝis 1973 64 verkoj en Esperanto estis jam tradukitaj en 35 lingvojn, ĉefe orientajn. El tiuj 35 estis romanoj aŭ rakontoj. En la pasintaj 15 jaroj multaj aliaj libroj originale verkita en Esperanto tradukiĝis. Oni anoncis en ESPERANTO en la numero de decembro, 1988, ke la epopea poemo de William Auld, "La Infana Raso" estis tradukita en la hungaran. Kelkaj poemoj de Kalocsay estis tradukitaj en la anglan. Mi mem tradukis en la aŭstralian poemon de Ĉina esperantisto (Bathhouse), kiu aperis en la revuo REDOUBT de la Kanbera Kolegio de Supera Edukado.

Aliaj testoj estus: "Ĉu la verko estas represita?" kaj "Ĉu oni reeldonis la verkon post la morto de la aŭtoro?" kaj "Ĉu oni citas el la verko en alia verkado?" Laŭ tiuj testoj multaj literaturaĵoj estas valoraj laŭ tutmondaj normoj.

Oni povus paroli ankaŭ pri la uzado de Esperanto kiel pontlingvo por literaturo, same kiel por sciencaj kaj teknikaj verkoj. Yosimi Umeda promesis, ke li tradukos la esperantan version de "La Diplomato Kiu Ridis" en la japanan!

Sed ni devas reveni al niaj ŝafoj, kiel diras la francoj. La demando estas: ĉu tiu literaturo fontas el, kaj respiegulas, kiel faras kutime nacia literaturo, la kulturon de aparta komunumo, de interesa komunumo, de alloga komunumo?

Mia respondo estas: "Ja, jes!"

Kiaj Estas la Esperantaj Komunumo kaj Kulturo?

La Esperanta Komunumo estas tute nova fenomeno en la mondo... internacia komunumo ne ligita al aparta nacio, religio aŭ socia partio. Ĝi konsistas el centmiloj (ni ne debatu pri la preciza cifero) da homoj el ĉiuj kontinentoj, rasoj, naciecoj, ligitaj per lernado de la internacia lingvo. Ne multe gravas por kiuj celoj ili ĝin uzas - la uzado estas interkomunikado inter homoj de diversaj ŝtatoj, de diversaj kulturoj. Ne multe signifas, ĉu ili interesiĝas ĉefe pri religio aŭ pri poŝtmarkkolektado. Se ili komunikas kun personoj ne kiel samlandanoj, sed ĉar ili estas homoj, kaj se ili uzas la internacian lingvon sur bazo de egaleco, ili vole-nevole helpas pri la evoluigo de unika tutmonda komunumo.

Fakte, laŭ miaj sperto kaj observado, loĝinte en 10 diversaj landoj, preskaŭ ĉiam estas troveblaj en la vidpunkto de Esperantistoj, ĉu en Eŭropo aŭ Nord-Ameriko aŭ Sud-Ameriko, aŭ Afriko, aŭ Azio, aŭ Aŭstralio, komunaj trajtoj, ekzemple:

1. kompreno de la fakto, ke la ordinaraj homoj de ĉiu lando estas homaranoj, kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj;
2. kompreno de la fakto, ke, kvankam komence la kutimoj en aliaj

landoj ofte ŝajnas strangaj, kiam oni enketas senpere, amike, oni trovas, ke estas kialoj de la diferenco inter tiuj kutimoj kaj la niaj;

3. kompreno, ke la paco estas preskaŭ ĉiam bona, kaj ke la konflikto kaj la milito estas preskaŭ ĉiam malbonaj, ke solvo de disputoj per paca intertraktado estas preskaŭ ĉiam preferinda, kompare kun perforto, eĉ se onia nacio pravas!

4. kompreno, ke la mondo estas unueca, ke ĝiaj naturaj riĉaĵoj estas limigitaj, kaj ke la homaro devas protekti sian medion kaj konservi siajn nerenovigeblajn riĉaĵojn (ekzemple siajn aeron, arbarojn, grundon, petrolon kaj mineralojn);

5. kompreno, ke la ekzisto de nukleaj armiloj, kaj de kemiaj armiloj, kaj de grandaj stokoj de "tradiciaj armiloj" estas risko al la tuta homaro, kaj ke estas urĝe atingi interkonsenton por la forigo de nukleaj kaj kemiaj armiloj kaj la minimumigo de aliaj armiloj.

6. kompreno, ke la homaro bezonas - kaj espereble trovis bonan komencan fundamenton en la Deklaracio de Homaj Rajtoj - sistemon de internacia juro, kadron en kiu diversaj nacioj povas krei kaj administri nacian juron taŭgan en sia propra komunumo.

7. kompreno, ke super ĉio oni rajtas liberecon kontraŭ enkarcerigo pro paca politika agado;

8. kredo, ke libera interkomunikado helpas al la solvo de miskomprenoj kaj disputoj kaj tiel helpas eviti militon.

Kiel Oni Plibonigas, kaj Faras pli Alloga, tiun Internacian Kulturon?

La internacia "kerna kulturo" aŭ "kadra kulturo" espereble evoluos iomete ne nur en la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon, sed ankaŭ per la kresko de internaciaj kontaktoj per interpretistoj, per kunlaborado en UN kaj aliaj interŝtataj organizoj, ekzemple WFUNA aŭ Amnestio Internacia, aŭ per la internaciaj eklezioj.

Sed nia kredo, aŭ almenaŭ la mia, estas, ke per persona korespondado, per vizitoj kaj kunvenoj, kie ĉiuj povas esprimi siajn ideojn libere kaj egale, tiuj internaciaj etiko kaj etoso plej rapide kaj plej efike stariĝas.

Por plibonigi kaj plirapidigi tiun evoluon estas esence, ke ni celu la poluradon de la lingvo, la kompletigon de la terminaro de internacia kunlaborado. Estis tiucele, ke mi planas, kun la helpo de UEA, eldoni tekstaron de la dokumentoj de internaciaj rilatoj kaj de internacia kunlaborado. Mi jam donacis 2000 guldenojn al la Stipendia Fonduso por helpi junulojn partopreni en Pacifikaj Kongresoj, kie ili konatiĝos kun aliaj junuloj de nia regiono. Ni devas daŭrigi kaj intensigi individuajn kaj grupajn vojaĝadon. Ni devas subteni la verkantojn de libroj kaj gazetoj, kiuj agadas en la dissendado de ideoj. Ni devas montri, ke la Esperanto-komunumo estas vigla, vivoplena, ĝoja afero.

Sed ankaŭ ni devas samtempe informi la registarojn, kaj peti ilian helpon por projektoj, kiujn nur registaroj povas efektiviĝi. Ni ne devas ĉiumonate humile peti la aprobon de registaro - nia lingvo, kaj nia komunumo, memstare ekzistas kaj floras. Sed ni rajtas sugesti, de tempo al tempo, ke estus bone se la ŝtato helpus pri la instruado de evidente bonega lingvo, ĉu ne?

Mi ne kredas, ke mi vidas dum mia vivo tutmondan ŝtaton aŭ eĉ konfederacion, kun Esperanto kiel ĝia oficiala lingvo, aŭ dua lingvo. Sed mi ja observas, ke same kiel post la katastrofo de la Dua Mondmilito la popoloj de la mondo sin turnis al la organizo Unuiĝintaj Nacioj por savi estontajn generaciojn kontraŭ la plago de milito, same nun ili reiras al UN por trovi komunumon, kiu savu nian planedon de nova katastrofo. La Esperanto-movado povas provizi modelon por Unuiĝinta Mondo.

Ralph Harry

(Prelego en la Somerlernejo de AEA, Adelajdo, 1989)

...

LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO

anoncas ke la 1990 Nov-Zelanda Kongreso okazos 5-7 de januaro ĉe The Central Institute of Technology, en Heretaunga N.Z. Detalajn informojn de A. J. Knight, P.O. Box 41-172, St Lukes, Auckland 3, Nov-Zelando.

WINDOW ON THE WORLD

ESPERANTO CENTRE IN NIGERIA

The idea of starting a project of this nature was formulated in 1960 by three eminent Nigerians: P.F. Ononiwu, S.C. Anurigwo and C.I.G. Uhuegbu. The following year Anurigwo left for London, while Uhuegbu left for France. In 1983 Uhuegbu returned to Nigeria and discussed the Esperanto project with Sam Anurigwo and P.F. Ononiwu. On Dec. 1, 1985 the MGUM Research Centre was inaugurated in Orodo by the representative of the Iwo State Government, the then Commissioner for Information, Culture, Youth and Sports, Dr Linus U. Akunnakwe, and the two French representatives of the French embassy in Nigeria, Robert Rodriguez and Dominic Piquer. As a result of hard work and determination to reduce communication problems confronting mankind, and in an effort to foster unity both in and outside of the UN, the Centre was honoured nationally by the State Chairman's Honours Award of N.Y.S.C., presented by C.I.J. Unuegbu on behalf of the former Governor of Cross River State, Col. Dan P. Archibong.

Today P.F. Ononiwu through his untiring efforts for Esperanto has drawn the attention of the world to Orodo, which he has chosen to be the National Centre for the study of Esperanto. The dream of Nigerian Esperantists has come true.

Sam C. Anurigwo

(Extracted from a speech given on the occasion of a visit by a delegation of the British Esperanto Association, Jan. 12, 1989.)

...

FAX A HUNDRED YEARS OLD IN SEPTEMBER?

Well, not quite, but the closest thing to it! To celebrate the 100th anniversary of the first publication of an Esperanto journal, LA ESPERANTISTO, Sept. 1, 1889, a duplicate of that first issue will be made available by fax throughout the world, at the price of US\$10.00. Most companies, schools, and virtually all post offices in Australia have fax machines, so a copy is easily available to everyone. For details and orders, contact Roland Schnell, Laborgrupo "FAX", Möckernstr. 71, D-1000 Berlin 61, Germany. Please include your name, address, and fax number. (Contact your local post office if necessary.)

A BYTE OF THE APPLE

If you have an Apple Macintosh Computer, you may be interested to learn that an Esperanto course is available on disk for the Apple Mac. Titled "An Introduction to the International Language Esperanto: a HyperCard Text" by Michael Urban, 1988, it is suitable for the MacPlus onwards. The compiler has authorised copies. If interested, send a 3½" disk and stamped self-addressed mailing envelope to Nick Nicholas, 17 Renowden St, Cheltenham Vic 3192.

...

MELBOURNE RADIO

Radio 3ZZZ, 92.3 FM Stereo, has recently been established in Melbourne as an ethnic radio service. The Melbourne Esperantists have been successful in acquiring their own weekly Esperanto broadcast, Mondays from 12.45 - 1.00pm. The first program went to air on June 26. To our knowledge this is the first regular public Esperanto program in Australia. (There have been Esperanto radio courses in Esperanto previously, including the highly successful series "Jen Nia Mondo" in Perth a few years ago.) For details, please contact Svetislav Kanacki, 72 Jubilee St, Mt Waverley Vic 3149.

....

FOR THE PHILOSOPHICALLY MINDED

Retired professor of philosophy Evalco Pauli, in the city of Florianópolis, Brazil, had the dream of establishing a publishing house for philosophical works in Esperanto, concentrating on the classics and eventuating in an ambitious Philosophical Encyclopaedia. Now, seven years onward, his dream is being realised. On March 28, 1988, the legal statutes of the new Biblioteko Supera de Kulturo were formalised. Not one to wait quietly as bureaucracy takes its time, Prof. Pauli began publication of an Esperanto journal of philosophy, SIMPOZIO, which released its thirteenth issue in May of this year. Books too are a major objective. Philosophical typescripts are being collected, and photocopies made available to interested readers pending book publication. A translation of Plato's REPUBLIC into Esperanto from the Greek is one such manuscript currently being prepared by the editor of THE AUSTRALIAN ESPERANTIST.

THE JANUARY ESPERANTO CONGRESS IN MELBOURNE

The organisers of the forthcoming Congress in Melbourne are anxious to know whether there will be a need for a child-care service as a part of the Congress arrangements. If you plan to attend the Congress and would like to make use of such a service, would you kindly let the organisers know as soon as practicable? Also please indicate whether your children would require an English language or Esperanto environment. Address:

The Secretary, Local Congress Committee
124 Croydon Road, Croydon Vic 3136

CORRECTION

In our issue for January - February of this year the list of the UN's official languages was given incorrectly. The correct list reads: English, French, Chinese, Russian, Spanish and Arabic.

ESPERANTO PRIZES

Four major scholarship-prizes are to be awarded in Australia:

(1) \$1000 travel scholarship for the best young student beginning the study of Esperanto in winter this year, to be awarded in June 1990 for the purpose of travel to the International Esperanto Youth Congress in Kerkrade, Netherlands. The prize is made available by Mrs Idyss Einihovici. Applications and details from your local Esperanto group.

(2) The Esperanto Youth Travelling Fund I.E.J.O. established in honour of the late Dr Tim Einihovici to provide travel, lodging and other expenses for one Australian Esperantist Youth to represent Australia each year at the International Esperanto Youth Congress. Capital invested for this fund has now reached \$10 000. Applications and enquiries to Mrs Idyss Einihovici, 88 Newry St, Floreat Park WA 6014. Donations to the capital of the fund to be made payable to The Esperanto Youth Travelling Fund T.E.J.O. and may be sent to the same address.

(3) A special competition, for New South Wales only. An examination towards the end of this year will take place and the winning Esperanto student will be invited to participate in the Australian Esperanto Congress in Melbourne, January 1990, full expenses paid. Next year's award will be to enable the recipient to attend the Esperanto Summer

School. Details from the Esperanto Teachers' Federation, 143 Lawson St, Redfern NSW 2016. Or phone (02) 699 4775 and leave message on answering machine.

(4) Pacific Esperanto Congress: Retired Australian Ambassador to the UN Ralph Harry has established a fund to enable an Australian youth to participate in the Pacific Esperanto Congress held in alternate years (the next to be held in 1991), a congress of Esperantists living in countries in, bordering on, or close to the Pacific Ocean. For details, contact the Secretary of the Australian Esperanto Association, Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

THE INDUS VALLEY

"I spent almost a month with the Pakistani Esperantists... The Pakistan Esperanto Association has its centre in Multan, where the largest Esperanto group in Pakistan meets. Nearly every day local Esperantists gather in the shop owned by Muhammad Naeem Javaid, secretary of the P.E.A. Multan has the only regular Esperanto courses in Pakistan, led by P.E.A. president Amir Bashir Bhatti. He told me that the lack of a suitable textbook is causing many problems. They have only a booklet with the basics of Esperanto and - unfortunately - many mistakes. 'After the elementary course,' Amir told me, 'we can go no further, for we have no teaching materials'".

Translated from a report by Joachim Werdin,
published in the May issue of the U.E.A. journal Esperanto.

The teaching of Esperanto in third world countries is severely handicapped by the lack of textbooks, dictionaries, and reading material. The cost of publishing such books is prohibitive for most third world countries, and the cost of direct-method textbooks and dictionaries from other countries may often exceed a month's wages.

CHINA

The May issue of the official monthly EL POPOLA CINIO carried a full page commercial advertisement (for colour video tapes) for the first time. We can only hope that the recently very outspoken EL POPOLA CINIO will find its way around the newly toughened censorship laws.

PROVU VIAN VORTOSCION

1. Ĉu versiklo* estas
 - (a) verso sen ritma strukturo
 - (b) ŝvelaĵo sur la haŭto
 - (c) trirada veturilo

2. Ĉu muŝo estas
 - (a) malsanon portanta insekto
 - (b) hartufo ĉe la malsupra lipo
 - (c) diino inspiranta poetojn

3. Ĉu detergento* estas
 - (a) alta rango en mezepoka armeo
 - (b) armilo aŭ rimedo por persvadi malamikon ne ataki
 - (c) speco de sapo

4. Ĉu vipero estas
 - (a) aviadilo kapabla flugi pli rapide ol sonoj
 - (b) nun oficiala korekto de la mispresita vorto "vipuro" en la Fundamento
 - (c) anglismo signifanta "iomete grava persono" (el la angla VIP)

5. Ĉu ĝinzo* estas
 - (a) speco de tre fortika pantalone, plejofte blua
 - (b) ĉina medikamenta planto
 - (c) eretoj ĉe la DNA, la bazaj elementoj de heredo

6. Ĉu akurata estas
 - (a) ĝustatempa
 - (b) sen eraroj
 - (c) apartenanta al franca mezlernejo

7. Ĉu korekta estas
 - (a) sen eraroj
 - (b) rilatanta al kor-malsano
 - (c) foriganta erarojn

8. Ĉu korekturo* estas
 - (a) tre alta virina kantvoĉo
 - (b) elektronika aparato uzata en hospitaloj

(c) zamenhafa vorto kun la signifo "presprovaĵo"

9. Ĉu akĉento* estas

- (a) artefarita elemento (speco de metalo)
- (b) monsumo pagota al vi kiam vi retiriĝos
- (c) prononcmankon varianta laŭ onia etna lingvo

10. Ĉu arketipo* estas

- (a) baza elemento de pensado, respondanta al instinkto
- (b) persono kiu faras desegnan planon por konstruotaĵo
- (c) malneto de teksto korektota kaj presota

11. Ĉu aŭtentika estas

- (a) oficiale certigita
- (b) kreskanta nur en ombra pozicio (p.p.planto)
- (c) rilatanta al projektata elektra aŭtomobilo

12. Ĉu disidento* estas

- (a) persono kiu malakordas kun la oficiala ideologio
- (b) malharmonio de instrumentoj dum muzikludado
- (c) dividilo en arkivŝranko

13. Ĉu gamelano* estas

- (a) mikrobo kaŭzanta tuberkulozon
- (b) reprodukt-organismo (spermo, ovo)
- (c) speco de indonezia orkestro

14. Ĉu hapakso* estas

- (a) araba kamelspeco
- (b) vorto uzita nur unufoje
- (c) sako portata surdorse kun oniaj posedaĵoj

15. Ĉu picc* estas

- (a) birdo
- (b) fosilo uzata de arkeologoj
- (c) populara italdevena manĝaĵo

Respondoj sur paĝo 20.

*neoficiala vorto.

Vortoj kaj difinoj laŭ PIV kaj la Suplemento al PIV.

GURUKMUN, LA RANO

Antaŭ longe, longe, dum la Sonĝtempo, vivis granda, granda Rano, kiu nomiĝis Gurukman. Li certe estis la plej granda Rano en la tuta mondo, tiel granda ke, kiam li saltetis, li skuis la teron. Gurukmun ne loĝis en rivero aŭ golfeto ĉar estis neniu sufiĉe granda, kaj, plue, li ŝatis salteti sur la seka grundo.

Unu varmegan tagon, ĉiuj bestoj kuniĝis ĉe akvejo. Ili ĉirkaŭsidadis, babilante pri la varmega tago dum la etuloj ludis en la akvo. Subite ili aŭdis la bruon, kiun faris Gurukmun dum li saltetis al la akvejo. Bulumf! Bulumf! Bulumf!

La bestoj rigardadis dum li eksidigis sin apud la akvejo kaj komencis trinki. Li trinkis kaj trinkis kaj trinkis ĝis ĉiom de l' akvo elkonsumiĝis. Kie iam estis bela akvejo, nun estis nur granda, kota spaco!

Tiam forsaltetis Gurukmun por serĉi alian akvejon.

Nur unu akvejo ja ne sufiĉis por grandega Rano kiel Gurukmun. Plue li sentis sin soifega. Li saltetis ĝis li atingis riveron kaj li rekomencis trinki. Baldaŭ ĉiom de l' akvo en la rivero elkonsumiĝis!

Gurukmun frotis sian grandan, verdan ventron. Li ankoraŭ estis tre soifa, do li saltetis al la maro kaj rekomencis trinki.

Li trinkis kaj trinkis kaj trinkis. Kaj dum li trinkis lia ventro pligrandiĝis kaj pligrandiĝis. Kiam ĉiom de l' akvo en la maro estis elkonsumita, Gurukmun ankoraŭ estis soifa!

La bestoj komencis maltrankviliĝi. Gurukmun trinkadis ĉiom de ilia akvo, baldaŭ restos neniom. Ili rigardis dum Gurukmun iris de rivero al lago al akvejo. eltrinkante ĉiun ĝis ĝi estis seka. Kaj li ne ĉesis ĝis ĉiom de l' akvo en la tuta mondo elkonsumiĝis. Ĉiom estis en lia grandega, verda ventro!

Poste, Gurukmun, kun ĉiom de l' akvo de la tuta mondo en si, alsaltetis malrapide la supron de grandega monto. Kaj tie li sidadis, superrigardante la sekan, brunan landon.

La aliaj bestoj ege maltrankviliĝis. Nun ili havis nenion ajn por trinki kaj estis neniom da akvo por la arboj kaj la herbo. Gurukmun ĉion forprenis. Kion fari?

Emuo kaj Goano iris por konsulti saĝan, maljunan Vombaton:

"Vombato, estas neniom da akvo. Gurukmun ĉiom havas, kaj se ni ne rehavigos ĝin, ni ĉiuj mortos."

Vombato aranĝis kunvenon. Ĉiuj bestoj amasiĝis malsupre de la monto de Gurukmun. Kukaburo suprenflugis al Gurukmun por peti lin redoni iom da akvo:

"Kokara, kuk, kuk, kuk! Gurukmun, vi ja ne bezonas ĉiom de l'akvo. Ne estu avida. Kial vi ne disdividas la akvon inter ni ĉiuj?"

Sed Gurukmun nur sidadis tie, granda kaj dika kaj verda. Li posedis ĉiom de l' akvo kaj li ne intencis fordoni ĝin.

Kiamaniere ili rehavigu la akvon? Posumo sugestis ke ili timigu lin. Se Gurukmun ektimus, do li eble eltusus iom da akvo. Sed kiamaniere oni timigus la plej grandan Ranon de la tuta mondo? Goano opiniis ke se iu tiklus la nazon de Gurukmun, li eble elternus iom da akvo. Sed kiamaniere atingi lian nazon? Tiel alta ĝi estas! Kaj, ĉiaokaze, eble li ne estas tikliĝema.

Tiam saĝa, maljuna vombato havis ideon.

"Ĉu ni ridigu lin? Se Gurukmun ridus, do certe ĉiom de l' akvo elŝprucus."

La bestoj pripensadis. Estis la plej bona ideo kaj se ili ne faros ion baldaŭ, ili ĉiuj ŝrumpas kaj mortos. Tial ili decidiĝis. Ili ridigos lin.

Unue Kukaburo provos. Li diros al Gurukmun siajn plej amuzajn ŝercojn - sencube li ridos je ili - ĉiam ili ridigos Kukaburojn. Li suprenflugis al Gurukmun.

Ĉu vi aŭdis la ŝercon pri kuk-kuka-kuk-u-a-kuk-kuk?"

Kukaburo batis la azeron per siaj flugiloj kaj ridis el la tuta gorĝo. Sed Gurukmun ne ridis. Li nur sidadis kaj ĉiom de l' akvo estis en lia granda, dika ventro.

Emuo decidis provi:

"Mi faros mian plej amuzan ir-manieron. Sendube tio ridigos lin."

Emuo pevis al la Rano. Li ĉirkaŭpavadis, lia longa kolo serpentumis tien kaj reen, liaj brunaj okuloj turniĝadis. La aliaj bestoj kredis ke estas tre amuze, kaj la larmoj fluis laŭ iliaj vizaĝoj. Eĉ Emuo komencis ridi.

Sed Gurukmun ja ne ridis. Li nur sidadis. Tiam Kanguruo ekhavis ideon:

"Amuzajn saltetojn! Jen la solvo! Mi povas fari la plej bonajn, amuzajn saltetojn en la tuta lando!"

Do li saltetis al la Rano:

"Ĉu vi estas preta, Rano? Nu, jen la plej amuzaj saltetoj. kiujn vi iam vidis."

Kaj Kanguruo komencis ĉirkaŭsalteti. Flankajn saltetojn, malgrandajn saltetojn, saltegojn, eĉ retro-saltetojn. Li estis nur ĵus komencinta sian plej grandan salton, kiam li paŝis en truon kaj falis sur la teron, kun la vizaĝo en la polvo. La aliaj bestoj ridegis. Kanguruo aspektis tiel idiota, kuŝante kun la vizaĝo en la polvo. Sed la Rano ne ridis.

La bestoj ne sciis kion fari. Eble Ranoj neniam ridas.

"Jes, Ranoj ja ridas! Mi vidis ilin. Ĉiam, kiam pluvas. Kaj mi devas scii."

Estis maljuna Nabunum la Angilo. Ĝis la antaŭo de la kurveno li tordiĝis. La pigoj komencis subridaĉi. Li aspektis tiel amuza, sur la seka tero. Nabunum furioze rigardis ilin.

"Kiun vi kredas tiel amuza? Se iu forprenus la arbojn, vi ne kredus tion amuza! Mi montros al vi, kiel ridigi ĉi tiun Ranon. Kaj li tiom ridos ke ĉiom de l' akvo elvenos."

Do Nabunum tordiĝis al Gurukmun. Kaj li komencis danci. Li ja aspektis idiota! Maljuna Angilo, ĉirkaŭtordiĝanta, penante danci same kiel Brnlg.

Gurukmun alrigardis la maljunan Angilon malsupran. Naburum tordiĝadis kaj serpentumis, li volviĝadis kaj rampadis. Li bukliĝis kaj malbuklis sin, kaj subite li ĉesis. Li tiel implikiĝis ke li ne plu povis movi sin!

La bestoj ekridis. Vombato ruliĝis en la polvo. Maljuna Nabunum tute nodiĝinta! Jen la plej amuza afero kiun ili iam vidis.

Subite la bestoj aŭdis ion. Grandegan, gluglan bruon. Ili supren rigardis kaj jen Gurukmun. Lia granda, verda vizaĝo larĝe ridetis. Nabunum baraktis por malnodigi sin kaj, dum li baraktis, Gurukmun komencis ridi. Gigantajn ridojn! Kaj dum li ridegis, la akvo komencis elveni el lia granda buŝego.

"Mi estis prava, mi estis prava! Jen nia akvo!"

Kaj Gurukmun tiom ridis, ke ĉiom de l' akvo refluis por replenigi la marojn, la lagojn, la riverojn, la golfetojn, la lagunojn kaj la akvejojn. La bestoj ekkuris al maljuna Nabunum por malimpliki lin.

"Dankon, Nabunum, via amuza darco savis nin ĉiujn!"

Kaj Gurukmun, la avida Rano, saltetis for kaj oni nenian plu vidis lin.

Aborigena folkloro
tr. David Poulsen

RESPONDOJ AL KONKURSO 1

Nur du personoj alsendis respondojn por la konkurso pri longaj vortoj, do neniuj premioj aljuĝiĝis. Jen la plej elstaraj sugestoj: Antaŭsurvide-obendiĝitajn (25 literoj, dankon Vera Payne), kaj Grandurbcentrotrafik-stopiaĵojn (28 literoj, dankon Ruth Morrison).

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

1.a; 2.b; 3.c; 4.b; 5.a; 6.a; 7.c; 8.c; 9.c; 10.a; 11.a; 12.a; 13.c; 14.b; 15.c. Noto: "ĝinzo" ne estas en PIV nek PIV-Sup, sed bezonatas.

KRITIKO PRI LA VORTARO DE J. C. WELLS

Kriterioj por prijuĝi neologismojn tazitajn sur anglaj etimoj

Kelkaj redaktoroj de lingvaj rubrikoj montras per sia malfavora kritiko de certaj neologismoj, ke ili estas obsedataj pro la uzo de novaj vortoj en Esperanto, kiuj devenas de la angla lingvo. Miaopinie oni ne rajtas obĵeti kontraŭ neologismoj transprenitaj el la angla lingvo se (1) ili estas bezonataj por esprimi nocion, kiun neniu alia vorto en la lingvo kapablas precize fari, (2) ili estas asimilitaj en racia maniero laŭ konsekvencaj esperantologiaj principoj, kaj (3) ili estas adekvate glositaj de la enkondukantoj kun la celo pravigi la uzon en Esperanto.

Ofte okazas, ke neologismofobiuloj, por montri, ke la koncernaj novismoj ne estas bezonataj, citas tradukojn de la anglaj vortoj en THE E.U.P. ESPERANTO AND ENGLISH DICTIONARY de J. C. Wells (Londono, 1969, 419p.). Dum preskaŭ du jardekoj mi konstante konsultis tiun verkon kaj trovis ĝin misgvida kaj mankhava. Mi jam kunmetis liston da anglaj vortoj ne apartenantaj al la literatura kaj faka lingvo-terenoj, kiuj mankas en la menciita vortaro. Ekzemple, estas nekompreneble, kial eĉ poŝformata angla-esperanta vortaro ne registras leap-year (nek ĉe leap nek ĉe year) sed enhavas la malpli oftan leap-frog! Tiu manko estas nepardonbla, ĉar tri pli malnovaj anglaj-esperantaj vortaroj ne preteratentis tiun vorton: Fulcher kaj Long (1963), Edinburgh (1950) kaj J. Rhodes (1908). Trafoliumante la vortaron de Wells oni vane serĉos inter pluraj aliaj vortoj de la ĉiutaga lingvo mumble, bookmark-(er), downtown, slippery, run over (tri signifoj!). Kiel klarigi, ke Wells registras shambles kaj abbatoir (franca vorto!) sed ne la ĉiutagan slaughter-house?

Se paroli pri house, la sekva ekzemplo montras, kiel Wells misgvidas uzantojn de lia vortaro. Li tradukas house per nur unu esperanta vorto: "domo". Tio signifas, ke tute ne eblas ĝuste traduki la sekvajn esprimojn: (1) House of Commons, (2) a full house (teatro), (3) the house of Tudor, kaj (4) the house of Rothschild.

Wells malŝparas valoran spacon en sia vortaro, registrante la vorton dowsing. Li eĉ ne adekvate tradukas ĝin, uzante nur la terminon "radiestezo" anstataŭ "rabdismo" aŭ "rabdomancio". Sed li forgesis inkludi la nomon de pli grava ilo apartenanta, ne al la pseŭdoscienco,

sed al la scienco: lightning rod/lightning conductor.

La nuntempa kultura lingvo de Esperantujo

La kultura lingvo uzata de bone edukitaj esperantistoj spegulas la kulturen nivelon de etnolingvoj. Kiu komprenas la psikologian signifon de vortoj kiel stress kaj psychosomatic en la angla lingvo, apenaŭ povas obĵeti kontraŭ la esperantaj vortoj "streso" kaj "psikosomata". Ili ja estas fakaj terminoj en ambaŭ lingvoj. La tradukoj de stress en la vortaro de Wells -- "urĝo", "premo", "streĉo" -- konvenas nur por la komunza lingvo. Ankaŭ la traduko "print-" estas bezonata en Esperanto, ĉar nek photographic print nek blue-print estas "presita bildo" laŭ la traduko de Wells. Jam en 1956 D. R. Duncan diferencigis "presi" disde "printi" en sia ENGLISH-ESPERANTO CHEMICAL DICTIONARY.

Ankoraŭ unu neologismo, kiu estis kritikita, estas "rehabiliti", ĉar oni opinias, ke adekvata ekvalento estas "rehejmigi", kiu troviĝas en la vortaro de Wells. Tute ne! "Rehabiliti", krom esti komunza vorto, estas termino apartenanta al du diversaj fakoj, la juro kaj la medicino. Wells ne indikas tiujn fakajn nuancojn. (Ankaŭ la registro en la SUPLEMENTO de PLENA ILUSTRITA VORTARO (1987) estas malkompleta, ĉar ĝi difinas nur la juran uzon de "rehabiliti".)

Konkludo

La vortaro de Wells estis eldonita la unuan fojon en 1969. Du jardekoj forpasis, sed tiu konsultlibro estis nek reviziita nek pliampleksigita -- nur represita (la sepa represio okazis en 1983). Estas evidente, ke nova angla-esperanta vortaro estas bezonata, kiu spegulas la riĉecon de ambaŭ lingvoj, kaj kiu estos utila ne nur al komencaj lernantoj de Esperanto sed ankaŭ al fakuloj kaj literaturistoj. Guste tia vortaro -- pli ol milpaĝa -- estas nuntempe kompilata en Usono kun la titolo COMPREHENSIVE ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY. Mi tre scivolas, kiel ĝi influos sur la lingvouzon de angleparolantaj esperantistoj.

Berrard Golden
 Damjanich u. 1/C. I. 88.
 H-8200 Veszprém
 Hungario

RECENZO

An Introduction to the International Language Esperanto: a HyperCard Text for the Macintosh (ekde MacPlus), preparita de Michael Urban, 1988

Longtempe la komputiloj kaj la instruado de lingvoj estis du apartaj fakoj. Tamen nun oni ekspluatas la novan potencon ricevitan per tiuj maŝinoj, por helpi al la ĝenerala klerigo de la komputil-uzantaro - aro, kiu pli-malpli frue inkluzivos ĉiujn.

Tiurilate venis al mi granda kaj plezuriga surprizo, kiam mi hazarde trovis en mia universitata komputila reto ĉi tiun Esperanto-kurson. Kiel menciite, ĝi estas HyperCarda teksto: HyperCard estas sistemo iom simila al elektronika notlibro, kiun oni povas "foliumi", demandi, enskribi (krom se la komputilaj aŭtoritatuloj ĉe vi malpermesas) ktp. Ĝi estas ideala por projekto kia lingvinstruado, kaj la Macintoshoj estas inter la plej popularaj seriozaj komputiloj en la mondo, do la utilo de tia kurso evidentas. S-ro Urban enskribas, ke kopiado de lia "stack" ("amaso" da "kartoj") estas permesata, kun fontindiko, do se oni volas disvastigi ĉi tiun kurson, oni sendu 3,5-colan diskon kaj koverton al mi, ĉe 17 Renowden St, Cheltenham Vic 3192.

Nun restas por mi nur tio, ke mi recenzu ĝin. Nu, unue mi traktu la malbonajn punktojn: diversaj trajtoj de la teknika flanko de la programo montriĝis malpli ol idealaj, kvankam pro tio probable ne kulpas la aŭtoro de la programo. Unue: La programo abunde petas, ke oni entajpu esperantigojn de anglalingvaj frazetoj - sed mia komputilreto malpermesis tion, eble pro timo, ke oni malice ŝanĝos ĉiujn aliajn "amasojn" en la komputiloj. Due: la programo teorie kapablas paroli - voĉigi entajpitajn vortojn esperante. Mi esperantis, sed ĝi ne parolis al mi. Kiam mi lastafoje vidis la programon, ĝi ankaŭ misalineigis multajn esperantajn vortojn, se ene de anglalingva teksto: ŝajne ĝi ĉesigis tiun miskonduton nun. Se vi ĝin ricevos, preĝu ke ankaŭ via sistemo - kaj via HyperCard programo - kondutos bone.

Nun al la bonaj punktoj - kaj da ili estas multe. La kurso estas gramatike kompleta kaj ĝustgrade analizema; ĝi trairas la dekse regulojn, kaj dornajn aferojn kiel transitivecon kaj refleksivojn ĝi traktas adekvate. Sed tio estas nur la komenco: Urban vere scipovas plej bone uzi teknikajn ĝuindaĵojn, por malplipezigi la gramatikon - abundas bildoj, kies partojn oni "musumas" (klikas per la aparato muso) por vidi iliajn esperantlingvajn nomojn. Por familianoj (avo, bofrato,

ktp), li uzas amuzan portretaron; por korpopartoj, li uzis bildojn de... Jean Harlow kaj Bobby Paris! Oni ankaŭ abunde uzis esperantlingvajn tekstetojn (ekde "Ho mia kor!" ĝis lastatempa sciencfikcio), kies angligojn oni povas vidi per musumo. Kaj krom la teknika kompetenteco montrita, li ankaŭ montras tre plaĉan seriozecon rilate la socian flankon de esperantismo: liaj enkondukaj komentoj estas ne la kutimaj troentuziasmaj evangelieskaĵoj, sed maturaj kaj honeste prezentitaj, kun neniom de tiu embarasa ekscentrismo, kiun Lapenna tiom malestimis.

Sed ĉi tiu kurso estas ne nur bona: ĝi superas la librajn kursojn en gravaj aspektoj, tiom, ke mi jam deziras, ke mi estus lerninta la lingvon per ĝi. Ekzemplas la kromtekstaj pritraktoj (vidataj nur musumite) de punktoj tro ofte ellasataj el kursoj: ĉu la Orwella "Newspeak" satiris la esperantlingvan vortfaradon? (Probable ne); kie loki la vorton "ne"; kiun vorton vi povas uzi, se la vorto "farti" ĝenas al vi; kiun vorton vi povas uzi, se vi volas ĝeni tiun, al kiu ĝenis la vorto "farti" ("Enquiring minds want to know"); la kazo post "kiel"; prava/ĝusta/rajta/korekta; gaja/geja; kaj kompreneble, tute apokrifaj alineoj (laŭvole spektebla: "Nice people can read on with their sensibilities intact") pri fivortoj.

Sed la distinga ĉarmo de ĉi tiu kurso estas la supremenciitaj frazetoj, kiujn la kursano devas traduki, aŭ kiuj prezentas ekzemplojn pri gramatikaj punktoj. Ili estas mirigaj! "La komputilo havas katon; kato manĝas la verdajn seĝojn; granda planto manĝis la muson; la muso manĝis miajn librojn; mi malamas blujn komputilojn; manĝi dekdu tapiŝetojn estas malbele; tamen, la komputilo foriros; estu la Forteco kun vi (May the Force be with you!!); mi volus vidi verdan sunon; eniru la hundo!; ties edzo estas malbela; tiu porko estas stulta; lia buŝo estas tiel granda, ke oni povas enmeti la kapon; komputiloj estas ĉie; tio estas ĉial stulta; ni neniel atendas tiun malbelan porkon; kuru! Estas mia eksedzo; dronigi hundojn interesas min (!)".

Kion diri post ĉi ĉio? Temas pri bona kurso; se vi havas aliron al Mac-reto, nepre akiru ĝin de mi kaj disvastigu ĝin. Gratulojn al Michael Urban pro io, kio, sentroige, montriĝas granda servo al Esperanto.

Niĉjo Nicholas

...

Ni reatentigas ke Tom Elliott (AEA libroservo) povas disponigi tajpo-programojn por la esperanta alfabeto por Epsom-kompatiblaj printiloj.

NOVAJ LIBROJ

^
 Ĉi-sekve estas listo de libroj suplementanta la katalogon 1988 kaj la suplementon en la Adresaro-Jarlibro de AEA p.60-62. Ĉiuj estas haveblaj de la Libroservo de AEA, Box 230, Matraville NSW 2036.

- 602: 5000 Jaroj de Ĉinio, de Caŭ Bajlong. 380p. \$6.70. (Historilibro)
 754: Aldono to English Phrases & Expressions, de Felix Woolfc. 52p. \$6.75
 15: Anaseto kaj Koketo, de Ging Hŭang. 26p. \$1.10. (Porinfana libro)
 6: Angla Antologio, vol.2, red. William Auld. 432p. \$22.00. (De la jaroj 1800-1960)
 307: Aventuroj de Casisteto dum Ekspediciado, de Cen Sjaŭji. 80p. \$2.90 (Romano pri ĉangalaventuroj, por junuloj)
 180: Bestidoj kaj Iliaj Patrinoj, de Jiming Gang. 18p. \$1.20. Porinfana bildlibro)
 698: La Bufo, de Sylla Chaves. \$7.00. (Kantodisko, 33rpm)
 835: Danĝera Ul', de Ĵak Lepŭil. \$16.00. (Kasedo, kun libro)
 696: De Pont-Aven ĝis Varsovio, de Ĵak Lepŭil. \$16.00. (Kasedo, kun libro)
 102. Elektitaj Eroj, de Nikolaj Rytjkov. \$10.80. (Kantkasedo)
 129: Esperanto en Perspektivo, de Ivo Lapenna. 876p., \$69.00.
 526. Grandaj Pandoj - Brilaj Steloj, de Geng Soŭĝong. 48p. \$3.90. (Porinfana bildlibro.)
 81. Horo da Opozicio, de Ganfrank Guljo. \$16.00. (Kantkasedo kun libro)
 463. Imagu, de John Douglas. \$14.00. (Kantkasedo)
 647. Kantu kaj Lenu, de Sylla Chaves. (Disko, 33rpm). \$8.20
 416. Karnavalo en Rio, de Huberto Rohden. (Disko, 33rpm.) \$8.20
 7. Kontakto, de Ganfranko Mole. \$16.00. (Kantkasedo kun libro)
 287. Malgranda Rano Flugis kaj Falis, de Gi Ĝjun Gang. 20p. \$1.20. (Porinfana bildlibro)
 355. Paco, Amo kaj Naturo, de Sylla Chaves. \$8.50 (disko 33rpm)
 491. Plena Ilustrita Vortaro kun suplemento kunbindita. \$98.00
 109. Revenas Mi kun Libro, de Ĵak Lepŭil. \$16.00. (Kantkasedo kun libro)
 322. Urseto Ekkonis Sian Eraron, de Lin Songjing. 20p. \$1.20. (Porinfana bildlibro)
 95. Venas Liber', de Ĵak Lepŭil. \$16.00. (Kantkasedo, kun libro)
 90. La Vojo, de Ganfranko Mole. \$16.00. (Kantkasedo, kun libro)
-

REGULA ESPERANTO-PROGRAMO EN MELBURNA RADIO

Post sesjara batalado fare de la etnadevenaj grupoj en Melburno por ricevi permeson havi propran radio-stacion, sukceso! La 18an de junio la nova radio-stacio inaŭguriĝis - Radio 3ZZZ (92.3 FM Stereofonia). Gratulinda strebado de Svetislav Kanaĉki kaj Ges-roj Tumman rezultigis la formiĝon de grupo "Radio-Amikoj de Esperanto" kun la 25 membroj necesaj por ricevi permeson aŭdigi regulan Esperanto-programon per tiu stacio. La nova programo havas la titolon "Loĝas en Aŭstralio", kaj jam la unua elsendo okazis la 26an de junio. La tempo de la dissendoj estas lunde 12.45 ĝis 1.00 pm. Nun la "Radio-Amikoj" petas al ĉiuj gesamideanoj kunlabori per alsendo de artikoloj por la programo. Gramofondiskoj kaj sonbendoj estos ankaŭ tre bonvenaj. Atentu ke prezentaĵo devos daŭri inter tri kaj ses minutoj. Adreso por alsendaĵoj demandoj kaj detaloj: Svetislav Kanaĉki, 72 Jubilee St, Mt Waverley Vic 3149. Al la programo kaj ties iniciantintoj ni esprimas niajn plej varmajn elkorajn gratulojn kaj bondezirojn.

...

RESPONDOJ POR KONKURSO NUMERO 2

Atingis nin neniu ĝusta respondo por konkurso numero 2 (januar-februara TAE 1989): "Meredith Willson komponis la plej longan unufrazan kanton en la angla lingvo. Kiu povas nomi por ni tiun kanton kaj traduki ĝian tekston Esperanten?" En sia aŭtobiografio AND THERE I STOOD WITH MY PICCOLO Meredith Willson atribuis tiun rekordon al la kanto "You and I", populara ĉ. la 1950oj.

...

KONKURSO NUMERO 3

Vi scias ke la esperanta verbsistemo sekvas la ordon de la vokaloj en la alfabeto: -as, --, -is, -os, -us. Kial mankas -es en tiu grupo? Por la unua ĝusta respondo atinginta la redaktoron antaŭ la 1a de septembro estos libropremio. La respondantoj devos ankaŭ indiki aŭtoritatan referencon kie ili trovis la respondon.

...

AEA BIBLIOTEKO

Dum la vintra paŭzo de klubkunveno, membroj de la Kanbera Esperanto-Klubo laboros por kompletigi la katalogon de la Biblioteko de AEA kaj listigi duoblaĵojn donaceblajn al aliaj Esperanto-bibliotekoj.

LA KONGRESO EN MELBURNO

Dum vi partoprenos en la venonta januara kongreso en Melburno, ĉu vi bezonas utiligi infanzorgan servon (ĉu en anglalingva, ĉu en esperant-lingva etoso)? La organizanta komitato de la Kongreso bezonas kiel eble plej frue informiĝi pri tio por fari taŭgan organizaranĝon. Se vi deziros utiligi tian servon, bonvolu informi tuj kiam eble al la LKK. Adreso: Loka Kongresa Komitato, 124 Croydon Road, Croydon Vic 3166.

...

KORESPONDPETOJ EL POLLANDO KAJ SOVETIO

Pli ol kvindek korespondpetoj atingis nian asocion, de esperantistoj en Pollando kaj Sovetio. Kiu deziras korespondamikon bonvolu kontakti la sekretarion de AEA, Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109. Tri petoj sekvas. Multaj aliaj haveblas:

Mirosława Bak, 62-585 Sławsk 30, Pollando. (22jara virino interesata pri muziko, pentroarto, kino, literaturo.)

Iwona Kaczor, Ul. Zawadzkiego 22/129, 43-100 Tychy, Pollando. (20jara studentino, interesata pri historio, sporto, muziko, literaturo, k.c.)

Leskawa Wójcik, Ul. Warszawska 238, 43-155 Tychy-Bieruńnowy, Pollando. (36jara instruistino, interesata pri ĉiutagaj problemoj, historio, literaturo kaj fantaziliteraturo, bildkartoj, libroj. Deziras korespondi kun geinstruistoj.)

...

KOREKTOJ

Sur p.22 de la maj-junie numero, 4 linioj de malsupre, legu 10 000 enoj, ne mil enoj.

En la kongreslisto p.26-27 bonvolu noti ke R kaj P Ross (numeroj 15 & 17) estas de Qld, do 7 NSW kaj 5 Qld.

Ni elkore petas pardonon pro tio, ke la tre atentinda verko de Trevor Steele, "La Turisto" ne estis indikita en la enhavtabelo sur la kovrilpaĝo de la maj-junia numero.

...


La kapitalo de The Esperanto Youth Travelling Fund T.E.J.O. nun atingis \$10 000, sed pli estas bezonata. - Pro manko de taŭga kandidato la speciala \$1000-premio ne estis aljuĝista, kaj restos por 1990.

The Australian Esperantist

Numero 255

MAJO-JUNIO 1989

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



De la redaktoro...p.3

Recenzo: Itala Antologio...p.4

Poemoj: Alarmo, Ek de l' buŝo, Plendokanto...p.8

Atentigoj...p.11

Provu vian vortoscion...p.14

Por tiu, kiu ne komprenas komputilojn;
letero; recenzo: Infoduktoj...p.16

La unua sunleviĝo...p.23

Kongreslisto, diversaj esperantist-
aj informoj...p.27

English Supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST
Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Telefono: (09) 574 1307.

Prezidanto: S-ro Trevor Steele, 7 O'Callaghan St, Holland Park QLD 4121.

Vicprezidantoj: S-ino Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.
 Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: S-ro Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: S-ro Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: S-ro Owen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-servo: S-ro T. Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Membreco: \$25, por individuo, klubo, aŭ federacio; \$5 por aldona familiano ĉe la sama adreso; \$15 (minimumo) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adreŝlipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdatoj por alsendo de presotaĵoj: la 1a de julio, septembro, novembro, januaro, marto, majo.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO
verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST, "ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu al ni tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston, bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita, kun duobla spaco inter la linioj, kaj marĝenoj de almenaŭ 2 centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaj tekstoj estos malakceptitaj. Por konservi la lingvonivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas lingve korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Se la disponebla spaco aŭ la stilo de la verko necesigos tion, la verko povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri kronologie urĝaj tekstoj. Ankaŭ anglalingvajn tekstojn por la angla suplemento ni bonvenigos.

DE LA REDAKTORO

Al ĉiuj niaj legantoj mi deziras esprimi elkoran dankon pro la tre entuziasma akcepto de la novaj formoj kaj enhavo de The Australian Esperantist. Mi ne anticipis tiel fervoran pozitivan reagon, nek la inundon da artikoloj por aperigo en TAE. Alvenis tiom da verkoj, ke mi malfacile povas elekti la plej frue aperigendajn. Ankaŭ min tre plezurigas la alta lingvonivelo de la plej multaj verkoj. Bonvolu daŭrigi la alsendon. Komprenu ke se via verko ne tuj aperas, tio ne signifas ke mi malalte taksas ĝin, sed nur ke ne ekzistis sufiĉa spaco en la koncerna numero de TAE por inde prezenti ĝin. TAE ja estas via gazeto, kaj ni volas kiel eble plej variajn artikolojn de kiel eble plej multaj legantoj.

Ni ricevis multajn kritikojn pri la kovril-desegno de TAE. La desegno sur la januara kaj la marta numeroj estis difekta pro eraro kiu ŝokis la desegninton mem kiam ŝi vidis ĝin. Sed multaj personoj petis tute alian desegnon, kaj mi komisiis alian artiston pretigi pli taŭgan.

Mi deziras averti ĉiun leganton, ke, kiel rilate al ĉiu gazeto, la aperigo de individua artikolo ne nepre signifas ke la redakoro aŭ la eldonanto akordas kun ĝia enhavo. (Nek ke ili malakordas!)

Plezurigas min povi anonci ke pluraj gesamideanoj sukcesis en la Esperanto-Ekzamenoj de AEA. Jen listo:

En la KLERECA EKZAMENO:

Marjorie Ellyard

En la ELEMENTA EKZAMENO:

David Brewer (Tasmanio)

Stanley Bruton (**kun honoro.** Tasmanio)

Dianne Lukes (Kvinslando)

Dudley Parkinson (**kun honoro.** Tasmanio)

Max Wearing (**kun honoro.** Suda Aŭstralio)

Gratulojn al ĉiuj nome de la AEA.

Laste, mi deziras ricevi komentojn de la legantoj pri la nova formo de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST. En ĉi tiu numero ni uzas alian stilon de literoj, laŭ peto de pluraj legantoj. Bonvolu sendi vian takson, ne nur pri la aspekto sed ankaŭ pri la enhavo.

RECENZO

Itala Antologio, red. Giordano Azzi. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1987; 477p., broŝurita. \$30 de la AEA Libroservo.

Por taksi antologion de nacia literaturo tradukita en Esperanton estas utile, aldone al subjektivaj impresoj, kompari ĝin kun antologioj de aliaj landoj.

Preparante la **Aŭstralian Antologion**, la redaktoro kompreneble studadis jam eldonitajn kompareblajn verkojn - ilian elekton de aŭtoroj, iliajn historiajn enkondukojn, la biografiajn notojn, la bildojn kaj vinjetojn, la glosarojn kaj indeksojn. Li havis precedentojn kaj modelojn. Sed li kaj liaj kunlaborantoj ofte devis akcepti kompromisojn, kaj solvi unikajn problemojn pro la fakto, ke neniam antaŭe aperis ampleksa antologio de tiel "juna" literaturo. Ne ekzistas antologio de kanada, aŭ novzelanda, eĉ de usona literaturo. Alan Towsey, same kiel lia libro, estis ja pioniro.

En la sama semajno, kiam mi legis la recenzon de David Poulson (THE AUSTRALIAN ESPERANTIST, januaro-februaro, 1989) mi ricevis la Italan Antologion, projektitan de LITERATURA MONDO en 1934, kaj eldonitan en la jaro de nia Jubileo de Esperanto, 1987! En ĝi troviĝas poemoj, noveloj kaj diversaj fragmentoj de 73 aŭtoroj, esperantigitaj de 29 tradukintoj. Jen interesa komparo kun nia sperto en la antipodoj.

La Itala Esperanto-Federacio akceptis la planon de sia redaktoro, komisiita en 1956, prepari antologion aranĝitan laŭ jarcentoj - de la 13a ĝis la 19a inkluzive - kun enkondukoj al ĉiu jarcento kaj al ĉiu aŭtoro, kaj kun piednotoj "por ke la leganto povu kiel eble plej bone kompreni la tekstojn".

La Aŭstralia Antologio, tute sendepende, ankaŭ sekvis ĉefe kronologian sistemon. Sed oni decidis inkludi ankaŭ verkojn de la 20a jarcento - fakte ĝi ampleksas la tutan gamon de nia historio, ekde legendo de la sonĝepoko ĝis poemo de Andrew Lansdown, kiu naskiĝis en 1954. La inkludo de vivantaj kaj ĵus mortintaj aŭtoroj necesigis la akiron de eldonpermesoj. Multaj aŭtoroj afable donis permeson senpage aŭ kontraŭ simbola sumo. Sed kelkaj, inter ili la reprezentantoj de Randolph Stow, postulis "komercan" monon, aŭ ne respondis, aŭ simple rifuzis permeson. La kelkafoje amuzaj reagoj de aŭtoroj povus esti temo

de eseo!

Ĉe "moderna" antologio la elekto de aŭtoroj kaj de la inkludotaj pecoj estas malfacila. Post ses jarcentoj la historio kribras la kandidatojn. Tamen eĉ la italoj havis kelkajn problemojn tiurilate.

Malmultaj plendus pro la enmeto de "La Kantiko de la Kreitaĵoj" de San Francesco d'Assisi por reprezenti la 13an jarcenton, aŭ de elĉerpaĵoj el la **Dia Komedio** de Dante Alighieri, poemoj de Francesco Petrarca kaj noveloj de Giovanni Boccaccio (el **Dekamerono**) kvankam tiuj verkoj estas jam tradukitaj en multajn lingvojn, inter ili la angla. Lorenzo il Magnifico kaj Leonardo da Vinci estas agnoskitaj, ne nur en Italio sed ankaŭ en multaj landoj, kiel gravaj pensantoj. Sed oni povas diskuti ĉu la "Pensoj" de Leonardo estas same signifa kiel liaj sciencaj kaj artaj verkoj. Niccolo Machiavelli en la 16a jarcento nepre devis eniri, sed ĉu la ofte citita cinika ĉapitro "Kiamaniere la princoj devas observi la fidelon" estas la plej signifa ekstrakto el **La Princo**? Galileo Galilei estas konata eksterlande ĉefe pro siaj kontribuoj al la astronomia scienco ... mi trovis malfacile kompreneblaj la tri paĝojn el "Il saggiatore" (La pensisto). Carlo Goldini nomis sin mem por la 18a jarcento, sed eĉ kun longa enkonduko la kvin scenoj el **Kurioza Okazaĵo** postulis streĉan atenton por sekvi la intrigon. Eĉ en la 19a jarcento troviĝas aŭtoroj longe "klasikaj", ekzemple Alessandro Manzoni, aŭ konataj eksterlande pro sia kontribuo al la liberiga kaj naciiga movadoj, ekzemple Giacomo Leopardi kaj Gabriele D'Annunzio. Estas unu eseo (fare de Francesco de Sanctis) pri Petrarca kaj Tasso, kaj dekunu paĝoj el la teatraĵo "Sakludado" de Giuseppe Giacosa. Same kiel pri la fragmentoj el **La Somero de la Deksepa Pupo** kaj **La Ununura Tago de la Jaro**, la malfacilo adekvate prezenti la fonon de teatraĵo (kiu baze estas por aktorado, ne por legantoj!) estas evidenta.

Same kiel en Aŭstralio, klare la redaktoro ne elektis arbitre. Li konsultis profesorojn en Torino kaj Como. Alan Towsey kaj mi konsultis Colin Roderick de Townsville kaj Nicholas Jose de la Aŭstralia Nacia Universitato (nun aŭstralia Kultura Ataŝeo en Bejĝingo). Same kiel en Aŭstralio la redaktoro heredis kelkajn tradukojn faritajn antaŭ multaj jaroj. Mi ĝojas, ke ni trovis lokon por la tradukoj zorge faritaj de niaj pioniroj Reg Banham, Ken Linton, Paul Schwerin, Wre Chandler kaj Joab Elliott.

La redaktoro de la itala, same kiel la nia, certe ankaŭ havis kelkajn objektivajn kriteriojn. Alan Towsey devis enketi ĉu aŭtoro estas laŭdata en la historioj de Aŭstralia Literaturo, ĉu ŝi gajnis Nobel-premion (Giosue Carducci kaj Patrick White ambaŭ havis tiun kvalifikon) aŭ alian konkurson, ekzemple la Premion Booker (Peter Carey), ĉu verko jam aperis en antologio eldonita en Aŭstralio aŭ en Anglio? Ĉu ŝi estas citata en **The Dictionary of Australian Quotations**, ĉu ŝiaj verkoj estas tradukitaj en aliajn lingvon? ĉu oni faris filmojn aŭ televidprogramojn bazitajn sur ŝia verko, ĉu kompetenta tradukisto deziras traduki ion el la verkaro de tiu aŭtoro? Mi scias, ke Alan Towsey konsideris tiajn faktorojn.

Alia demando estis: ĉu verko de tiu aŭtoro jam aperis en Esperanto? Ekzemple, kiam spaco estis limigita mi preferis traduki ion el romano de Morris Weste prefere ol ĉapitron de Nevill Shute. Ambaŭ estas popularaj aŭtoroj (kvankam eble ne en la unua rango literature). Ambaŭ priverkis "universalajn" temojn. En filmo de **Sur la Bordo** rolis Gregory Peck kaj Ava Gardner. En filmo de **La Suoj de la Fiŝisto** aktoritis John Gielgud, Kavaliro Laurence Olivier kaj Leo McKern. Mi preferis Morris West ĉar AEA jam eldonis la romanon **Sur la Bordo**, kaj disdonis po unu ekzempleron al ĉiu landa asocio. La italoj enmetis plurajn pecojn, kiuj jam aperis en Esperanto en aliaj libroj. Mi iomete bedaŭris, ke oni dediĉis 24 paĝojn al la **Dia Komedio**, ĉar la tuta dulingva teksto devas troviĝi en ĉiu biblioteko. Same ne necesis enmeti tiom da poemoj, kiuj jam aperis en **Eterna Budeko** kaj **Tutmonda Sonorilo**. Sed la dupaĝa fragmento el "Koro" estas bona ekzemplo de la verko de Edmondo de Amicis. Aliflanke, la fakto, ke verko jam estas eldonita en Esperanto estas iusence garantio de ĝia "homareco". Ekzemple, "Pejzaĝo" de John Rowland estis publikigita en Aŭstrio, kaj "La Lumoj de Cobb kaj Ko." jam aperis en Brazilo (Fonto).

Plejparte la verkoj en **Itala Antologio** estis verkitaj en la itala, kaj tradukitaj de itallingvanoj. Sed kiel menciite, oni ne hezitis inkludi kelkajn elegantajn tradukojn de Kálmán Kolocsy kaj rakontojn esperantigitajn de Gaston Waringhien. Giordano Azzi mem tradukis fragmenton de la **Memoroj** de Goldoni, kvankam tiuj estis verkitaj franclingve. Laŭ nia invito William Auld, skoto, tradukis poemojn de Adam Lindsay Gordon kaj Les Murray, kaj li mem proponis "X-ray Photograph" de A. D. Hope. Marjorie Boulton afable tradukis la ĉarman poemon "Kokokrio" de Rosemary Dobson. Al ambaŭ ni helpis per provizo de aŭstralia-Esperanto vortaro!

Rilate la elekton de poemoj tradukotaj, la deziroj de la tradukonta poeto estis grava faktoro, kvankam la redaktoro celis trovi poemojn memstarajn kaj samtempe reprezentecajn. Kelkfoje la aŭtoro insistis, ke poemo, kiu tro ofte jam aperis en antologioj estu forlasita el la nia. Judith Wright tion faris. La noveloj plejofte jam aperis en antologioj, aŭ en kolekto en kiu la aŭtoro eldonis siajn plej ŝatatajn verkojn. Mi persone legis kaj relegis tutajn romanojn antaŭ ol elekti pecon, kiun mi taksis sufiĉe memstara kaj samtempe bona ekzemplo de la stilo de tiu aŭtoro.

Unu faktoro, kiu verŝajne ne influis Giordano Azzi estis la deziro respuguli la kontribuon de la aborigena popolo al la nacia verkado. Mi esperas, ke iam aperos tuta libro de aborigenaj legendoj. En la **Aŭstralia Antologio** ja aperis "La Giganta Diablo-Dingo" de Dick Roughsey (Gubalathaldin), novelo kaj poemo de Kath Walker (Oodgeroo Noonuccal) kaj peco el **Capricornia** de Xavier Herbert.

En la Itala Antologio troviĝas tradukoj el la milana, roma kaj napola dialektoj. En aŭstralio ne ekzistas veraj lokaj dialektoj, sed ni akceptis la defion traduki poemon de C. G. Dennis, kaj, en aliaj pecoj, konversaciojn slangajn. Spite al la malfacilaĵoj mi kredas, ke ni almenaŭ parte sukcesis doni al niaj eksterlandaj amikoj la guston de "La Prezento".

En unu fako la Itala Antologio superas - ĝi enhavas dudekon da bildoj de la aŭtoroj. Jes, ni diskutis ĉu ni penu inkludi aŭtorportretojn en Aŭstralia Antologio, sed decidis, ke estas pli bone uzi la eblan spacon por verkoj kaj biografiaj enkondukoj.

Mi esperas, ke ĉiuj aŭstraliaj esperantistoj legos sian antologion, kaj ke oni kritike ekzamenos la precizecon de la tradukoj. Tio helpus plibonigi la aŭstralian - esperantan vortaron. Mi esperas, ke AEA eldonos, iam, aliajn pli simplajn librojn - novelaron, legendaron, eĉ poemaron.

Sed, ne la unuan fojon komparinte nian antologion kun tiuj de aliaj landoj mi opinias ke ni eldonis tre taŭgan volumon. Mi esperas, ke multaj legos la Italan Antologion kaj ke, ĝuante la perlojn de kelkaj jarcentoj ili fieros pri la juveletoj, kiujn Alan Towsey tiel majstre redaktis en **nia** Antologio.

Ralph Harry

ALARMO

Atentu, fratoj - marŝas en la stratojn
 la cenzuremaj hundoj, la vervaj fervoristoj:
 minacas jen per siaj nigraj listoj,
 ariĝas kun la torĉoj, per gvat' mandatas batojn

Ĉi tiuj, aŭtokrate, pi-aroĝe.
 Jen marŝas en la stratojn: celas ilia tuto
 dronigi novajn pensojn sen refuto,
 kaj diktatori mondon sencian demagoge.

Ilia nombro multas, multas kreske.
 Kaj mutas ni, malkrede - iliaj voĉoj raŭkas,
 alvoke la moralon, kaj pli laŭtas
 ol ĝusta raciado aŭ justo-pled', groteske.

Rigardas ni, ŝtonitaj - sed oponi
 al tiuj, oponadi, fariĝas tasko enda.
 Ne temas nur pri ago nin-defenda:
 obstine devas ni ĉi obstinon anstataŭi.

^
 Ĉar jenan veron Milton fin-agnoskas:
 Mortigis la aĉulo, kiu mortigis homon,
 di-kreaĵon; sed kiu libron blokas,
 mortigas Dion mem, ĉar mortigas la rezonon.

Firmigu vin. La lukto ripetiĝas.

Niĉjo Nicholas

EK DE L' BUŜO

La sakro sur la buŝo amatina
ja belas pli ol sankta profanaĵo.
Ke gvidas tie lipoj al la ina
vizaĝkapelo kaj korpfluŝo-templo
kaj pluen, krom ke sen modest-ŝajnaĵo
tiel ŝi (jarojn daŭru la kontemplo!)

aŭdace montras homon tutehoman,
eĉ homon sub la templaj ŝirm-kurtenoj,
netima vorti plu ol la Sirenoj:
ĉi tio vekas ĉarmon preternoman,
kaj mi, strangmaniere, fervorsentas
pian sorĉiĝon, kiam la blasfemoj
rubenas, kaj jam super ĵus-matenoj
vortetoj familiaraj firmamentas.

Niĉjo Nicholas

PLENDOKANTO AL FOLIO BLANKA

Ho, kiel mi adoras eĉ pensi pri papero blanka!
 Pli dezirenda aĵo sur tera tuto ja ne estas.
 Sed kiam ĉi-papero min frontas, kaj ĝi tie restas -kiel rapide
 povas mi iĝi tute inspirmanka!

Dumprove, ho folio, en cerbon multaj pensoj venas:
 bruligo, murdo, rabo - kaŭzite de ideobloko;
 sed ne fluigas verson ĉi tiaj pensoj. Cerbsufoko
 pro nenifaro igas, ke mi koleras kaj malbenas.

Sed pli kruela estas la fronto de folio, nigra
 pro troo da ideoj abortaj kaj da fuŝaj provoĵ:
 la plumo likas, aĉas la rimoj, kaj la Muzo - migra!
 Folio tial plena ne nur ĉagrenon kaŭzas al mi:
 ĝi krias laŭtavoĉe, ke fine mankas miaj povoj,
 kaj mi - fuŝulo, kiu eĉ ne pri juĵoj povus psalmi!

Niĉjo Nicholas

ATENTIGOJ

RADIO

La sekvanta tabelo indikas la kurtondajn programojn en Esperanto bone aŭdeblajn en Aŭstralio. La tagoj estas laŭ la Aŭstralia semajno. La horoj estas laŭ UTC/GMT, por via loka tempo vi devos kalkuli. Indikitaj estas la plej bone aŭdeblaj frekvencoj.

<u>El</u>	<u>Tago</u>	<u>UTC/GMT</u>	<u>Ondoj</u> (M)	<u>kHz</u>
Bejĝingo	ĉiutage	20:00-20:30	31.1	9965
		11:00-11:30	43.1	6955
Pollando	ĉiutage	05.30-06.00	41.27	7270
Svisio	merkredo	07.45-8.00		13685
	kaj sabato			
Vieno	sabato	09.30-10.00	19.00	15450
Vatikano	ĵaŭdo	05.00-05.15	25.00	11715
Kubo	dimanĉo	22.00-22.20	19.00	15155

Nepre skribu al la elsenda stacio viajn komentojn, sugestojn, kc.

Kompilita de S. Kanaĉki

...

KOMPUTILISTOJ

Nia libroservisto Tom Elliott atentigas ke li nun havas tajpprogramojn, sur 5-colaj diskoj, por la esperanta alfabeto. Ili taŭgas por 9-pinglaj presiloj laŭ la Epsoma speco. Por IBM komputiloj: TAJP, por WS1512 redakta programo. Por CPM komputiloj: PRES por WS redakta programo. Ankaŭ uzebla por ĉiu redakta programo kapabla enmeti proprajn literojn.

...

NUN HAVEBLA DE LA LIBROSERVO

ESPERANTO: Learning and using the International Language, de David Richardson, recenzita en nia januara numero, nun estas havebla per nur \$22 ĉe la AEA Libroservo. Libro ne nur por lernantoj, sed por konsulto eĉ de progresintoj kaj postprogresintoj. Unika verko kiu ne nur aspektas bele sed estas valora pro sia enhavo. Se vi planas donacon por amiko aŭ parenco, jen libro verdire donacinda.

PRELEGONTOJ

UEA pretigas liston de esperantistoj kapablaj kaj dezirantaj prelegi en Esperanto enkadre de kongresoj aŭ aliaj renkontiĝoj. La sekvantaj kondiĉoj estas rigore aplikataj al la listigotoj:

- perfekte regi Esperanton
- perfekte regi la temo(j)n pri kiuj ŝ/li pretas paroli
- esti kapabla paroli publike
- esti kapabla respondi intervjuojn (por ĵurnalistoj, radio, <c.)
- Deziri prelegvojaĝi eksterlande kaj esti sufiĉe ne-laciĝera por tion fari

Se iu leganto respondas al la supraj kriterioj kaj deziras esti en la listo kompilata, bonvolu kontakti:

C. Nourmont, 2 am Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo.

...

VIATEL

Samideano Frank Osowski (22 Lambeth St. Kensington Vic 3031, tel.(03)376 2396) anoncas ke li publikigas gazeton nomitan Esperanto-Gazette pere de la Viatel-reto. Oni povas, senpage, uzi ĝin el ie ajn en Aŭstralio, ĉe Viatel node *34588#.

...

LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO

Multaj esperantistoj ne konas la laboradon de la Akademio de Esperanto, ĝiajn konsilojn, kaj foje eĉ ne ĝiajn oficialajn decidojn! Por elimini tiun gravan mankon, ek de la fino de 1987 la Akademio publikigas trimonatan bultenon kun la nomo "La Letero de l' Akademio de Esperanto". En ĝi aperas ne nur ĉiuj oficialaj decidoj kaj rekomendoj de la Akademio, sed ankaŭ demandoj kaj respondoj pri lingvaj aferoj. Abono kostas 120 francajn frankojn = proksimume A\$24. Adreso: 5, rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio. Kvankam en THE AUSTRALIAN ESPERANTIST ni presas ĉiujn oficialajn decidojn kaj rekomendojn de la Akademio (ekzemple, la listo de landanoj, en nia marta numero), la Letero de l' Akademio donas al vi oportunojn demandi pri la sinteno de la Akademio rilate al io ne klara al vi. Ankaŭ eblas fariĝi unu el la Amikoj de l' Akademio, per pago de 100 FF = A\$20.

DEZIRAS KORESPONDI

Du junulinoj en la 8a lernjaro en Litovio deziras trovi korespondantojn en Aŭstralio. Ili volonte interŝanĝus poŝtmarkojn, bildkartojn, kc. Jolanta estas 13-jara, kaj Ĉese estas 14jara. Iliaj adresoj:

Jolanta Kulbyte
Str Gelvony 50-14
232010 Vilnius
Litovio, USSR

kaj

Ĉese Butrimavičiūte
Str Gelvony 3-47
232010 Vilnius
Litovio, USSR

Ankaŭ nin atingis korespondpeto el Ĉeĥoslovakio de 25-jara nova esperantisto kiu interesiĝas pri muziko, turismo, vivo en Aŭstralio, kaj bildkartoj. Li deziras korespondi kun esperantistoj 25-35jaraj:

Josef Sučanský
Družba 1193
Hulín 768 24
Ĉeĥoslovakio

KOREKTO

En via ekzemplero de la 1988 Adresaro kaj Jarlibro de AEA, bonvolu korekti la listigon por D-ro Gaider al: D-ro E.W. Gaider, 9 Gormanston Crescent, Deakin ACT 2600. Kaj sur p.37 la lasta enlistigo devus diri: Barbara M Williams. (La adreso restas valida.)

IN MEMORIAM TIBOR SEKELJ

(1912-1988)

La 20an de septembro 1988 mortis unu el la plej eminentaj esperantistoj de nia aktuala epoko. Tibor Sekelj estas konata ne nur kiel verkisto (aperis en Esperanto 7 libroj liaj, inter ili la tre impona NEPALO MALFERMAS LA PORDON, 1960, kaj en la hungara lingvo unu libro en 1983). Tibor Sekelj estis aktiva esploristo, kiu esploris sur ĉiu kontinento esc. Antarktiko, kaj konigis al la mondo pluraj lokojn kaj homgrupojn ĝis tiam ne konatajn. En la Universitato de Buenos Aires li studis etnologion, antropologion, kaj arkeologion; en Zagreb pentradon kaj skulptadon. Jam 64jara li akiris sian magistran diplomon. Li mem nun mortis, sed lia inspiro restos eterne.

PROVU VIAN VORTOSCION

1. Ĉu **maleolo** estas
 - (a) dolĉa greka vino
 - (b) osto de la piedo
 - (c) loĝanto de la Malaka duoninsulo

2. Ĉu **hobio*[#]** estas
 - (a) vaganto senhejma
 - (b) nepagata okupo farata pro onia deziro
 - (c) mitologia estulo

3. Ĉu **normo*** estas
 - (a) virino, kiu fiksas la homan destinton
 - (b) parto de planto
 - (c) sonaĉo farata dum oni dormas

4. Ĉu **nepri[#]** estas
 - (a) perdi multan monon per vetado
 - (b) prepozicio signifanta "ne rilatanta al"
 - (c) esti necesega

5. Ĉu **pramo** estas
 - (a) porinfana veturilo
 - (b) hindia sanktulo
 - (c) speco de ŝipo

6. Ĉu **stupro*[#]** estas
 - (a) malvigleco post drinkegado
 - (b) piramidforma sanktejo azia
 - (c) hontinda aŭ krima seksrilato

7. Ĉu **renburi** estas
 - (a) bleki kiel elefanto
 - (b) fari X-radiojn
 - (c) plenŝtopi kusenon

8. Ĉu **sukcedi*[#]** estas
 - (a) atingi onian celon
 - (b) surpreni oficon de antaŭulo
 - (c) premi sukerkanon por elfluigi sukersukon

ANNUAL SUMMER ESPERANTO WORKSHOP
July 3 - 21, 1989
SAN FRANCISCO STATE UNIVERSITY

Now in its twentieth year an intensive three-week programme for those interested in Esperanto study. The University gives each course 3 semester units credit for students enrolled for a degree. Overseas students are specially encouraged. Courses are at all levels:

Basic Course (594): Welcome to Esperanto. For students with no previous knowledge of Esperanto. Using the unique Cseh "direct method" students learn to speak and think in Esperanto right from the first day.

Advanced Basic Course (595): Gaining Confidence in Esperanto. This course aims at developing communicative skills in Esperanto, with emphasis on active speaking and oral understanding.

Intermediate Course (596): Esperanto in Practice - Language & Literature. Discussions in Esperanto based on readings, exploring the realms of philosophy, travel and culture with special reference to Esperanto literature and traditions.

Advanced Course (597): Esperanto Literary Prose and Linguistics. This course has two foci: One, a study of the original Esperanto novel, with study in detail of two or three outstanding novels. The other focus will be linguistic, concerning the structure of Esperanto and the role the language plays in contemporary society.

Methods of Teaching Esperanto (598) - The Modern Cseh Method (598). This course is intended primarily for Esperanto teachers wishing to upgrade their skills and learn the use of the Cseh direct method of teaching.

Fees: US\$270 for 3 weeks. Housing, with meals, US\$145 weekly. For details and application forms contact Cathy Schultz, 410 Darrell Rd, Hillsborough CA 94010, U.S.A.

WINDOW ON THE WORLD

ESPERANTO IN THE KRISHNA MOVEMENT

One of the basic tenets of the founder of Esperanto, Dr L. L. Zamenhof, was that misunderstanding and mistrust among adherents of different religions is responsible for a great deal of social friction not only within communities but also between nations, a fact of which we have been only too aware in recent years. Esperanto has, since its inception, been a neutral meeting ground where adherents of all religious persuasions can speak and be listened to with respect. Protestants, Catholics, Quakers, Mormons, Muslims, Buddhists, Spiritualists, Omoto (a Japanese religious movement), Baha'i, and more have long had their groups and Writings in Esperanto, with many a truly ecumenical meeting of members of the world's faiths coming together for open and deep discussion. Now an Adelaide Esperantist, Bob Felby, has been asked by the Spiritual Master of the Krishna faith to translate their sacred scriptures into Esperanto. Soon these Writings will take their place alongside the Bible, Koran, Bhaghavad Gita and other religious classics.

...

ESPERANTO ON THE ROCK SCENE

EUROKKA, founded 8 March 1988 in Donneville (near Toulouse), France, has as its goal the training of Rock music groups, and the promotion of Esperanto Rock on the international scene. Since April 1988 two half hours a week devoted to Esperanto Rock have been a regular feature on the local Toulouse FM radio station F.M.R. A library of Esperanto Rock music is being established. Musicians interested in participating are invited to contact Eurokka, Esperanto-Rok' Asocio, F-31450 Donneville, France.

...

ESPERANTO BY COMPUTER

Actually a natural extension of the language laboratory system, new Esperanto courses for learning via computer are being developed. The Hungarian Esperanto Association is testing a program for teaching **spoken** Esperanto using the world's most popular computer the Commodore

64, in conjunction with traditional style classes. The program, called ESPAROL, enables the computer to pronounce aloud any text written in Esperanto. It can ask questions in Esperanto, with the student required to type in the correct answer. But its most important feature is that different students in the same class can exercise their understanding of oral Esperanto each at their own level. And learning can be fun too, as the computer may be programed to play games in Esperanto.

(From an article in the Internacia Pedagogia Revuo, Oct.-Dec. 1988.)

...

GLASNOST CATCHES UP WITH ESPERANTO

Esperanto has had a checkered history in the Soviet Union. Soon after its publication in 1887, Dr Zamenhof's International Language was dealt a nearly mortal blow with the banning of his Esperanto magazine by the Tsarist regime because of the liberal, humanitarian motivation of Esperanto. After the 1917 revolution Esperanto flourished briefly, but soon came under official scrutiny and control, leading to its virtual prohibition by the time of the Second World War. After the War carefully supervised Esperanto groups and individual Esperantists were permitted, though rarely encouraged, in the Eastern Block.

In 1988 the citizens of the USSR rediscovered Esperanto, when the new law encouraging cooperatives was promulgated. Esperanto cooperatives sprang into being almost overnight. One such cooperative is the KOPSO in Moscow, which not only organises Esperanto courses in Moscow itself but conducts a correspondence course in Esperanto for the whole of the Soviet Union.

Another enterprise undertaken by the Moscow Esperantists is the formation of a computer based enterprise called Interservo, in which Esperantists both in the USSR and other countries can have themselves and correspondence interests listed, so that "matches" can be made. Given the fact that Esperantists are still very few and widely scattered in the USSR, some sort of centralised decentralisation is badly needed - a contradiction in terms, perhaps, but a practical reality.

The moribund Association of Soviet Esperantists, which was under strict governmental control, has been disbanded and replaced by the re-establishment of the pre-war Esperantist Union of the Soviet Republics.

Emphasis is being placed on its being a federation rather than a directing body. In the meantime, independent Esperanto associations are now functioning in various of the republics of the USSR, particularly Estonia, Lithuania, Latvia, and even Siberia has not escaped! The new Soviet Esperantist Youth Organisation is centred there in Tashtagol.

...

THE INTERNATIONAL ESPERANTO MUSEUM

In over a hundred years of existence Esperanto has developed an enormous literature, of which, inevitably, the larger share is out of print and copies quite rare. Also, as in other languages, often Esperanto literature has been published in serialised form in periodicals. A vast number of postgraduate university theses and specialist studies have never been made available on the general market. An example of such theses is Dr Margaret Hagler's "The Esperanto Language as a Literary Medium" (1970), a Ph.D. thesis examining the unusual literary capabilities of Esperanto both for translation of major works of literature and as the original language of literary works.

Realising the danger of permanent loss of valuable literary material, in 1927 Hugo Steiner founded the International Esperanto Museum of Vienna (IEMW), which in 1929 became a permanent part of the Austrian National Library. Employing two full-time librarians, the IEMW has become a depository of Esperanto material, both printed and in manuscript form. Thanks to its official status as part of the Austrian National Library, the collection was preserved intact during the Nazi occupation, unlike most other Esperanto collections in Europe.

Apart from cataloguing, binding, and preserving Esperanto publications - sometimes requiring special chemical treatment of ageing fragile paper - the IEMW makes several services available to the general public. It provides research facilities, publishes regular catalogues of new acquisitions, and is preparing for publication a complete catalogue of its holdings. Books may be borrowed, in Europe, though inter-library loan via university and public libraries. Photocopies and micro-films may also be obtained through the facilities of the Austrian National Museum.

Visitors are welcome. Address: Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Batthyanystrasse, A-1010 Vienna, Austria.

9. Ĉu **sarki** estas

- (a) prilabori ĝardenon
- (b) japana alkohola trinkaĵo
- (c) blasfeme eksklami

10. kiu el la sekvantaj frazetoj estas ĝusta?#

- (a) la infano estis ŝirmata de la patro kontraŭ la pluvo
- (b) la infano estis ŝirmata de la pluvo fare de la patro
- (c) la infano estis ŝirmata per pluvombrelo

11. Ĉu **bromo** estas

- (a) fiŝo
- (b) purigilo
- (c) elemento, atomnumero 35

12. Ĉu **vigili***# estas

- (a) esti tre aktiva
- (b) intence maldormi
- (c) verki poemon latinistilan

13. Ĉu **dekano** estas

- (a) kruĉo
- (b) ĉefprofesoro
- (c) speco de demono kaŭzanta timsonĝojn

14. Ĉu **aboni**# estas

- (a) mendi periodaĵon
- (b) tre malami
- (c) ricevadi nemenditan periodaĵon

15. Ĉu **erpi** estas

- (a) prilabori kampon
- (b) elpremi likvaĵo
- (c) maljuniĝi

*neoficiala vorto

#neoficiala vorto listigita en la Suplemento al PIV
#oficiala vorto, difinita laŭ la Suplemento al PIV
Kompilita de Donald Broadribb

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

1.b; 2.b; 3.a; 4.c (ankaŭ b estas teorie ebla); 5.c; 6.c; 7.c; 8.b;
9.a; 10. a kaj c; 11.c; 12.b; 13.b; 14.a; 15.a.

POR TIU, KIU NE KOMPRENAS KOMPUTILOJN

Sur la sekvantaj paĝoj aperas letero de Marcelo Leereveld, sekvata de komentoj de la redaktoro. Unuavide tia diskutado povas fortimigi legantojn, kiuj opinias ke la komputila fako estas io tro fremda, tro malfacile komprenebla. Sed efektive, Marcelo kaj la redaktoro ambaŭ havas unu celon: semisterigi por ordinara leganto tiun konstante pli disvastiĝantan parton de la moderna mondo.

Kiel en ĉiu fako, la tento konstrui faklingvon kiun nur "inicitoj" povas kompreni estas tre alloga, preskaŭ neevitebla. Plejparte tio estas ĉar la kreantoj de la aparatoj estas la kreantoj ankaŭ de la teknikaj terminoj. Sed komputilojn uzas preskaŭ ĉiu persono en nia socio. Se vi havas bankkonton, vi uzas la ATM-ojn (Automatic Teller Machines), kiuj efektive estas komputil-terminaloj. Se vi uzas tajpilon, plejverŝajne vi nun uzas elektronikan skribmaŝinon, kiu efektive estas komputilo speciale adaptita por pritrakti nur vortojn. Se vi aĉetas kafon en via butiko, la kasisto registras la prezon per speciala komputilo kiu legas la stri-kodon sur la pakaĵo. Efektive, legante ĉi tiujn vortojn vi utiligas la produkton de komputilo, nome vortprocezilo (mi preferas nomi ĝin simple vortkomputilo). Tamen, kiel vi spertis ĉe la banko, en la butiko, en la oficejo, en via legeseĝo, vi ne bezonas scii la teknikan parton de komputado por uzi komputilojn. Simpla kompreno pri kiel komputilo funkcias estas ĉio, kion nuntempe bezonas ordinarulo scii pri ili.

Jam de kelkaj jarcentoj ekzistas tre populara ludo kun diversaj nomoj. La esenco de la ludo estas ĉi tio: iu sekrete elektas la nomon de io ajn, ne gravas kio. La aliaj ludantoj devas per ne pli ol 20 demandoj kiuj estas respondeblaj per simpla "jes" aŭ "ne" diveni la sekretan aferon elektitan. Se oni saĝe elektas siajn demandojn, ĉio ajn ekzistanta estas divenebla per ne pli ol 20 tiaj demandoj. Ekzistas matematika pruvo pri tio, sed ni ne nin ĝenu pri ĝi.

Ekzistas nur 28 literoj en nia alfabeto, plus 10 numeraloj kaj 8 interpunkciaj markoj, do sume 48 signoj.

Se ĉio ekzistanta estas divenebla per ne pli ol 20 demandoj respondeblaj per "jes" aŭ "ne", kiom ca demandoj estas necesaj por diveni iun ajn skribsignon? Mirige, per 8 tiaj demandoj ĉiu ajn skrib-signo estas divenebla, eĉ se ni inkludas la specialajn signojn

\$ £ _ & () % = + " ' ` ^ _ ¢ ¥ ß # kaj multajn pliajn specialajn signojn uzatajn en matematiko kaj aliaj fakoj. Efektive, per nur 8 jes/ne demandoj ni povas diveni 256 signojn, multe pli ol ni bezonas por ia ajn komunikaĵo. La Mors-kodo, kiun vi probable lernis dum vi estis infano, pruvas ke tio efektive perfekte funkcias. La Mors-kodo uzas nur du signojn - kaj . kaj per diversaj kombinoj de tiuj du elementoj ĝi identigas ĉiun literon.

La klavoj de via komputilo estas tiel konektitaj al la interna elektronika mekanismo de la maŝino, ke kiam vi premas klavon la elektronika mekanismo sendas kombinaĵojn de "jes" kaj "ne" (ni ne bezonas detali la elektronikan metodon per kiu ĝi faras tion) - aŭ se vi preferas pensi laŭ la Mors-kodo, la elektronikan ekvivalenton de . kaj - aranĝoj, kaj la maŝino aperigas la celatan literon aŭ numeralon sur la ekrano, aŭ sur papero (uzante printilon), aŭ sur magneta disko aŭ magnetofona bendo.

Do en via menso bildigu ke la maŝino, kiam vi premas klavon, elsendas unu el la 256 grupoj da 8 "jes/ne" demandoj. Angle oni nomas ĉiun tian jes/ne demandon "bit" kaj la grupon kiu difinas la celatan literon aŭ numeralon aŭ signon oni nomas "byte" ("bajto"). Populare la komputil-vendistoj nomas tion "character", kaj diras ke iu maŝino havas "64 000 character memory" = povas "memori" 64 mil bajtojn. Ekzemple, la litero s bezonas unu bajton. Por fari la literon ŝ mia maŝino bezonas du bajtojn, ĉar ĝi aparte faras la ^ kaj la s.

Mi petas la teknikistojn ne tro grumbli pri mia ege simpligita ekspliko. Kaj la legantojn mi invitas nun komprenoplene legi la sekvantaĵon: (DB)

LETERO DE MARCELO LEEREVELD

30 januaro 1989

Mi ĵus tralegis "Esperanto en la Komputil-Epoko" (dissendita kun la septembro 1987 numero de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST) kaj ĝojis multe ke ci evidente plejble evitas neologismojn, kio estas plezura diferenco al aliaj samtemaj publikigaĵoj.

En tiu rilato permesu al mi fari kelkajn demandojn:

1) Ĉu anstataŭ "stori" estas ebla la vorto "enmemorigi"?

2) Kvankam mi samopinias kun tia uzo, ĉu "milion" en "multmilion" ne estas, kiel radiko, neologismo?

3) Mi ne samopinias kun cia diraĵo ke "ankaŭ en la aktuala Esperanto plursencaj radikoj estas la regulo", ĉar se tio verus, ĝi ne estus Esperanto (mi kompreneble ne enklasigas en tiajn la metaforojn kaj la similajn sencojn ĉe malsamaj cirkonstancoj, kiaj "antaŭ" por loko kaj por tempo, aŭ "respondi" por fizika kaj por morala (=respondeci) sencoj).

4) Ĉu por "averaĝo" ne eblas uzi "mezkvanto"?

5) Kiu estus la plej bona Esperanto-vorto por signifi la neologismon "hajto"?

6) Ĉu la vorto "kontekstiĝo" estas preseraro por "kontaktiĝo" aŭ por "konektiĝo"?

7) Kion ni en Esperanto faru pri la mallongigoj kiaj "ROM", "RAM", kaj "CPU"? - Ĉu neuzi ilin, ĉu uzi Esperantajn mallongigojn, aŭ ĉu diskriminaciante uzi la francan aŭ la anglan mallongigon? Mi notis ke ci uzis la Esperantajn "fl", "cl", kaj "il".

8) Antaŭ kelka tempo ankaŭ mi sentis la neceson ke kiel komputra interlingvo Esperanto devus ne havi plursencajn vortojn, kaj mi komencis fari liston de tiaj vortoj. Sed la nombro da ili evidente estas tiom granda ke mi ĉesigis tiun laboron. Temis precipe pri dusencaj vortoj: unu radiko kaj la alia vortkombino.

9) El la "solvoj" por uzebleco de Esperanto kiel interlingvo kiujn Witkam proponas (ciaj paĝoj 11, 12 kaj 13) evidentiĝas ke li ne estas lingvisto. Mi esperas ke por lia laboro li uzos la helpon de perfekt-Esperanta lingvisto.

10) Ĉu ci ne povis trovi alian vorton anstataŭ la (pro neologismoj) jam plursenca "modulo"?

11) Ĉu eblas uzi "hardmemoro" anstataŭ ROM kaj "softmemoro" anstataŭ RAM, se oni uzi devas "softvaro kaj hardvaro"?

12) Aliaj komputrofakuloj distingas inter "komputilo" kaj "komput-

oro" (= pli Esperanteca ol la malnecesa "er"-ema "komputero") kaj ĝis nun mi sekve uzis "komputro" anstataŭ "komputilo". Ci ne faras tiun distingon. Aŭ ĉu ci eble uzas "mezurilo" aŭ "kalkulilo" por la senco de la sampla komputilo? Se jes, mi emas ŝanĝi mian kutimon ĉirilatan.

Marcelo Leereveld

12 Heather Grove

Belgrave South, Viktorio 3160

...

Respondo de Donald Broadribb:

Vi enlumigas plurajn diskutindajn temojn. Eble estas dezirinde klarigi jam je la komenco de mia respondo ke mi parolas kiel ordinara esperantisto pri komunikado inter ordinaraĵoj esperantistoj. Teknikistoj sendube bezonas specialajn teknikajn terminojn. Sed por simpla interkompreniĝo de ordinaraĵoj mia opinio estas dezirinde eviti tro teknikajn fakajn terminojn en ĝeneralaj gazetoj kiam eble.

1. Jes, mi akordas kun vi, ke "enmemorigi" estas tute adekvata termino, kaj oni povas se necese uzi aldone "sur disko" kc.

2. "Milion" fojfoje estis proponata, sed ne ĝenerale uziĝas. Verŝajne en la tempo de Zamenhof kalkulado per milionoj ne estis tiel necesa kiel nun. Sed estas logike ke la serio dek/cent/mil kompletiĝu per milion (kaj eventuale bilion?). Mi ŝatus vidi ĝeneralan diskuton pri tio.

3) Vi pravus ke mi multe troigis, dirante "en la aktuala Esperanto plursencaĵoj radikoj estas la regulo". Mia komento estis erara kaj mi plezure forgesigus ĝin.

4) Anglalingve ni distingas inter "average" kaj "median". En la serio 3-17-19-21-22-22-22-89-90 la "meznumero" (= meza nombro) estas 22 sed la averaĝo estas 33,8. Mi opinias ke tia distingo estas farinda.

5) Por ordinara uzado mi opinias ke "ero" sufiĉas por la senco de "byte". Teknikistoj parolas pri "bits" kaj "bytes": 8, 16, aŭ 32 bits = 1 byte, sed al ordinara uzanto komputilo nur disponigas "bytes". Ekzemple: "averaĝe angla vorto konsistas el 5,443 eroj (=bytes)".

6) "Kontekstiĝo" estis tajperaro por "konektiĝo." Mi pardonpetas pro tiu kaj multaj aliaj tajperaroj en la broŝureto.

7. ROM, RAM kaj CPU. Mi opinias ke eble ni bezonas akcepti ilin kiel teknikajn terminojn. (ROM = Read Only Memory, RAM = Random Access Memory, CPU = Central Processing Unit). Sed ordinara uzanto de komputilo okupas sin nur pri la RAM, kaj la anglaj vortoj nenion signifas por reinicito. Do por ĝenerala uzado eble ni povus diri "disponebla memoro" aŭ "manipulebla memoro", t.e. la memorkapablo de komputilo aŭ de disko, kiun oni povas laŭvole uzi, ŝanĝi, kaj ĝenerale manipuli.

9. Oni diras ke Witkam nun plifamiliariĝis kun Esperanto kaj trovis ke tiom da modifoj ne estas necesaj. Mi ne opinias ke iu ajn ŝanĝo de Esperanto estas bezonata. Oni povas aldoni novajn vortojn, laŭ la normala metodo, sen ŝanĝi la jamajn vortojn, kaj mi tute ne trovas bezonon fari gramatikajn modifojn. Esperanto estas multe pli elasta ol oni kutime supozas. Mi firme kredas ke Esperanto uzata kiel pontlingvo en perkomputila tradukado povus kaj devus esti legebla kiel normala Esperanto sen modifoj, kvankam kun aldono de ekstraj vortoj se necesas. Ekzemple, se la maŝintraduka programo necesigas seksdistingon ĉe la vorto "ili", ĉar la cellingvo postulas tian distingon, oni povus uzi, eble, "ŝili" por la insekca kaj "lili" por la virsekca. Estus facile tiel prepari la programon ke la maŝino utiligus tiujn vortojn nur kiam la cellingvo postulas tion. Temus pri la aldono de du novaj vortoj sen ŝanĝo de la jama vorto.

10. Anstataŭ "modulo" diversaj vortoj estas uzeblaj, laŭ la celata signifo. En la broŝuro p.4, ŝajnas al mi ke "konektilo" estas tute sufiĉa.

11. Mi tute ne ŝatas la terminojn "hardvaro" kaj "softvaro", sed ĉar ili akiris specialajn ĝenerale praktikajn signifojn, mi supozas ke necesas konservi ilin. Originale hardvaro = palpebla aparato, kaj softvaro = instrukciaro, sed ili antaŭ longe perdis tiujn simplajn difinojn. Se, do, ni decidus reteni "hard-varo" kaj "soft-varo", do "hard-memoro" (= memoro propra al la aparato mem do pli-malpli = ROM) kaj "soft-memoro" (= memoro facile ŝanĝebla, do RAM) estus bonaj ekvivalentoj.

12. Jes, mi nomas la simplajn aparatojn kalkuliloj (calculators) sed por la maŝinoj angle nomataj "computers" mi preferas "komputiloj", ĉar ĝi estas normala esperanta vorto konstruita el normala esperanta verbo kiu jam antaŭ multaj jaroj akiris la sencon de speciala formo de nombromanipulado laŭ kiu funkcias la komputiloj.

de nombromanipulado.

Mi ripetas mian vidpunkton ke por ordinara komunikado inter esperantistoj evitindas la nenecesa uzado de teknikaj terminoj. Bonvolu sendi siajn opiniojn ankaŭ aliaj legantoj.

...

RECENZO

Infoduktoj de Luc De Brabandere kunlabore kun Anne Mikolajczak. Roterdam: BSO/UEA 1988. 142p., broŝurita. Prezo \$20.50 de la AEA-Libroservo.

Ne lasu vin fortimigi la stranga nomo. "Infodukto" estas inventita vorto por nomi la komunikajn kaj informajn "retojn" - ekzemple, telefonio, radio- kaj televid- komunikado, utiligo de satelitoj por komunikado, vitraj kabloj, kunligo de komputiloj, kc. do = komunikad-sistemoj. Alia inventita vorto estas "informadiko" = informad + ik, do "la tekniko pri traktanta informadon". Ambaŭ vortoj estas multfoje uzitaj en la libro.

Escepte de tiuj du terminoj, la lingvo en "Infoduktoj" estas klara, plejparte klasika, kaj refreŝige mankas la multaj teknikaj komputilaj terminoj familiariĝintaj (kio ne signifas: komprenataj). Efektive, ĉi tiu libro montras ke eblas profunde kaj klare paroladi pri la komputil-arto sen monstraĵoj pseŭdoesperantigitaj el la angla lingvo.

Kvankam en Aŭstralio la libro estas reklamita kiel pri traktanta aŭtomatan tradukadon kaj artefaritan inteligenton, efektive tiuj du temoj ne aperas en ĝi, krom per kelkaj frazetoj tie kaj alie. Temas pri tre grava verko el speco tre malofta en Esperanto: serioza pri traktado de aktualaj sociaj problemoj. Kvankam verkita pri la belga/nederlanda socioj, la plej granda parto aplikeblas ankaŭ al la aŭstralio, kvankam fojfoje problemoj ŝajne gravaj en tiuj du eŭropaj landoj ne ekzistas ĉi tie.

Mallonge: la aŭtoroj volas konsciigi nin pri vera socia revolucio kiu neatendite kaj preskaŭ nerimarkate okazas tra la tuta mondo kaj kiu kvazaŭinside nuligas la bazajn konceptojn de tradicia sociologio. Nek kapitalismo nek marksismo respondas al tiu revolucio. Kio timigas estas ke la revolucio tiel silente enŝteliĝas ke ni riskas pretervidi

Ĝin ĝis estos tro malfrue.

Ĉi tiu revolucio estas la enkonduko de komputiloj kaj komputilado en ĉiujn fakojn de la vivo, kaj la egale kreskartaj eltrovo kaj utiligo de novaj komunik-sistemoj. La energi-krizo, la konstanta plivastiĝo de niaj urboj (en Aŭstralio speciale grava), la centralizado de informoj (kun la akompananta danĝero ke privata vivado povos plene malaperi, dum ia Big Brother aŭ alia speco de militista diktator-sistemo, aŭ egale alarme, multnaciaj korporacioj utiligos tiun informaron por nin sklavigi), ĉio ĉi ŝanĝas nian vivon. Eble vi opinias ke tiu alarma priskribo estas troigita? Ĉilio jam havas telefonsistemon egale posedatan - kaj regatan - de sangavida diktatoro kaj aŭstralia estro de multnacia korporacio...

"Infoduktoj" ne estas libro por ĉies legado. Ĝi ne estas por komencantoj, kaj ĝi ne estas distra legaĵo por plenigi iom da libera tempo. Efektive, ĝi celas personojn kiuj jam iom scias pri komputilado - se nur skiza scio kian gajnos leganto de "Esperanto en la komputil-epoko" kiu dissendiĝis kun ĉi tiu gazeto en septembro 1987. Tamen ĝi ne estas libro por teknikistoj, kaj ne nepre por uzantoj de komputiloj kvankam novicoj devos iom pli lante kaj cerbumante legi kelkajn paĝojn. Pro sia enhavo, ĝi estas leginda, kaj por persono kiu volas scii kio okazas en nia hodiaŭa mondo, ĝi estas legenda.

Lingve: la Esperanto - uzado en "Infoduktoj" estas plejparte altnivela, tamen kun gramatikaj eraroj kiuj foje jes kaj foje ne ŝuldiĝas al miskompostado. Kvankam dek personoj preparis la tradukon(!) la stilo restas neĝenita. Sed kiel povas esti ke neniu el tiuj dek personoj atentigis ke "akurata" signifas "ĝustatempa" kaj ne "senerara" - eraro pri kiu atentigas ĉiu instrulibro? Kaj ke fojfoje la akuzativo mankas en frazoj kie ĝia utiligo estas plenevidente necesa? La libro rapide disfalas, la gluo uzita por kunteni la paĝojn ne estas tre bona. Tamen: libro kies enhavo estas rekomendata por serioza leganto.

Donald Broadribb

...

THE ESPERANTO YOUTH TRAVELLING FUND T.E.J.O.

ricevis bonkoran donacon de mil enoj, senditan de samideano en Japanio kiu vidis anoncon pri ĝi en la UEA-gazeto "Esperanto". La kapitalo ĝis nun akumuliĝinta estas iom pli ol A\$7 000. Bona komenco, sed granda sumo ankoraŭ havigenda. Se vi povas kontribui via donaco estos bonvena.

LA UNUA SUNLEVIGO

Aborigena folkloro

Antaŭ longe, longe, dum la Sonĝtempo, la mondo estis senluma. Estis neniu lumo. Grandega, griza nubkovrilo retenis la lumon kaj la varmon. Ĉi tiu granda, griza amaso de nuboj estis tre malalta. Tiel malalta, ke la bestoj devis rampadi. Emuo marŝis lame, kun la kolo kurbigita preskaŭ al la tero. Kanguruo ne povis salteti, kaj neniu birdo povis flugi pli alte ol malmultaj metroj super la tero. Nur la serpentoj estis kontentaj pro tio, ke el ĉiuj bestoj nur ili vivadis proksime al la tero.

La bestoj vivis ĉirkaŭrampadante sur la malseketa, senluma tero, kie ili palpe serĉis fruktojn kaj berojn. Ofte estis tiel malfacile trovi nutraĵon, ke pluraj tagoj forpasis inter unu manĝo kaj alia. Vombato tiel tediĝis pro tio, ke oni koliziis kun li, ke li faris por si tunelon subteran kaj lernis dormi dum longaj periodoj.

Fine la birdoj decidis, ke por ili jam sufiĉis! Ili alvokis ĉiujn bestojn al kunveno. La Pigoj, kiuj estis pli inteligentaj ol la plejparto de la birdoj, havis planon:

"Ni ne povas flugi pro tio, ke la ĉielo estas tro malalta. Tio, kion ni devus fari, estas plialtigi la ĉielon. Se ni ĉiuj kolektus bastonetojn, ni povus uzi ilin por suprenpuŝi la ĉielon. Poste, ni povus suprenflugi kun la ĉielo kaj farus spacon por ĉiu."

Ĉiuj bestoj konsentis, ke tiu estas bona ideo, kaj ili komencis kolekti bastonetojn. La Pigoj ĉiuj prenis grandajn bastonojn kaj komencis puŝi la ĉielon.

"Rigardu, ni sukcesas! La ĉielo! Ĝi moviĝas!"

La Emuoj kaj la Kanguruoj, la Vombatoj kaj la Goanoj sidadis kaj rigardis dum la Pigoj malrapide puŝis la ĉielon supren. Ili uzis la bastonojn kvazaŭ levstangojn, unue apogante la ĉielon per malaltaj ŝtonegoj kaj poste per malaltaj montetoj. Dum la aliaj bestoj rigardis, la Pigoj puŝis kaj streĉis sin, ĝis ili atingis la pinton de malgranda monto.

"Mumuk, mumuk! Almenaŭ ni povas ĉirkaŭmarŝadi."

Ankoraŭ estis tre mallume, sed almenaŭ Emuo povis rektiĝi, kaj Kanguruo povis movi sin per longaj, fieraj saltetoj. La Pigoj jaŭre puŝadis la ĉielon pli kaj pli alten, ĝis ili atingis la plej altan monton en la tuta lando. Poste, per grandega klopodo, ili finfoje puŝis la ĉielon. La ĉielo ĵetiĝis en la aeron kaj dum ĝi plialtiĝis, ĝi fendetiĝis kaj grandega inundo da varmo kaj lumo tratorentis sur la malsupran teron.

La bestoj miris pri la lumo kaj la varmo, sed pli pri la nekredible bunte farbita beleco de Sun-Virino. La tuta ĉielo estis plena de belaj ruĝoj kaj flavoj. Estis la unua sunleviĝo.

La lumo kaj la varmo ekstazigis la Pigojn kaj ili ekkantis. Dum ilia brua trilado disvastiĝis tra la lando, Sun-Virino malrapide leviĝis kaj komencis sian vojaĝon al la okcidento.

Nun, ĉiumatene, kiam Sun-Virino vekiĝas en sia ŝirmejo en la oriento, ŝi ekbruligas fajron por prepari la torĉon el arboŝelo, kaj dum ŝi surmetas sian farbon, la polvo de dispremita ruĝa okro kolorigas la frumatenajn nubojn bele helruĝe.

Poste ŝi prenas sian torĉon kaj komencas sian ĉiutagan vojaĝon trans la ĉielon.

Kiam ŝi atingas la okcidentan limon de la mondo, ŝi estingas la brulantan torĉon. Post tio, ŝi sidiĝas kaj refarbas sin per helaj ruĝoj kaj flavo. Tiel ŝi pretigas sin por la vojaĝo tra longa, subtera tunelo, al sia ŝirmejo en la oriento. Do jen kial ankoraŭ nun ĉiumatene kiam Sun-Virino vekiĝas kaj bruligas sian frumatenan fajron, ĉiuj Pigoj salutas ŝin per bela kantado.

Tr. David Poulson

...

LA TURISTO

Post pluraj semajnoj, dum kiuj la limoj de nia surpaŝebla mondo estis la dimensioj de la ŝipo "Patris", ni pasaĝeroj staris en densaj vicoj por surteriĝi. Antaŭ ni etendiĝis la haveno de la insulo Maŭricio, kaj nun atendis dekoj da vendistoj de turismaj fatrasoj. "Gesinoroj," aŭdiĝis la konata voĉo de la kapitano, "mi urĝe konsilas vin resti en grupoj sur la insulo kaj ne deflankiĝi de la ĉefaj vojoj. Oni raportis lastatempe pri tumultoj kaj prirabado al turistoj. Gardu vin bone!"

Ha! mi pensis. Ĉu mi restu en turista grego kaj vidu nur la falsan fasadon starigitan por vizitantoj? Ne, mi volas vagi sola kaj sperti la veran vivon de la maŭricianoj...

Doganaj formalaĵoj kaj monŝanĝo. Bone, ek al aventuro --- estis mia unua vizito eksterlanda. Ducent metrojn for de la haveno mi apartiĝis de la kunpasaĝeroj kaj sekvis padeton, kiu certe kondukus min al la Vera Maŭricio. Mi kompatis la ceterajn pasaĝerojn, neaventuremajn kaj trompotajn.

Tre baldaŭ mi renkontis tiun Veron. Neniaj vortoj sukcesus bildigi la ŝokon, kiam naiva kaj impresiĝema civitano de riĉa lando staras la unuan fojon en mizera kvartalo de "triamonda". Svarmaj bruoj de kriado, plorado de infanoj kaj jelpado de hundoj; trudaj vidimpresoj de amaso da liliputaj kabanaĉoj, ĉiu pli malbela kaj facile forblolvebla ol la najbara, inter kiuj moviĝas miloj da malgrasaj homoj en kotkoloraj ĉifonoj; sed plej neforqeseble, sinkroĉa simfonio de fetoroj, en kiu ĉefroladas diversfontaj fekaĵoj kaj urino...

Dum iuj sekundoj mi sukcesis imagi, ke mi naskiĝis en ĉi tiu loko kaj seneskape pasigos la tutan vivon katenita al ĝi --- kaj kiom ŝanĝiĝis mia tuta vivperspektivo!

Sed vomemo ŝiris min el tiu mensostreĉo kaj mi konstatis, ke mi, pure vestita turisto kun mono en la poŝo, sunokulvitroj sur la nazo kaj fotilo apogata ĉirkaŭ la kolo, groteske min trudas en fremdan mondon.

Kion fari? Ĉu tuj retreti kaj cedi, ke mia "aventuro" estas stultaĵo? Neeble! Provante elekti, kien meti la piedojn --- estus domaĝe, se la merda koto makulus miajn novajn ŝuojn --- mi puŝis min antaŭen.

Kaj nun la loĝantoj de tiu mondo atentis la fremdulon. Ekestis la himno de bonveno: "Rupion, sinjoro, rupion!" Mi ja emis doni iom da mono al ili (noblesse oblige), sed ili estis tiom, ke eĉ se mi malplenigus miajn poŝojn, estus kvazaŭ mi volus estingi arbarvoran fajregon per taso da akvo. Do mi ignoris la kriplulojn, la blindulojn kaj la ĉieajn infanojn kaj senkore tramariŝis la fremdan teritorion, kies homoj baldaŭ akceptis, ke ne penvaloras almozpeti de mi, kvankam tie kaj tie iu levis iom senurĝe la vanan krion pri rupio.

Tiele mi iom post iom proksimiĝis min al la fino de tiu odoraĉa

strato, supozante, ke post la angulo estos simila mizerejo travadenda.

Tiam mi vidis ŝin; mi intuciis, ke estas virino, kvankam mankis al ŝi ĉio agrable ina. Apenaŭ vivanta aŭŝvicanino, sidante en koto sur senkarnaj gluteoj, havante nur unu kruron, blinda, "vestite" nur per iuj ĉifonstrioj, la malgrasegulino ŝajnis esti giganta bruna insekta skeleto. Ke ŝi estas homa, pruvis nur la etendita mano kaj la raŭka krio, kvazaŭ de knara ĉarniro: "Rupion!" Jen, mi diris al mi, la plej kompatinda homo sur ĉi tiu planedo. Mi metis rupion en la manon, kiu malaperigis la moneron ie inter la faldoj de la vestaĉo. Anstataŭ danki, ŝi ĵetis miadirekten la manon kaj refoje elgurdis: "Rupion!"

Centoj da atentaj okuloj vidis la transdonon: tuj min ĉirkaŭis dekoj da knaboj, ĉantante "Rupion!" Je mia paniko ili provis ŝovi manojn en miajn poŝojn, fortiri miajn fctilon kaj vestojn kaj puŝi min tien kaj reen. Danĝero senpensis min.

Sed same subite la knaboj diskuris kaj lasis min integra. Kial? Du policistoj ŝvingante longajn bastonojn alkuris min. Sendube bato de tiu bastono dolorus...

Unu el la policistoj salutis kaj diris ĝentile sed riproĉe, "Sinjoro, ne estas bone, ke vi estu ĉi tie." Ili gvidis min tra labirinto refoje sur la ĉefan straton, kie mi iom kulposente roc troviĝis inter miaspeculoj, la pasaĝeroj de la "Patris". Mi suspektis, ke la policistoj rigardis min la tutan tempon. Por ili mi ja estis turisto, ĝena turisto.

Mi supozas, ke tiu sperto instruis al mi ion, sed mi ankoraŭ ne scias, kion.

Trevor Steele

...

ANOJ DE LA 27a AEA KONGRESO EN MELBURNO (UNJA LISTO)

- | | |
|-------------------------|------------------------|
| 1. Gale, Brig. I. (Vic) | 2. Kanaĉki, N.S. (Vic) |
| 3. Fallu, J. (Vic) | 4. Fallu, I. (Vic) |
| 5. Beechey, H. (Vic.) | 6. Young, M. (Vic) |
| 7. Cuthbert, S. (Vic) | 8. Tumman, G. (Vic) |
| 9. Tumman, R. (Vic) | 10. Heinze, B. (Vic) |
| 11. Wearing, M. (SA) | 12. Wearing, B. (SA) |
| 13. Anderson, A. (Qld) | 14. Phillips, G. (Qld) |
| 15. Ross, R. (NSW) | 16. Ross, P. (NSW) |

- | | |
|--------------------------|--------------------------------|
| 17. Koppel, H. (Vic) | 18. Koppel, F. (Vic) |
| 19. Turner, J. (Qld) | 20. Enderby, K. (NSW) |
| 21. Enderby, D. (NSW) | 22. Aulsebrook, W. (NSW) |
| 23. Aulsebrook, E. (NSW) | 24. Cocking, A. (NSW) |
| 25. Cocking, P. (NSW) | = 12 Vic., 8 NSW, 3 Qld, 2 SA. |

...

La 15an-16an de aprilo 20 anoj de la Esperanto-Federacio de Kvinlando partoprenis konferencon en Caloundra. La veteredioj bonvolis donaci sunplenajn tagojn por ĝi, kontraste al la pluvtagoj tuj antaŭe kaj poste. Speciala plezuro estis partopreno de anoj de la Esperanto-klaso U3A (Universitato de la 3a Aĝo) en Caloundra. Distraj eroj inkludis viziton al la Pulbazaro, al la nova Kajo por Fiŝkaptantoj, kaj koncerton en la Caloundra Kulturo-Centro. La unua konferenco 1990 okazos en Toowoomba.

La Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio kolektas monon por aĉeti propran Esperanto domon. Oni kolektis ĝis nun \$8 000, bona komenco sed multe pli estas enspezenda.

EL TANZANIO

venis letero: "Mi estas malfeliĉa rifuĝinto el Zairo, studinto en universitato sed rajtos nenian laboron en tiu ĉi lando. Mi korpe kaj spirite suferas. Okazas, ke mankas al mi eĉ manĝaĵoj, poŝtmarkoj, kaj multaj necesaĵoj. Mi estas fondinto de aktiva, agema kaj esperantema klubo sed bedaŭrinde konsistanta el malriĉaj rifuĝintoj. Mia klubo nomiĝas Kilimanĝaro Esperanto Klubo. Kilimanĝaro estas la nomo de la plej alta kaj fama monto de Afriko. Ni prunteprenis tiun nomon, ĉar ni esperas ke supre de ĝi decideme ni disvastigos Esperanton en la tuta Afriko. Mi petas al vi helpi nian karan klubon." (Adreso: Lubunga Makano, Kilimanĝaro Esperanto Klubo, PO Box 1816, Tabora, Tanzanio.)

...

EL BULGARIO

(Ekstrakto el letero:) Antaŭ kelkaj tagoj mi, kiel vicprezidanto (de la grupo en Veliko Târnovo) malfermis la Esperanto-lernjaron en nia uni-versitato - 20 studentoj lernas Esperanton en daŭro de 2,5 jaroj kaj post 5 jaroj, kiam ili finos sian lernadon en la universitato, ili ricevos dokumenton kaj estos instruistoj de Esperanto. Post du semajnoj ni malfermos Esperanto-kulturan domon, ankaŭ en Veliko Târnovo.

Jordanka N. Ivanova


Estas rimarkinde, ke la registaro donis al la Esperanto-grupo la Esperanto-Kulturan domon, kiel ankaŭ apogon al la kurso. - La Red.

The Australian Esperantist

Numero 256

JULIO-AUGUSTO 1989

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



Kiu klare aludas (Niĉjo Nicholas)...p.3

Esperanto kaj kulturo (Ralph Harry)...p.5

Provu vian vortoscion (Donald Broadribb)...p.15

Gurukmun, la rano (Folkloro, tr. David Poulsen)...p.17

Kritiko pri la vortaro de J.C. Wells (Bernard Golden) p.21

Recenzo: Apple Macintosh Esperanto-kurso (Niĉjo Nicholas)...p.23

Novaj libroj ĉe la libro-servo...p.25

Radio en Melburno kaj aliaj esperantistaĵoj...p.26

English supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Hedaktoro: D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill
WA 6562. Telefono: (09) 574 1307.

Prezidanto: S-ro Trevor Steele, 7 O'Callaghan St, Holland Park QLD
4121.

Vicprezidantoj: S-ino Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.
Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: S-ro Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: S-ro Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: S-ro Owen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-servo: S-ro T. Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Membreco: \$25, por individuo, klubo, aŭ federacio; \$30 por familia mem-
breco (ĉiuj ĉe la sama adreso); \$15 (minimume) por pensiulo aŭ stud-
ento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-Servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la
adreslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la
redaktoro. Limdato por alsendo de presotaĵoj por la venonta numero: 1
septembro.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron
de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST, "ni vere bezonas artikolon pri..."? Do
sendu al ni tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de
vidpunkto, ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston,
bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare
tajpita, kun duobla spaco inter la linioj, kaj marĝenoj de almenaŭ 2
centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaĵaj tekstoj
estos malakceptitaj. Por konservi la lingvonivelon de ĉi tiu gazeto la
redaktoro rajtas lingve korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Se la
disponibla spaco aŭ la stilo de la verko necesigos tion, la verko povos
esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la
tuj sekvonta numero, krom se temas pri kronologie urĝaj tekstoj. Ankaŭ
anglalingvajn tekstojn por la angla suplemento ni bonvenigos.

KIU KLARE ALUDAS

Ho, potenculoj falegas,
eĉ dum ili popolon pistas
tanke, kaj fajron sur homojn sagas,
kaj venĝe teroron insistas.

Ili tamen falas,
kaj falas tre malalten, ruine;
punpagas, pro ke antaŭe patrolis
la mensojn, juĝiĝas fine.

Morta.

Kuraĝu, homoj, vi kuraĝos!
Neniel feras ilia volo.
Antaŭ homuro ili fuĝos,
fuĝos antaŭ popolo.

Tre morta,
li kuŝas tie, sangolinio en defluilon.
Kial morta? Vorteble, vortu, vortu,
sed ne malfareble.

Kaj eĉ falante, ili
barakte provas aserti mensogojn:
hastas ekzekuti, torturi, makiaveli,
deklari vante monologojn.

Ne malfareble,
li kuŝas sub nebulo de larmigogaso,
disipiĝanta pro maŝinpafilaj ekkrakoj;
policanoj preterkuras kun bastonoj,
ĵurnalistoj kaŝfilmas
lin, solan en la placo.
Li ne leviĝos.

Ho, potenculoj falegas,
 eĉ dum ili animojn turmentas
 karcere, maljuston sur homojn plagas;
 eĉ dum homaro lamentas.

Li ne leviĝos.
 Kugloj haltigis la demonstracion. Lin memoru.
 Vi scias, pri kie mi parolas.

Ho, potenculoj falegos.

Ho, potenculoj falegos.

Ho, potenculoj falegos.

Niĉjo Nicholas

| * | * | * | * |

Neniu homo estas insulo, kompleta en si mem; ĉiu homo estas parto de la kontinento, parto de la ĉeftero. Se la maro forlavas bulon, Eŭropo estas pli malgranda, kvazaŭ promontoro malaperus, kvazaŭ domo de viaj amikoj aŭ de vi mem; la morto de kiu ajn min malgrandigas, ĉar mi estas parto de la homaro; sekve, ne demandu pri kiu mortsonoras; oni sonorigas pro vi.

John Donne

ESPERANTO KAJ KULTURO

Kultura interŝanĝo en multkultura mondo
Kulturaj valoroj de la Esperanta Komunumo
en Unuiĝanta Mondo

Esperanto kaj la Registaroj

En alia parolado mi preparolis la rilatojn de la Esperanto-Movado kun la registaroj dum la 100 jaroj de nia historio, pri la klopodoj de la landaj asocioj akiri la komprenon kaj permeson de la registaroj, pri la tragedioj de diktatoraj naciismaj reĝimoj, kiuj malpermesis la instruadon, persekutis la Esperantistojn, bruligis esperantajn librojn. Mi menciis ankaŭ la helpon, kiun donis kelkaj registaroj, kiuj celis internacian kunagadon, aŭ kiuj trovis en Esperanto ilon por nacia informado aŭ propagando.

Mi notis, konklude, ke oni persvadis kelkajn internaciajn organizojn uzi Esperanton por informado kaj en kelkaj limigitaj programoj - mi menciis la Internacian Labor-Organizon kaj UNESKO-n ekzemple - sed ke ni ne sukcesis atingi decidon de la registaroj uzi Esperanton kiel oficialan lingvon en la Ligo de Nacioj aŭ en Unuiĝintaj Nacioj, aŭ en kiu ajn grava interŝtata politika organizo. Ni ne konvinkis la registarojn, ke tiaj organizoj bezonas neŭtralan (t.e. nenacian) internacian lingvon.

Tio estis, por mi persone, bedaŭrinda situacio, ĉar kiel diplomato, kiu pasigis multajn jarojn kiel reprezentanto de Aŭstralio en diversaj internaciaj organizoj, mi pli kaj pli konvinkiĝis, ke la diplomat-oj pli efike agas kaj ke internaciaj organizoj pli bone funkcias, se ili akceptas Esperanton. Almenaŭ ĉiuj ŝtato-membroj estus egalaj! Mi certe esperas, ke la Esperanto-movado ne ĉesigos sian agadon sur tiu kampo.

La Raŭmismoj

Sed, kiel mi notis, estas skolo (la "raŭmismoj"), kies membroj konsideras, ke la klopodado celanta oficialigon de la lingvo estas perdo de tempo, eĉ malsaĝaĵo, ke Esperanto ne estas preta, aŭ ke la momento ne venis por persvadi registarojn fari tian decidan paŝon. Mi firme kredas, ke laŭ lingva vidpunkto Esperanto estas jam preta. Mi helpis traduki sufiĉe da internaciaj dokumentoj en Esperanton por

atesti pri tio. Sed mi respektas ankaŭ la argumentojn de la amikoj, kiuj rekomendas la alian vojon. Ni tion ekzameni.

Diskutoj en Segedo, Hungario, en Julio de la pasinta jaro emfazis "la bezonon, ke la esperantistaro kapablu realigi, tuj kaj minoritate, sian modelon de internacia travivaĵo..." Oni substrekis la "kvalitajn bezonojn" de la ekzistantaj esperantistoj, tra kies kontentigo, oni argumentis, "Esperanto fariĝas pli alloga, pli influa, pli granda, kaj la bildo de Esperanto entute pli prestiĝa". Mi citos la finan alineon:

La ekspansio de la fenomeno "Esperanto" estas nedisigebla de la ekspansio de ĝiaj kulturvaloroj. Ĉia taktiko, kiu ne konsideros ĉi tiun strategian celon ŝajnas kondamnita al fiasko.

Do ni ekzameni la kulturajn valorojn kaj ilian situacion en nia multkultura mondo:

- (a) la signifon por la paco kaj bonstato de la mondo de interkompreno per la kultura interŝanĝo, kaj la rolo de Esperanto tiurilate;
- (b) la apartajn kulturajn valorojn de la Esperanto-movado kaj la ebleco, ke tiaj valoroj allogus homojn kaj persvadu ilin lerni nian lingvon;
- (c) kiel ni povus informi la publikon pri tiuj valoroj, kaj kiel ni povus pligrandigi tiajn valorojn.

Eble la sperto rilate komunajn lingvojn en multkulturaj landoj helpas en la analizo de la situacio kaj la eblecoj.

Aŭstralio - Multkultura Lando

Ni multe parolas en Aŭstralio pri nia multkultura socio, kies ĉefaj trajtoj, mi sugestas, estas:

1. Agnosko ke enmigrintoj kunportis gravajn kulturajn valorojn. Bedaŭrinde, kelkaj ankaŭ kunportis antikvajn kverelojn, kiuj ne estas aferoj, kiuj tuŝas la interesojn de Aŭstralianoj.
2. La rajto paroli la lingvon de la antaŭa patrolando, kaj instrui ĝin al siaj infanoj;
3. La rajto praktiki la religion aŭ sekton de antaŭa lando;

4. La rajto organizi etnajn komunumojn por konservi, praktiki kaj eĉ diskonigi sian kulturon.

Kompreneble, kiam mi parolas pri "kulturo" mi ne aludas nur al literaturo, arto, dancado, muziko ktp sed ankaŭ pri manĝaĵo, vestoj, kaj ĉiuj familiaj kaj sociaj kutimoj.

La multkultureco de Aŭstralio, tamen, evoluas en la kadro de la nacio "Aŭstralio" - la kultura diverseco estas aspekto de unuigita ŝtato, kiu havas sendependan juran personecon en la mondo.

Estas kelkaj esencaj elementoj en la nacia unueco:

1. La juro estas, kaj devas resti, la sama por ĉiuj civitanoj;
2. La politikaj kaj aliaj homaj rajtoj estas la samaj por ĉiuj civitanoj;
3. Ĉiu civitano havas la samajn devojn rilate la ŝtaton.

Por ĉiuj kaj ekzerci la samajn rajtojn, egale, civitanoj nepre devas posedi la komunan lingvon kaj havas devon ĝin lerni. Kompreneble, dum ili lernas, se ĝi ne estas la gepatra lingvo, ili rajtas ricevi helpon de la ŝtato por kompreni la juron, la aferojn de la socio, siajn rajtojn kaj oportunojn ktp - ekzemple en tribunaloj, en la fabrikoj, rilate voĉdonojn, en hospitaloj, dum referendumo. Kiam mi vizitis hospitalon por radiografio estis afiŝo, kiu min pridemandis en dek lingvoj: "Ĉu vi estas graveda?"

Aŭstralio jam havas komunan lingvon, la aŭstralian anglan, do internacia lingvo ne havas gravan rolon ĉi tie por interkomprenigi etnajn komunumojn, kvankam tio eble iomete okazas. Esperanto servis, laŭ mia sperto, en tiu rolo en Belgio... sed en lando kun nur du lingvoj oni povas simple lerni la alian! Ĝi povus servi en Svislando, kie malmulte da svisoj posedas ĉiujn kvar lingvojn.

Fakte, Aŭstralio estas bona modelo de la neceso de komuna lingvo en multkultura socio, aparte en tutmonda socio aŭ komunumo.

En Aŭstralio, per la komuna lingvo, ĉiu komunumo kaj individuo povas komuniki kun ĉiu alia, diskonigi siajn kulturajn trezorojn, sed samtempe oni povas, uzante, se oni deziras, etnan lingvon - eĉ la anglan - praktiki sian ŝtatatan kulturon.

En Aŭstralio oni ne multe lernas la lingvojn de aliaj komunumoj - kelkaj lernas la italan kaj la germanan, sed ne multaj lernas la nederlandan aŭ la modernan grekan - ĉiuj lernas iom pri la aborigena kulturo sed tre malmultaj neaborigenoj lernas aborigenan lingvon - oni iomete tradukas la literaturon de Aŭstraliaj verkistoj el la greka, hispana kaj serbokroata en la anglan.

Sed ankaŭ oni povas observi, ke, post 200 jaroj, evoluis aparta aŭstralia kulturo. La fakto, ke la komuna lingvo estas la angla helpis pligrandigi la influon de la brita-irlanda kulturo de la unuaj setlantoj, kaj de la ĉefaj enmiĝintoj de la 19-a jarcento. Sed oni akceptis elementojn de la germana, la itala, la japana kaj ĉina, eĉ la vjetnama kaj la usona!

Multkultura Mondo

La mondo de nia planedo estas treege multkultura, kun diversaj lingvoj, religioj kaj regsistemoj. Tiuj kulturoj intermiksiĝas kiam estas komuna lingvo kaj politika komunumo - kiel okazis en la imperioj romia, portugala, hispana, brita, franca kaj rusa.

Estas verŝajne, almenaŭ teorie, ke se oni akceptus internacian lingvon, estiĝus internacia komunumo, kies kulturo enhavus elementojn el ĉiuj signifaj naciaj kulturoj. Sed tio evoluus laŭ etapo.

La unua etapo estis konatiĝo de aliaj kulturoj, per tradukado aŭ originalaj priskriboj de ekzistantaj kulturoj. La fiera nacio elektus verkojn "gravajn" aŭ ŝtatatajn por traduko. La okupata leganto elektus verkojn, kiujn, laŭ la recenzoj aŭ spertoj li konsideras la plej interesaj. Tio estis la bazo de la frua tradukado de klasikaj ĉefverkoj kaj la eldono de antologioj. Kiel ni scias novaĵ gravaj antologioj kaj tradukoj de kompletaj verkoj aperis en la jaro de la Centjara Jubileo de Esperanto.

Dua etapo estis verko de libroj kiaj "Aŭstralio: Lando kaj Popolo", "Jugoslavio kaj Ĝiaj Popoloj", "La Fenomeno Svislando" kaj "Sepdek-sep Slosiloj al Japana Kulturo". Tiuj estas pli ol nur turistaj broŝuroj kaj doris al Esperantistoj resuman erkondukon en la vivon de aliaj landoj kaj ties historio.

Samtempe, per la internacia lingvo oni partoprenis en vojaĝoj kaj kongresoj kaj faris personajn kontaktojn per senpera sperto de la kutimoj kaj vidpunkto de aliaj per procezo de "natura selekto".

Kulturaj Interŝanĝoj

Dum multaj jaroj la ŝtatoj agnoskis la valoron de tiaj interŝanĝoj. La fama komisiono pri intelektaj interŝanĝoj de la Ligo de Nacioj sub prezidado de la filozofo Henri Bergson de Francio ne oficialigis Esperanton, sed ĝi kuraĝigis kelkajn kontaktojn inter ekzemple la instancoj de naciaj muzeoj. La Ligo de Nacioj ankaŭ eldonis utilan raporton pri la instruado de la internacia lingvo.

UNESKO, kreita post la Dua Mondmilito, havis noblan celon - helpi pri la konservado de la paco per forigo de miskomprenoj kaj malpacaj ideoj en la mensoj de homoj. Sed ĝi heredis kelkajn nesufiĉajn kutimojn de sia antaŭulo, la Komisiono pri Intelektaj Interŝanĝoj. La Ĝenerala Konferenco de 1949 decidis antaŭenigi la reciprokajn interkomprenon de la popoloj de la mondo per interŝanĝo de kulturaj ekspozicioj preparitaj de membroŝtatoj! Kaj Aŭstralio preparis ekspozicion pri la Aborigenoj!

Sed UNESKO poste plilarĝigis siajn programojn. Ĝi stimulis kaj helpis la konservadon de gravaj arkitekturaj artaĵoj (ekzemple Abdu Simnel apud la Rivero Nilo, kaj temploj en Azio) kaj naturaj fenomenoj (ekzemple la arbaroj de Sud-okcidenta Tasmanio!). Ĝi kunordigis kaj kuraĝigis sciencistojn, ĝi helpis malriĉajn landojn forigi analfabetecojn.

En 1954 la Ĝenerala Konferenco akceptis rezolucion, kiu agnoskis la gravecon de Esperanto rilate la celojn de UNESKO. Tiu rezolucio estis la rezulto de jaroj da laboro en multaj landoj - ekzemple en Aŭstralio ni preparis por la registaro, kiu sendis ĝin al UNESKO, raporton pri la rezultoj atingitaj por kaj per Esperanto en ĉi tiu lando. Kaj dum la Konferenco en Montevideo la urugvajaj Esperantistoj kaj internacia teamo sub la gvido de Ivo Lapenna triumfis super ĉiuj obstakloj. UEA konsekvence ekhavis konsultan statuson ĉe UNESKO kaj poste ĉe UN. UNESKO eldonis informan broŝuron en Esperanto kaj afiŝojn kaj unu-du rezoluciojn pri internacia edukado kun Esperanto-tekstoj.

Eble la plej signifa paŝo sur la kampo de kultura interŝanĝo estis la komenco, sub la aŭspicio de UNESKO, de la eldon-serio Oriento-Okcidento, en kiu aperis ĝis nun pli ol 20 gravaj literaturaj verkoj el Japanio, Hindio, Ĉinio, Anglio, Francio, Portugalio kaj aliaj landoj, do vere signifa kontribuo al la interŝanĝo de literatura kulturo inter Oriento kaj Okcidento. Multaj aliaj ĉefverkoj aperis dum la unua jarcento de Esperanto - centoj, el preskaŭ ĉiuj landoj.

Strange, oni ne inkludis en la Serio Oriento-Okcidento la unikajn antologiojn de nacia literaturo, kiuj aperis en Esperanto en dekduo da landoj. Eniris tiun serion nur la libro "Elpafu la Sagon", la kolekto de kantoj el la evoluantaj landoj, elserĉita kaj tradukita de Tibor Sekelj, la jugoslava antropologo kaj esploristo.

Sed UEA akceptis nian Aŭstralian Antologion. Mi argumentis, ke tia antologio, kiu prezentas ekzemplojn de la verkado de multaj aŭtoroj (64 aperas en la A.A.) estas eĉ pli utila kontribuo al kultura interŝanĝo ol ununura elstara romano aŭ poemaro de unu nacia aŭtoro. Do ĝi partoprenas la kulturalan programon de UNESKO.

Kompreneble oni ankaŭ helpis internacian komprenon per tradukoj en la naciajn lingvojn, sed la esperantaj antologioj estas unika aro. Multaj estas el lingvoj kaj literaturoj ne multe konataj ekster la koncernaj landoj. Kiam mi iris al Svislando en 1953 kiel Ĝenerala Konsulo de Aŭstralio mi lernis pri la svisa literaturo en la germana, itala kaj romanĉa lingvoj pere de Svisa Antologio (mi jam scipovis la francan lingvon). Same pri la flandra kaj valona literaturo de Belgio mi legis en Esperanto en 1965, kiam mi fariĝis Ambasadoro en Bruselo.

La antologioj ne estas nur pli ampleksaj ol la tradukaĵoj en naciaj lingvoj, sed ili estas faritaj de personoj, kiuj vere amas kaj sian propran lingvon kaj nian "verdan" lingvon.

La Eksto kaj Evoluo de Internaciaj Etiko kaj Kulturo

Same kiel fruaj esploristoj, kiam ili raportis pri kanĉuruoj, estis nomitaj frenezuloj, ĉar tia besto ne povas ekzisti(!), tiel kelkfoje eĉ honestaj homoj, kiuj neniam rerkontis Esperanton, asertas, ke artefarita lingvo ne povas havi literaturon, ĉar la lingvo ne estas uzata de aparta komunumo.

^ Nu, mi scias, ke estas vigla kaj valora literaturo en Esperanto. Du tio provas, ke estas ja aparta internacia komunuo, kun speciala kulturo, kiu generis tiun literaturon? Mi kredas, ke jes, kaj ankaŭ ke tiuj internaciaj komunumo kaj etiko evoluas paralele kun la komunumo de la Esperanto-movado.

En sia grupo Fay Koppel, same kiel ŝi faris en pluraj Aŭstraliaj Kongresoj, prezentas la originalan Esperantan literaturon. Mi esperas, ke ĉiuj el vi ĝuas la legadon de la romanoj, poezio, eseoj, noveloj kaj aliaj verkoj de talentaj esperantaj aŭtoroj. Tio estas por konvinkita Esperantisto vera plezuro, eĉ se li/ŝi ne perfekte posedas la lingvon. Konatiĝo kun nia literaturo estas ofte la konvinka fakto, kiu persvadas homojn serioze tralerni Esperanton.

La demando, ĉu la originala Esperanta literaturo estas grava objekte, laŭ tutmondaj normoj, estas malfacila, ĉar nur spertulo pri literaturo kaj pri la esperanta lingvo povus ĝin taksi. Tamen mi observas, ke la komitato por aljuĝi Nobel-premiojn kutimas kompari la verkaron de aŭtoroj el multaj landoj ... verkaron, kiu ofte konsistas el multaj volumoj. Oni povas starigi kriteriojn, kiuj aplikiĝus ankaŭ al verkado en internacia lingvo. Ekzemple, ĉu la koncerna aŭtoro estas legata ekster sia propra lando, ĉu liaj verkoj estas tradukitaj en aliajn lingvojn ktp.

Mi ne atendas, ke oni akceptu mian propran takson, ke la plej bonaj esperantaj novelistoj, romanistoj, kaj poetoj ne suferas per komparo kun tiuj de kelkaj gajntoj de la Nobel-premio, aŭ de la premio Booker (por romanoj verkitaj en la angla lingvo). Mi ne estas specialisto pri literaturo, kaj eble ionete neobjektiva! Ni apliku la testojn objektivajn.

Multaj verkoj en Esperanto ja estas tradukitaj en aliajn lingvojn. Laŭ "Esperanto en Perspektivo" ĝis 1973 64 verkoj en Esperanto estis jam tradukitaj en 35 lingvojn, ĉefe orientajn. El tiuj 35 estis romanoj aŭ rakontoj. En la pasintaj 15 jaroj multaj aliaj libroj originale verkitaj en Esperanto tradukiĝis. Oni anoncis en ESPERANTO en la numero de decembro, 1988, ke la epopea poemo de William Auld, "La Infana Raso" estis tradukita en la hungaran. Kelkaj poemoj de Kalocsay estis tradukitaj en la anglan. Mi mem tradukis en la aŭstralian poemon de Ĉina esperantisto (Bathhouse), kiu aperis en la revuo REDOUBT de la Kanbera Kolegio de Supera Edukado.

Aliaj testoj estus: "Ĉu la verko estas represita?" kaj "Ĉu oni reeldonis la verkon post la morto de la aŭtoro?" kaj "Ĉu oni citas el la verko en alia verkado?" Laŭ tiuj testoj multaj literaturaĵoj estas valoraj laŭ tutmondaj normoj.

Oni povus paroli ankaŭ pri la uzado de Esperanto kiel pontlingvo por literaturo, same kiel por sciencaj kaj teknikaj verkoj. Yosimi Umeda promesis, ke li tradukos la esperantan version de "La Diplomato Kiu Ridis" en la japanan!

Sed ni devas reveni al niaj ŝefoj, kiel diras la francoj. La demando estas: ĉu tiu literaturo fontas el, kaj respiegulas, kiel faras kutime nacia literaturo, la kulturon de aparta komunumo, de interesa komunumo, de alloga komunumo?

Mia respondo estas: "Ja, jes!"

Kiaj Estas la Esperantaj Komunumo kaj Kulturo?

La Esperanta Komunumo estas tute nova fenomeno en la mondo... internacia komunumo ne ligita al aparta nacio, religio aŭ socia partio. Ĝi konsistas el centmiloj (ni ne debatu pri la preciza cifero) da homoj el ĉiuj kontinentoj, rasoj, naciecoj, ligitaj per lernado de la internacia lingvo. Ne multe gravas por kiuj celoj ili ĝin uzas - la uzado estas interkomunikado inter homoj de diversaj ŝtatoj, de diversaj kulturoj. Ne multe signifas, ĉu ili interesiĝas ĉefe pri religio aŭ pri poŝtmarkkolektado. Se ili komunikas kun personoj ne kiel samlandanoj, sed ĉar ili estas homoj, kaj se ili uzas la internacian lingvon sur bazo de egaleco, ili vole-nevole helpas pri la evoluigo de unika tutmonda komunumo.

Fakte, laŭ miaj sperto kaj observado, loĝinte en 10 diversaj landoj, preskaŭ ĉiam estas troveblaj en la vidpunkto de Esperantistoj, ĉu en Eŭropo aŭ Nord-Ameriko aŭ Sud-Ameriko, aŭ Afriko, aŭ Azio, aŭ Aŭstralio, komunaj trajtoj, ekzemple:

1. kompreno de la fakto, ke la ordinaraj homoj de ĉiu lando estas homaranoj, kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj;
2. kompreno de la fakto, ke, kvankam komence la kutimoj en aliaj

landoj ofte ŝajnas strangaj, kiam oni enketas senpere, amike, oni trovas, ke estas kialoj de la diferenco inter tiuj kutimoj kaj la niaj;

3. kompreno, ke la paco estas preskaŭ ĉiam bona, kaj ke la konflikto kaj la milito estas preskaŭ ĉiam malbonaj, ke solvo de disputoj per paca intertraktado estas preskaŭ ĉiam preferinda, kompare kun perforto, eĉ se onia nacio pravas!

4. kompreno, ke la mondo estas unueca, ke ĝiaj naturaj riĉaĵoj estas limigitaj, kaj ke la homaro devas protekti sian medion kaj konservi siajn nerenovigeblajn riĉaĵojn (ekzemple siajn aeron, arbarojn, grundon, petrolon kaj mineralojn);

5. kompreno, ke la ekzisto de nukleaj armiloj, kaj de kemiaj armiloj, kaj de grandaj stokoj de "tradiciaj armiloj" estas risko al la tuta homaro, kaj ke estas urĝe atingi interkonsenton por la forigo de nukleaj kaj kemiaj armiloj kaj la minimumigo de aliaj armiloj.

6. kompreno, ke la homaro bezonas - kaj espereble trovis bonan komencan fundamenton en la Deklaracio de Homaj Rajtoj - sistemon de internacia juro, kadron en kiu diversaj nacioj povas krei kaj administri nacian juron taŭgan en sia propra komunumo.

7. kompreno, ke super ĉio oni rajtas liberecon kontraŭ enkarcerigo pro paca politika agado;

8. kredo, ke libera interkomunikado helpas al la solvo de miskomprenoj kaj disputoj kaj tiel helpas eviti militon.

Kiel Oni Plibonigas, kaj Faras pli Alloga, tiun Internacian Kulturon?

La internacia "kerna kulturo" aŭ "kadra kulturo" espereble evoluos iomete ne nur en la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon, sed ankaŭ per la kresko de internaciaj kontaktoj per interpretistoj, per kunlaborado en UN kaj aliaj interŝtataj organizoj, ekzemple WFUNA aŭ Amnestio Internacia, aŭ per la internaciaj eklezioj.

Sed nia kredo, aŭ almenaŭ la mia, estas, ke per persona korespondado, per vizitoj kaj kunvenoj, kie ĉiuj povas esprimi siajn ideojn libere kaj egale, tiuj internaciaj etiko kaj etoso plej rapide kaj plej efike stariĝas.

Por plibonigi kaj plirapidigi tiun evoluon estas esence, ke ni celu la poluradon de la lingvo, la kompletigon de la terminaro de internacia kunlaborado. Estis tiucele, ke mi planas, kun la helpo de UEA, eldoni tekstaron de la dokumentoj de internaciaj rilatoj kaj de internacia kunlaborado. Mi jam donacis 2000 guldenojn al la Stipendia Fonduso por helpi junulojn partopreni en Pacifikaj Kongresoj, kie ili konatiĝos kun aliaj junuloj de nia regiono. Ni devas daŭrigi kaj intensigi individuajn kaj grupajn vojaĝadon. Ni devas subteni la verkantojn de libroj kaj gazetoj, kiuj agadas en la dissendado de ideoj. Ni devas montri, ke la Esperanto-komunumo estas vigla, vivoplena, ĝoja afero.

Sed ankaŭ ni devas samtempe informi la registarojn, kaj peti ilian helpon por projektoj, kiujn nur registaroj povas efektiviĝi. Ni ne devas ĉiumonate humile peti la aprobon de registaro - nia lingvo, kaj nia komunumo, memstare ekzistas kaj floras. Sed ni rajtas sugesti, de tempo al tempo, ke estus bone se la ŝtato helpus pri la instruado de evidente bonega lingvo, ĉu ne?

Mi ne kredas, ke mi vidas dum mia vivo tutmondan ŝtaton aŭ eĉ konfederacion, kun Esperanto kiel ĝia oficiala lingvo, aŭ dua lingvo. Sed mi ja observas, ke same kiel post la katastrofo de la Dua Mondmilito la popoloj de la mondo sin turnis al la organizo Unuiĝintaj Nacioj por savi estontajn generaciojn kontraŭ la plago de milito, same nun ili reiras al UN por trovi komunumon, kiu savu nian planedon de nova katastrofo. La Esperanto-movado povas provizi modelon por Unuiĝinta Mondo.

Ralph Harry

(Prelego en la Somerlernejo de AEA, Adelajdo, 1989)

...

LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO

anoncas ke la 1990 Nov-Zelanda Kongreso okazos 5-7 de januaro ĉe The Central Institute of Technology, en Heretaunga N.Z. Detalajn informojn de A. J. Knight, P.O. Box 41-172, St Lukes, Auckland 3, Nov-Zelando.

WINDOW ON THE WORLD

ESPERANTO CENTRE IN NIGERIA

The idea of starting a project of this nature was formulated in 1960 by three eminent Nigerians: P.F. Ononiwu, S.C. Anurigwo and C.I.G. Uhuegbu. The following year Anurigwo left for London, while Uhuegbu left for France. In 1983 Uhuegbu returned to Nigeria and discussed the Esperanto project with Sam Anurigwo and P.F. Ononiwu. On Dec. 1, 1985 the MGUM Research Centre was inaugurated in Orodo by the representative of the Iwo State Government, the then Commissioner for Information, Culture, Youth and Sports, Dr Linus U. Akunnakwe, and the two French representatives of the French embassy in Nigeria, Robert Rodriguez and Dominic Piquer. As a result of hard work and determination to reduce communication problems confronting mankind, and in an effort to foster unity both in and outside of the UN, the Centre was honoured nationally by the State Chairman's Honours Award of N.Y.S.C., presented by C.I.J. Unuegbu on behalf of the former Governor of Cross River State, Col. Dan P. Archibong.

Today P.F. Ononiwu through his untiring efforts for Esperanto has drawn the attention of the world to Orodo, which he has chosen to be the National Centre for the study of Esperanto. The dream of Nigerian Esperantists has come true.

Sam C. Anurigwo

(Extracted from a speech given on the occasion of a visit by a delegation of the British Esperanto Association, Jan. 12, 1989.)

...

FAX A HUNDRED YEARS OLD IN SEPTEMBER?

Well, not quite, but the closest thing to it! To celebrate the 100th anniversary of the first publication of an Esperanto journal, LA ESPERANTISTO, Sept. 1, 1889, a duplicate of that first issue will be made available by fax throughout the world, at the price of US\$10.00. Most companies, schools, and virtually all post offices in Australia have fax machines, so a copy is easily available to everyone. For details and orders, contact Roland Schnell, Laborgrupo "FAX", Möckernstr. 71, D-1000 Berlin 61, Germany. Please include your name, address, and fax number. (Contact your local post office if necessary.)

A BYTE OF THE APPLE

If you have an Apple Macintosh Computer, you may be interested to learn that an Esperanto course is available on disk for the Apple Mac. Titled "An Introduction to the International Language Esperanto: a HyperCard Text" by Michael Urban, 1988, it is suitable for the MacPlus onwards. The compiler has authorised copies. If interested, send a 3½" disk and stamped self-addressed mailing envelope to Nick Nicholas, 17 Renowden St, Cheltenham Vic 3192.

...

MELBOURNE RADIO

Radio 3ZZZ, 92.3 FM Stereo, has recently been established in Melbourne as an ethnic radio service. The Melbourne Esperantists have been successful in acquiring their own weekly Esperanto broadcast, Mondays from 12.45 - 1.00pm. The first program went to air on June 26. To our knowledge this is the first regular public Esperanto program in Australia. (There have been Esperanto radio courses in Esperanto previously, including the highly successful series "Jen Nia Mondo" in Perth a few years ago.) For details, please contact Svetislav Kanacki, 72 Jubilee St, Mt Waverley Vic 3149.

....

FOR THE PHILOSOPHICALLY MINDED

Retired professor of philosophy Evalco Pauli, in the city of Florianópolis, Brazil, had the dream of establishing a publishing house for philosophical works in Esperanto, concentrating on the classics and eventuating in an ambitious Philosophical Encyclopaedia. Now, seven years onward, his dream is being realised. On March 28, 1988, the legal statutes of the new Biblioteko Supera de Kulturo were formalised. Not one to wait quietly as bureaucracy takes its time, Prof. Pauli began publication of an Esperanto journal of philosophy, SIMPOZIO, which released its thirteenth issue in May of this year. Books too are a major objective. Philosophical typescripts are being collected, and photocopies made available to interested readers pending book publication. A translation of Plato's REPUBLIC into Esperanto from the Greek is one such manuscript currently being prepared by the editor of THE AUSTRALIAN ESPERANTIST.

THE JANUARY ESPERANTO CONGRESS IN MELBOURNE

The organisers of the forthcoming Congress in Melbourne are anxious to know whether there will be a need for a child-care service as a part of the Congress arrangements. If you plan to attend the Congress and would like to make use of such a service, would you kindly let the organisers know as soon as practicable? Also please indicate whether your children would require an English language or Esperanto environment. Address:

The Secretary, Local Congress Committee
124 Croydon Road, Croydon Vic 3136

CORRECTION

In our issue for January - February of this year the list of the UN's official languages was given incorrectly. The correct list reads: English, French, Chinese, Russian, Spanish and Arabic.

ESPERANTO PRIZES

Four major scholarship-prizes are to be awarded in Australia:

(1) \$1000 travel scholarship for the best young student beginning the study of Esperanto in winter this year, to be awarded in June 1990 for the purpose of travel to the International Esperanto Youth Congress in Kerkrade, Netherlands. The prize is made available by Mrs Idyss Einihovici. Applications and details from your local Esperanto group.

(2) The Esperanto Youth Travelling Fund I.E.J.O. established in honour of the late Dr Tim Einihovici to provide travel, lodging and other expenses for one Australian Esperantist Youth to represent Australia each year at the International Esperanto Youth Congress. Capital invested for this fund has now reached \$10 000. Applications and enquiries to Mrs Idyss Einihovici, 88 Newry St, Floreat Park WA 6014. Donations to the capital of the fund to be made payable to The Esperanto Youth Travelling Fund T.E.J.O. and may be sent to the same address.

(3) A special competition, for New South Wales only. An examination towards the end of this year will take place and the winning Esperanto student will be invited to participate in the Australian Esperanto Congress in Melbourne, January 1990, full expenses paid. Next year's award will be to enable the recipient to attend the Esperanto Summer

School. Details from the Esperanto Teachers' Federation, 143 Lawson St, Redfern NSW 2016. Or phone (02) 699 4775 and leave message on answering machine.

(4) Pacific Esperanto Congress: Retired Australian Ambassador to the UN Ralph Harry has established a fund to enable an Australian youth to participate in the Pacific Esperanto Congress held in alternate years (the next to be held in 1991), a congress of Esperantists living in countries in, bordering on, or close to the Pacific Ocean. For details, contact the Secretary of the Australian Esperanto Association, Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

THE INDUS VALLEY

"I spent almost a month with the Pakistani Esperantists... The Pakistan Esperanto Association has its centre in Multan, where the largest Esperanto group in Pakistan meets. Nearly every day local Esperantists gather in the shop owned by Muhammad Naeem Javaid, secretary of the P.E.A. Multan has the only regular Esperanto courses in Pakistan, led by P.E.A. president Amir Bashir Bhatti. He told me that the lack of a suitable textbook is causing many problems. They have only a booklet with the basics of Esperanto and - unfortunately - many mistakes. 'After the elementary course,' Amir told me, 'we can go no further, for we have no teaching materials'".

Translated from a report by Joachim Werdin,
published in the May issue of the U.E.A. journal Esperanto.

The teaching of Esperanto in third world countries is severely handicapped by the lack of textbooks, dictionaries, and reading material. The cost of publishing such books is prohibitive for most third world countries, and the cost of direct-method textbooks and dictionaries from other countries may often exceed a month's wages.

CHINA

The May issue of the official monthly EL POPOLA CINIO carried a full page commercial advertisement (for colour video tapes) for the first time. We can only hope that the recently very outspoken EL POPOLA CINIO will find its way around the newly toughened censorship laws.

PROVU VIAN VORTOSCION

1. Ĉu versiklo* estas
 - (a) verso sen ritma strukturo
 - (b) ŝvelaĵo sur la haŭto
 - (c) trirada veturilo

2. Ĉu muŝo estas
 - (a) malsanon portanta insekto
 - (b) hartufo ĉe la malsupra lipo
 - (c) diino inspiranta poetojn

3. Ĉu detergento* estas
 - (a) alta rango en mezepoka armeo
 - (b) armilo aŭ rimedo por persvadi malamikon ne ataki
 - (c) speco de sapo

4. Ĉu vipero estas
 - (a) aviadilo kapabla flugi pli rapide ol sonoj
 - (b) nun oficiala korekto de la mispresita vorto "vipuro" en la Fundamento
 - (c) anglismo signifanta "iomete grava persono" (el la angla VIP)

5. Ĉu ĝinzo* estas
 - (a) speco de tre fortika pantalone, plejofte blua
 - (b) ĉina medikamenta planto
 - (c) eretoj ĉe la DNA, la bazaj elementoj de heredo

6. Ĉu akurata estas
 - (a) ĝustatempa
 - (b) sen eraroj
 - (c) apartenanta al franca mezlernejo

7. Ĉu korekta estas
 - (a) sen eraroj
 - (b) rilatanta al kor-malsano
 - (c) foriganta erarojn

8. Ĉu korekturo* estas
 - (a) tre alta virina kantvoĉo
 - (b) elektronika aparato uzata en hospitaloj

(c) zamenhafa vorto kun la signifo "presprovaĵo"

9. Ĉu akĉento* estas

- (a) artefarita elemento (speco de metalo)
- (b) monsumo pagota al vi kiam vi retiriĝos
- (c) prononcmankon varianta laŭ onia etna lingvo

10. Ĉu arketipo* estas

- (a) baza elemento de pensado, respondanta al instinkto
- (b) persono kiu faras desegnan planon por konstruotaĵo
- (c) malneto de teksto korektota kaj presota

11. Ĉu aŭtentika estas

- (a) oficiale certigita
- (b) kreskanta nur en ombra pozicio (p.p.planto)
- (c) rilatanta al projektata elektra aŭtomobilo

12. Ĉu disidento* estas

- (a) persono kiu malakordas kun la oficiala ideologio
- (b) malharmonio de instrumentoj dum muzikludado
- (c) dividilo en arkivŝranko

13. Ĉu gamelano* estas

- (a) mikrobo kaŭzanta tuberkulozon
- (b) reprodukt-organismo (spermo, ovo)
- (c) speco de indonezia orkestro

14. Ĉu hapakso* estas

- (a) araba kamelspeco
- (b) vorto uzita nur unufoje
- (c) sako portata surdorse kun oniaj posedaĵoj

15. Ĉu picc* estas

- (a) birdo
- (b) fosilo uzata de arkeologoj
- (c) populara italdevena manĝaĵo

Respondoj sur paĝo 20.

*neoficiala vorto.

Vortoj kaj difinoj laŭ PIV kaj la Suplemento al PIV.

GURUKMUN, LA RANO

Antaŭ longe, longe, dum la Sonĝtempo, vivis granda, granda Rano, kiu nomiĝis Gurukman. Li certe estis la plej granda Rano en la tuta mondo, tiel granda ke, kiam li saltetis, li skuis la teron. Gurukmun ne loĝis en rivero aŭ golfeto ĉar estis neniu sufiĉe granda, kaj, plue, li ŝatis salteti sur la seka grundo.

Unu varmegan tagon, ĉiuj bestoj kuniĝis ĉe akvejo. Ili ĉirkaŭsidadis, babilante pri la varmega tago dum la etuloj ludis en la akvo. Subite ili aŭdis la bruon, kiun faris Gurukmun dum li saltetis al la akvejo. Bulumf! Bulumf! Bulumf!

La bestoj rigardadis dum li eksidigis sin apud la akvejo kaj komencis trinki. Li trinkis kaj trinkis kaj trinkis ĝis ĉiom de l' akvo elkonsumiĝis. Kie iam estis bela akvejo, nun estis nur granda, kota spaco!

Tiam forsaltetis Gurukmun por serĉi alian akvejon.

Nur unu akvejo ja ne sufiĉis por grandega Rano kiel Gurukmun. Plue li sentis sin soifega. Li saltetis ĝis li atingis riveron kaj li rekomencis trinki. Baldaŭ ĉiom de l' akvo en la rivero elkonsumiĝis!

Gurukmun frotis sian grandan, verdan ventron. Li ankoraŭ estis tre soifa, do li saltetis al la maro kaj rekomencis trinki.

Li trinkis kaj trinkis kaj trinkis. Kaj dum li trinkis lia ventro pligrandiĝis kaj pligrandiĝis. Kiam ĉiom de l' akvo en la maro estis elkonsumita, Gurukmun ankoraŭ estis soifa!

La bestoj komencis maltrankviliĝi. Gurukmun trinkadis ĉiom de ilia akvo, baldaŭ restos neniom. Ili rigardis dum Gurukmun iris de rivero al lago al akvejo. eltrinkante ĉiun ĝis ĝi estis seka. Kaj li ne ĉesis ĝis ĉiom de l' akvo en la tuta mondo elkonsumiĝis. Ĉiom estis en lia grandega, verda ventro!

Poste, Gurukmun, kun ĉiom de l' akvo de la tuta mondo en si, alsaltetis malrapide la supron de grandega monto. Kaj tie li sidadis, superrigardante la sekan, brunan landon.

La aliaj bestoj ege maltrankviliĝis. Nun ili havis nenion ajn por trinki kaj estis neniom da akvo por la arboj kaj la herbo. Gurukmun ĉion forprenis. Kion fari?

Emuo kaj Goano iris por konsulti saĝan, maljunan Vombaton:

"Vombato, estas neniom da akvo. Gurukmun ĉiom havas, kaj se ni ne rehavigos ĝin, ni ĉiuj mortos."

Vombato aranĝis kunvenon. Ĉiuj bestoj amasiĝis malsupre de la monto de Gurukmun. Kukaburo suprenflugis al Gurukmun por peti lin redoni iom da akvo:

"Kokara, kuk, kuk, kuk! Gurukmun, vi ja ne bezonas ĉiom de l'akvo. Ne estu avida. Kial vi ne disdividas la akvon inter ni ĉiuj?"

Sed Gurukmun nur sidadis tie, granda kaj dika kaj verda. Li posedis ĉiom de l' akvo kaj li ne intencis fordoni ĝin.

Kiamaniere ili rehavigu la akvon? Posumo sugestis ke ili timigu lin. Se Gurukmun ektimus, do li eble eltusus iom da akvo. Sed kiamaniere oni timigus la plej grandan Ranon de la tuta mondo? Goano opiniis ke se iu tiklus la nazon de Gurukmun, li eble elternus iom da akvo. Sed kiamaniere atingi lian nazon? Tiel alta ĝi estas! Kaj, ĉiaokaze, eble li ne estas tikliĝema.

Tiam saĝa, maljuna vombato havis ideon.

"Ĉu ni ridigu lin? Se Gurukmun ridus, do certe ĉiom de l' akvo elŝprucus."

La bestoj pripensadis. Estis la plej bona ideo kaj se ili ne faros ion baldaŭ, ili ĉiuj ŝrumpas kaj mortos. Tial ili decidiĝis. Ili ridigos lin.

Unue Kukaburo provos. Li diros al Gurukmun siajn plej amuzajn ŝercojn - sencube li ridos je ili - ĉiam ili ridigos Kukaburojn. Li suprenflugis al Gurukmun.

Ĉu vi aŭdis la ŝercon pri kuk-kuka-kuk-u-a-kuk-kuk?"

Kukaburo batis la azeron per siaj flugiloj kaj ridis el la tuta gorĝo. Sed Gurukmun ne ridis. Li nur sidadis kaj ĉiom de l' akvo estis en lia granda, dika ventro.

Emuo decidis provi:

"Mi faros mian plej amuzan ir-manieron. Sendube tio ridigos lin."

Emuo pevis al la Rano. Li ĉirkaŭpavadis, lie longa kolo serpentumis tien kaj reen, liaj brunaj okuloj turniĝadis. La aliaj bestoj kredis ke estas tre amuze, kaj la larmoj fluis laŭ iliaj vizaĝoj. Eĉ Emuo komencis ridi.

Sed Gurukmun ja ne ridis. Li nur sidadis. Tiam Kanguruo ekhavis ideon:

"Amuzajn saltetojn! Jen la solvo! Mi povas fari la plej bonajn, amuzajn saltetojn en la tuta lando!"

Do li saltetis al la Rano:

"Ĉu vi estas preta, Rano? Nu, jen la plej amuzaj saltetoj. kiujn vi iam vidis."

Kaj Kanguruo komencis ĉirkaŭsalteti. Flankajn saltetojn, malgrandajn saltetojn, saltegojn, eĉ retro-saltetojn. Li estis nur ĵus komencinta sian plej grandan salton, kiam li paŝis en truon kaj falis sur la teron, kun la vizaĝo en la polvo. La aliaj bestoj ridegis. Kanguruo aspektis tiel idiota, kuŝante kun la vizaĝo en la polvo. Sed la Rano ne ridis.

La bestoj ne sciis kion fari. Eble Ranoj neniam ridas.

"Jes, Ranoj ja ridas! Mi vidis ilin. Ĉiam, kiam pluvos. Kaj mi devas scii."

Estis maljuna Nabunum la Angilo. Ĝis la antaŭo de la kurveno li tordiĝis. La pigoj komencis subridaĉi. Li aspektis tiel amuza, sur la seka tero. Nabunum furioze rigardis ilin.

"Kiun vi kredas tiel amuza? Se iu forprenus la arbojn, vi ne kredus tion amuza! Mi montros al vi, kiel ridigi ĉi tiun Ranon. Kaj li tiom ridos ke ĉiom de l' akvo elvenos."

Do Nabunum tordiĝis al Gurukmun. Kaj li komencis danci. Li ja aspektis idiota! Maljuna Angilo, ĉirkaŭtordiĝanta, penante danci same kiel Brnlg.

Gurukmun alrigardis la maljunan Angilon malsupran. Nabunum tordiĝadis kaj serpentumis, li volviĝadis kaj rampadis. Li bukliĝis kaj malbuklis sin, kaj subite li ĉesis. Li tiel implikiĝis ke li ne plu povis movi sin!

La bestoj ekridis. Vombato ruliĝis en la polvo. Maljuna Nabunum tute nodiĝinta! Jen la plej amuza afero kiun ili iam vidis.

Subite la bestoj aŭdis ion. Grandegan, gluglan bruon. Ili supren rigardis kaj jen Gurukmun. Lia granda, verda vizaĝo larĝe ridetis. Nabunum baraktis por malnodigi sin kaj, dum li baraktis, Gurukmun komencis ridi. Gigantajn ridojn! Kaj dum li ridegis, la akvo komencis elveni el lia granda buŝego.

"Mi estis prava, mi estis prava! Jen nia akvo!"

Kaj Gurukmun tiom ridis, ke ĉiom de l' akvo refluis por replenigi la marojn, la lagojn, la riverojn, la golfetojn, la lagunojn kaj la akvejojn. La bestoj ekkuris al maljuna Nabunum por malimpliki lin.

"Dankon, Nabunum, via amuza darco savis nin ĉiujn!"

Kaj Gurukmun, la avida Rano, saltetis for kaj oni nenian plu vidis lin.

Aborigena folkloro
tr. David Poulsen

RESPONDOJ AL KONKURSO 1

Nur du personoj alsendis respondojn por la konkurso pri longaj vortoj, do neniu premio aljuĝiĝis. Jen la plej elstaraj sugestoj: Antaŭsurvide-obendiĝitajn (25 literoj, dankon Vera Payne), kaj Grandurbcentrotrafik-stopiĝojn (28 literoj, dankon Ruth Morrison).

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

1.a; 2.b; 3.c; 4.b; 5.a; 6.a; 7.c; 8.c; 9.c; 10.a; 11.a; 12.a; 13.c; 14.b; 15.c. Noto: "ĝinzo" ne estas en PIV nek PIV-Sup, sed bezonatas.

KRITIKO PRI LA VORTARO DE J. C. WELLS

Kriterioj por prijuĝi neologismojn tazitajn sur anglaj etimoj

Kelkaj redaktoroj de lingvaj rubrikoj montras per sia malfavora kritiko de certaj neologismoj, ke ili estas obsedataj pro la uzo de novaj vortoj en Esperanto, kiuj devenas de la angla lingvo. Miaopinie oni ne rajtas obĵeti kontraŭ neologismoj transprenitaj el la angla lingvo se (1) ili estas bezonataj por esprimi nocion, kiun neniu alia vorto en la lingvo kapablas precize fari, (2) ili estas asimilitaj en racia maniero laŭ konsekvencaj esperantologiaj principoj, kaj (3) ili estas adekvate glositaj de la enkondukantoj kun la celo pravigi la uzon en Esperanto.

Ofte okazas, ke neologismofobiuloj, por montri, ke la koncernaj novismoj ne estas bezonataj, citas tradukojn de la anglaj vortoj en THE E.U.P. ESPERANTO AND ENGLISH DICTIONARY de J. C. Wells (Londono, 1969, 419p.). Dum preskaŭ du jardekoj mi konstante konsultis tiun verkon kaj trovis ĝin misgvida kaj mankhava. Mi jam kunmetis liston da anglaj vortoj ne apartenantaj al la literatura kaj faka lingvo-terenoj, kiuj mankas en la menciita vortaro. Ekzemple, estas nekompreneble, kial eĉ poŝformata angla-esperanta vortaro ne registras leap-year (nek ĉe leap nek ĉe year) sed enhavas la malpli oftan leap-frog! Tiu manko estas nepardonbla, ĉar tri pli malnovaj anglaj-esperantaj vortaroj ne preteratentis tiun vorton: Fulcher kaj Long (1963), Edinburgh (1950) kaj J. Rhodes (1908). Trafoliumante la vortaron de Wells oni vane serĉos inter pluraj aliaj vortoj de la ĉiutaga lingvo mumble, bookmark-(er), downtown, slippery, run over (tri signifoj!). Kiel klarigi, ke Wells registras shambles kaj abbatoir (franca vorto!) sed ne la ĉiutagan slaughter-house?

Se paroli pri house, la sekva ekzemplo montras, kiel Wells misgvidas uzantojn de lia vortaro. Li tradukas house per nur unu esperanta vorto: "domo". Tio signifas, ke tute ne eblas ĝuste traduki la sekvajn esprimojn: (1) House of Commons, (2) a full house (teatro), (3) the house of Tudor, kaj (4) the house of Rothschild.

Wells malŝparas valoran spacon en sia vortaro, registrante la vorton dowsing. Li eĉ ne adekvate tradukas ĝin, uzante nur la terminon "radiestezo" anstataŭ "rabdismo" aŭ "rabdomancio". Sed li forgesis inkludi la nomon de pli grava ilo apartenanta, ne al la pseŭdoscienco,

sed al la scienco: lightning rod/lightning conductor.

La nuntempa kultura lingvo de Esperantujo

La kultura lingvo uzata de bone edukitaj esperantistoj spegulas la kulturen nivelon de etnolingvoj. Kiu komprenas la psikologian signifon de vortoj kiel stress kaj psychosomatic en la angla lingvo, apenaŭ povas obĵeti kontraŭ la esperantaj vortoj "streso" kaj "psikosomata". Ili ja estas fakaj terminoj en ambaŭ lingvoj. La tradukoj de stress en la vortaro de Wells -- "urĝo", "premo", "streĉo" -- konvenas nur por la komuna lingvo. Ankaŭ la traduko "print-" estas bezonata en Esperanto, ĉar nek photographic print nek blue-print estas "presita bildo" laŭ la traduko de Wells. Jam en 1956 D. R. Duncan diferencigis "presi" disde "printi" en sia ENGLISH-ESPERANTO CHEMICAL DICTIONARY.

Ankoraŭ unu neologismo, kiu estis kritikita, estas "rehabiliti", ĉar oni opinias, ke adekvata ekvalento estas "rehejmigi", kiu troviĝas en la vortaro de Wells. Tute ne! "Rehabiliti", krom esti komuna vorto, estas termino apartenanta al du diversaj fakoj, la juro kaj la medicino. Wells ne indikas tiujn fakajn nuancojn. (Ankaŭ la registro en la SUPLEMENTO de PLENA ILUSTRITA VORTARO (1987) estas malkompleta, ĉar ĝi difinas nur la juran uzon de "rehabiliti".)

Konkludo

La vortaro de Wells estis eldonita la unuan fojon en 1969. Du jardekoj forpasis, sed tiu konsultlibro estis nek reviziita nek pliampleksigita -- nur represita (la sepa represado okazis en 1983). Estas evidente, ke nova angla-esperanta vortaro estas bezonata, kiu spegulas la riĉecon de ambaŭ lingvoj, kaj kiu estos utila ne nur al komencaj lernantoj de Esperanto sed ankaŭ al fakuloj kaj literaturistoj. Guste tia vortaro -- pli ol milpaĝa -- estas nuntempe kompilata en Usono kun la titolo COMPREHENSIVE ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY. Mi tre scivolas, kiel ĝi influos sur la lingvouzon de angleparolantaj esperantistoj.

Berrard Golden
 Damjanich u. 1/C. I. 88.
 H-8200 Veszprém
 Hungario

RECENZO

An Introduction to the International Language Esperanto: a HyperCard Text for the Macintosh (ekde MacPlus), preparita de Michael Urban, 1988

Longtempe la komputiloj kaj la instruado de lingvoj estis du apartaj fakoj. Tamen nun oni ekspluatas la novan potencon ricevitan per tiuj maŝinoj, por helpi al la ĝenerala klerigo de la komputil-uzantaro - aro, kiu pli-malpli frue inkluzivos ĉiujn.

Tiurilate venis al mi granda kaj plezuriga surprizo, kiam mi hazarde trovis en mia universitata komputila reto ĉi tiun Esperanto-kurson. Kiel menciite, ĝi estas HyperCarda teksto: HyperCard estas sistemo iom simila al elektronika notlibro, kiun oni povas "foliumi", demandi, enskribi (krom se la komputilaj aŭtoritatuloj ĉe vi malpermesas) ktp. Ĝi estas ideala por projekto kia lingvinstruado, kaj la Macintoshoj estas inter la plej popularaj seriozaj komputiloj en la mondo, do la utilo de tia kurso evidentas. S-ro Urban enskribas, ke kopiado de lia "stack" ("amaso" da "kartoj") estas permesata, kun fontindiko, do se oni volas disvastigi ĉi tiun kurson, oni sendu 3,5-colan diskon kaj koverton al mi, ĉe 17 Renowden St, Cheltenham Vic 3192.

Nun restas por mi nur tio, ke mi recenzu ĝin. Nu, unue mi traktu la malbonajn punktojn: diversaj trajtoj de la teknika flanko de la programo montriĝis malpli ol idealaj, kvankam pro tio probable ne kulpas la aŭtoro de la programo. Unue: La programo abunde petas, ke oni entajpu esperantigojn de anglalingvaj frazetoj - sed mia komputilreto malpermesis tion, eble pro timo, ke oni malice ŝanĝos ĉiujn aliajn "amasojn" en la komputiloj. Due: la programo teorie kapablas paroli - voĉigi entajpitajn vortojn esperante. Mi esperantis, sed ĝi ne parolis al mi. Kiam mi lastafoje vidis la programon, ĝi ankaŭ misalineigis multajn esperantajn vortojn, se ene de anglalingva teksto: ŝajne ĝi ĉesigis tiun miskonduton nun. Se vi ĝin ricevos, preĝu ke ankaŭ via sistemo - kaj via HyperCard programo - kondutos bone.

Nun al la bonaj punktoj - kaj da ili estas multe. La kurso estas gramatike kompleta kaj ĝustagrade analizema; ĝi trairas la dekse regulojn, kaj dornajn aferojn kiel transitivecon kaj refleksivojn ĝi traktas adekvate. Sed tio estas nur la komenco: Urban vere scipovas plej bone uzi teknikajn ĝuindaĵojn, por malplipezigi la gramatikon - abundas bildoj, kies partojn oni "musumas" (klikas per la aparato muso) por vidi iliajn esperantlingvajn nomojn. Por familianoj (avo, bofrato,

ktp), li uzas amuzan portretaron; por korpopartoj, li uzis bildojn de... Jean Harlow kaj Bobby Paris! Oni ankaŭ abunde uzis esperantlingvajn tekstetojn (ekde "Ho mia kor!" ĝis lastatempa sciencfikcio), kies angligojn oni povas vidi per musumo. Kaj krom la teknika kompetenteco montrita, li ankaŭ montras tre plaĉan seriozecon rilate la socian flankon de esperantismo: liaj enkondukaj komentoj estas ne la kutimaj troentuziasmaj evangelieskaĵoj, sed maturaj kaj honeste prezentitaj, kun neniom de tiu embarasa ekscentrismo, kiun Lapenna tiom malestimis.

Sed ĉi tiu kurso estas ne nur bona: ĝi superas la librajn kursojn en gravaj aspektoj, tiom, ke mi jam deziras, ke mi estus lerninta la lingvon per ĝi. Ekzemplas la kromtekstaj pritraktoj (vidataj nur musumite) de punktoj tro ofte ellasataj el kursoj: ĉu la Orwella "Newspeak" satiris la esperantlingvan vortfaradon? (Probable ne); kie loki la vorton "ne"; kiun vorton vi povas uzi, se la vorto "farti" ĝenas al vi; kiun vorton vi povas uzi, se vi volas ĝeni tiun, al kiu ĝenis la vorto "farti" ("Enquiring minds want to know"); la kazo post "kiel"; prava/ĝusta/rajta/korekta; gaja/geja; kaj kompreneble, tute apokrifaj alineoj (laŭvole spektebla: "Nice people can read on with their sensibilities intact") pri fivortoj.

Sed la distinga ĉarmo de ĉi tiu kurso estas la supremenciitaj frazetoj, kiujn la kursano devas traduki, aŭ kiuj prezentas ekzemplojn pri gramatikaj punktoj. Ili estas mirigaj! "La komputilo havas katon; kato manĝas la verdajn seĝojn; granda planto manĝis la muson; la muso manĝis miajn librojn; mi malamas blujn komputilojn; manĝi dekdu tapiŝetojn estas malbele; tamen, la komputilo foriros; estu la Forteco kun vi (May the Force be with you!!); mi volus vidi verdan sunon; eniru la hundo!; ties edzo estas malbela; tiu porko estas stulta; lia buŝo estas tiel granda, ke oni povas enmeti la kapon; komputiloj estas ĉie; tio estas ĉial stulta; ni neniel atendas tiun malbelan porkon; kuru! Estas mia eksedzo; dronigi hundojn interesas min (!)".

Kion diri post ĉi ĉio? Temas pri bona kurso; se vi havas aliron al Mac-reto, nepre akiru ĝin de mi kaj disvastigu ĝin. Gratulojn al Michael Urban pro io, kio, sentroige, montriĝas granda servo al Esperanto.

Niĉjo Nicholas

...

Ni reatentigas ke Tom Elliott (AEA libroservo) povas disponigi tajpo-programojn por la esperanta alfabeto por Epsom-kompatiblaj printiloj.

NOVAJ LIBROJ

^
 Ĉi-sekve estas listo de libroj suplementanta la katalogon 1988 kaj la suplementon en la Adresaro-Jarlibro de AEA p.60-62. Ĉiuj estas haveblaj de la Libroservo de AEA, Box 230, Matraville NSW 2036.

- 602: 5000 Jaroj de Ĉinio, de Caŭ Bajlong. 380p. \$6.70. (Historilibro)
 754: Aldono to English Phrases & Expressions, de Felix Woolfc. 52p. \$6.75
 15: Anaseto kaj Koketo, de Ging Hŭang. 26p. \$1.10. (Porinfana libro)
 6: Angla Antologio, vol.2, red. William Auld. 432p. \$22.00. (De la jaroj 1800-1960)
 307: Aventuroj de Casisteto dum Ekspediciado, de Cen Sjaŭji. 80p. \$2.90 (Romano pri ĉangalaventuroj, por junuloj)
 180: Bestidoj kaj Iliaj Patrinoj, de Jiming Gang. 18p. \$1.20. Porinfana bildlibro)
 698: La Bufo, de Sylla Chaves. \$7.00. (Kantodisko, 33rpm)
 835: Danĝera Ul', de Ĵak Lepŭil. \$16.00. (Kasedo, kun libro)
 696: De Pont-Aven ĝis Varsovio, de Ĵak Lepŭil. \$16.00. (Kasedo, kun libro)
 102. Elektitaj Eroj, de Nikolaj Rytjkov. \$10.80. (Kantkasedo)
 129: Esperanto en Perspektivo, de Ivo Lapenna. 876p., \$69.00.
 526. Grandaj Pandoj - Brilaj Steloj, de Geng Soŭĝong. 48p. \$3.90. (Porinfana bildlibro.)
 81. Horo da Opozicio, de Ganfrank Guljo. \$16.00. (Kantkasedo kun libro)
 463. Imagu, de John Douglas. \$14.00. (Kantkasedo)
 647. Kantu kaj Lenu, de Sylla Chaves. (Disko, 33rpm). \$8.20
 416. Karnavalo en Rio, de Huberto Rohden. (Disko, 33rpm.) \$8.20
 7. Kontakto, de Ganfranko Mole. \$16.00. (Kantkasedo kun libro)
 287. Malgranda Rano Flugis kaj Falis, de Gi Ĝjun Gang. 20p. \$1.20. (Porinfana bildlibro)
 355. Paco, Amo kaj Naturo, de Sylla Chaves. \$8.50 (disko 33rpm)
 491. Plena Ilustrita Vortaro kun suplemento kunbindita. \$98.00
 109. Revenas Mi kun Libro, de Ĵak Lepŭil. \$16.00. (Kantkasedo kun libro)
 322. Urseto Ekkonis Sian Eraron, de Lin Songjing. 20p. \$1.20. (Porinfana bildlibro)
 95. Venas Liber', de Ĵak Lepŭil. \$16.00. (Kantkasedo, kun libro)
 90. La Vojo, de Ganfranko Mole. \$16.00. (Kantkasedo, kun libro)

REGULA ESPERANTO-PROGRAMO EN MELBURNA RADIO

Post sesjara batalado fare de la etnadevenaj grupoj en Melburno por ricevi permeson havi propran radio-stacion, sukceso! La 18an de junio la nova radio-stacio inaŭguriĝis - Radio 3ZZZ (92.3 FM Stereofonia). Gratulinda strebado de Svetislav Kanaĉki kaj Ges-roj Tumman rezultigis la formiĝon de grupo "Radio-Amikoj de Esperanto" kun la 25 membroj necesaj por ricevi permeson aŭdigi regulan Esperanto-programon per tiu stacio. La nova programo havas la titolon "Loĝas en Aŭstralio", kaj jam la unua elsendo okazis la 26an de junio. La tempo de la dissendoj estas lunde 12.45 ĝis 1.00 pm. Nun la "Radio-Amikoj" petas al ĉiuj gesamideanoj kunlabori per alsendo de artikoloj por la programo. Gramofondiskoj kaj sonbendoj estos ankaŭ tre bonvenaj. Atentu ke prezentaĵo devos daŭri inter tri kaj ses minutoj. Adreso por alsendaĵoj demandoj kaj detaloj: Svetislav Kanaĉki, 72 Jubilee St, Mt Waverley Vic 3149. Al la programo kaj ties iniciantintoj ni esprimas niajn plej varmajn elkorajn gratulojn kaj bondezirojn.

...

RESPONDOJ POR KONKURSO NUMERO 2

Atingis nin neniu ĝusta respondo por konkurso numero 2 (januar-februara TAE 1989): "Meredith Willson komponis la plej longan unufrazan kanton en la angla lingvo. Kiu povas nomi por ni tiun kanton kaj traduki ĝian tekston Esperanten?" En sia aŭtobiografio AND THERE I STOOD WITH MY PICCOLO Meredith Willson atribuis tiun rekordon al la kanto "You and I", populara ĉ. la 1950oj.

...

KONKURSO NUMERO 3

Vi scias ke la esperanta verbsistemo sekvas la ordon de la vokaloj en la alfabeto: -as, -.., -is, -os, -us. Kial mankas -es en tiu grupo? Por la unua ĝusta respondo atinginta la redaktoron antaŭ la 1a de septembro estos libropremio. La respondantoj devos ankaŭ indiki aŭtoritatan referencon kie ili trovis la respondon.

...

AEA BIBLIOTEKO

Dum la vintra paŭzo de klubkunveno, membroj de la Kanbera Esperanto-Klubo laboros por kompletigi la katalogon de la Biblioteko de AEA kaj listigi duoblaĵojn donaceblajn al aliaj Esperanto-bibliotekoj.

LA KONGRESO EN MELBURNO

Dum vi partoprenos en la venonta januara kongreso en Melburno, ĉu vi bezonas utiligi infanzorgan servon (ĉu en anglalingva, ĉu en esperant-lingva etoso)? La organizanta komitato de la Kongreso bezonas kiel eble plej frue informiĝi pri tio por fari taŭgan organizaraĝon. Se vi deziros utiligi tian servon, bonvolu informi tuj kiam eble al la LKK. Adreso: Loka Kongresa Komitato, 124 Croydon Road, Croydon Vic 3166.

...

KORESPONDPETOJ EL POLLANDO KAJ SOVETIO

Pli ol kvindek korespondpetoj atingis nian asocion, de esperantistoj en Pollando kaj Sovetio. Kiu deziras korespondamikon bonvolu kontakti la sekretarion de AEA, Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109. Tri petoj sekvas. Multaj aliaj haveblas:

Mirosława Bak, 62-585 Sławsk 30, Pollando. (22jara virino interesata pri muziko, pentroarto, kino, literaturo.)

Iwona Kaczor, Ul. Zawadzkiego 22/129, 43-100 Tychy, Pollando. (20jara studentino, interesata pri historio, sporto, muziko, literaturo, k.c.)

Leskawa Wójcik, Ul. Warszawska 238, 43-155 Tychy-Bieruńnowy, Pollando. (36jara instruistino, interesata pri ĉiutagaj problemoj, historio, literaturo kaj fantaziliteraturo, bildkartoj, libroj. Deziras korespondi kun geinstruistoj.)

...

KOREKTOJ

Sur p.22 de la maj-junie numero, 4 linioj de malsupre, legu 10 000 enoj, ne mil enoj.

En la kongreslisto p.26-27 bonvolu noti ke R kaj P Ross (numeroj 15 & 17) estas de Qld, do 7 NSW kaj 5 Qld.

Ni elkore petas pardonon pro tio, ke la tre atentinda verko de Trevor Steele, "La Turisto" ne estis indikita en la enhavtabelo sur la kovrilpaĝo de la maj-junia numero.

...


La kapitalo de The Esperanto Youth Travelling Fund T.E.J.O. nun atingis \$10 000, sed pli estas bezonata. - Pro manko de taŭga kandidato la speciala \$1000-premio ne estis aljuĝista, kaj restos por 1990.

The Australian Esperantist

Numero 257

SEPTEMBRO-OKTOBRO 1989

Registered by Australia Post
Publication no. WBC 2488



Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto...p.3

La koro de poeto (Nevena Nedelčeva)...p.5

Greka balo, kiel fenomeno metafizika (Niĉjo Nicholas)...p.6

Principoj pri protektado de la medio (Ralph Harry)...p.8

Provu vian vortoscian (Donald Broadribb)...p.12

Recenzo: Libroj el Ĉinio (Donald Broadribb)...p.14

Recenzo: NePIVaj vortoj (Alan Towsey)...p.17

Letero de leganto (John Mills)...p.19

Diversaj Esperantistaĵoj...p.21

English Supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Oficiala organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Telefono: (09) 574 1307.

Prezidanto: Trevor Steele, 7 O'Callaghan St, Holland Park QLD 4121.

Vicprezidantoj: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 21221, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley WA 6102.

Libro-servo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Membreco: \$25, por individuo, klubo, aŭ federacio; \$30 por familia membreco (ĉiuj ĉe la sama adreso); \$15 (minimуме) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto aŭ al la Libro-Servo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adreslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson aŭ/kaj nomon.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Lindato por alsendo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 novembro.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO

verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST, "ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu al ni tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Preparante la tekston, bonvolu atenti la ĉi-sekvajn postulojn: la teksto devas esti klare tajpita, kun duobla spaco inter la linioj, kaj marĝenoj de almenaŭ 2 centimetroj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaj tekstoj estos malakceptitaj. Por konservi la lingvonivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas lingve korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Se la disponebla spaco aŭ la stilo de la verko necesigos tion, la verko povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temos pri kronologie urĝaj tekstoj. Ankaŭ anglalingvajn tekstojn por la angla suplemento ni bonvenigos.

OFICIALAJ INFORMOJ DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Numero 8

REZOLUCIO PRI LA PARTICIPOJ

Dum la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marŝo D-ro L. L. Zamenhof kun la tiama Esperantistaro estigis "Akademion" ĝuste por kontroli la evoluon de la Lingvo per arbitracia institucio: "Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco; oferi la unuan al la dua mi konsilus nur en tia okazo, se nia Lingva Komitato* tion postulus"***

La uzado de la participoj montris la eblecon de du interpretaj teorioj same logikaj; sed tiu kun aspektaĵ valoraj estas la pli malnova, la pli beletra, kaj la Fundamenta. Surbaze de detalaj studoj ankaŭ la Akademio agnoskis la aspektisman signifon de la participoj, kaj neatenito al tia decido devas esti konsiderata kiel lingva eraro.

Instigo al eraro aŭ propagando por teorioj kontraŭaj al la agnosko de la Akademio povas konduki nur al skismo kaj disdialektiĝo. Redaktoroj kaj recenzistoj, eldonistoj kaj libroservoj havas grandan respondecion pri la unueco de la lingvo.

Por la Akademio, ties Prezidanto
D-ro André Albault

*Nun la Akademio de Esperanto, kiu "transprenis la celojn kaj laborojn de la antaŭa Lingva Komitato kaj de Ĝia Akademio" (Art. 1 de la Statuto).

**Respondo 47, "Oficiala Gazeto", 1911, p.291.

(Rimarkigo de la redaktoro: temas pri la pasivaj participoj, kies uzadon klare kaj simple prezentas la PLENA ANALIZA GRAMATIKO paragrafo 110. Multaj el la lernolibroj de Esperanto por anglalingvaj parolantoj estis verkitaj antaŭ ol la ĉi-supre Akademia decido estis farita, kaj oni devas korekti ilin tiurilate. Speciala averto: STEP BY STEP IN ESPERANTO de M. C. Butler, ofte uzata kiel konsultlibro tre fidinda, aperis antaŭ la Akademia decido kaj misprezentas ĉi tiun temon. --- DB) →

OFICIALA INFORMO NUMERO 9 JAM APERIS EN LA MARTO-APRILA
NUMERO DE THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

OFICIALA INFORMO NUMERO 10

Rekomendoj pri propraj nomoj

1. La Akademio agnoskas, ke ĉiu ajn rajtas esperantigi sian nomon laŭ sia bontrovo. Ĉiu rajtas ankaŭ elekti pseŭdonimon aŭ plumnomon por si.

2. La Akademio ankaŭ agnoskas, ke ĉiu ajn rajtas konservi sian aŭtentan nomon laŭ la originala ortografio, se nur ĝi estas skribita per Latinaj literoj.

Li tamen devas toleri, ke la specialaj supersignoj aŭ aliaj signoj de lia lingvo eventuale malaperos; ankaŭ ke lia nomo estos prononcita en alia maniero ol en lia lingvo.

Se la kvar ne-Esperantaj Latinaj literoj q, w, x kaj y aperos en la originala skribo de nomo, la Akademio konsilas prononci ilin jene:

q kiel k; kaj qu kiel kv.

w kiel v en nomoj de Germana aŭ Pola deveno; ankaŭ de Nederlanda deveno.

w kiel la w de la Internacia Fonetika Alfabeto, por ĉiuj aliaj lingvoj.

x kiel ks.

y kiel j, se antaŭ aŭ post vokalo.

y kiel i en aliaj okazoj.

3. La Akademio konstatas, ke la granda plimulto de personoj el aliaj skribo-regionoj jam kutimas transskribi siajn nomojn per la Esperanto-alfabeto. Tamen malplimulto transskribas siajn nomojn laŭ kutimoj de aliaj lingvoj: ordinare temas pri la Angla aŭ la Franca; sed povas esti ankaŭ laŭ la preskribo de la oficiala Latina transskribo por la koncerna nacia lingvo (kazo de la Ĉina kaj de aliaj).

4. La Akademio konsilas, ke neniu trudu al aliaj personoj manieron ŝanĝi aŭ transskribi sian nomon eĉ skribe. Propra nomo estas apartenaĵo de ĉiu individuo.

LA KORO DE POETO
de **Nevena Nedelčeva**

Ĉu vi scias kio estas la koro de poeto? Ĝi estas kiel perla mitulo. La suferoj kiuj eniras en ĝin estas la sableroj, kiuj transformiĝas en perlojn. Kaj ju pli grandaj la suferoj estas, des pli la homoj ĝuas la neordinarajn belegajn - kantojn, fabelojn, rakontojn...romanojn ...

La homoj kiuj sin ornamas per perloj de mituloj ne scias pri la suferoj de la mituloj dum ili transformas la sablerojn en perlojn.

Same tiel oni ne scias la doloron kaj turmentojn de poeto kiu transformas siajn suferojn en ĝojon por la aliaj.

ĈU VI SCIAS?...

Ĉu vi scias kio faras la mondon belega? - La Amo! Ĝi faras ke la suno brilu, la floroj floru, la grenoj maturiĝu, la fontoj ŝprucu, la birdoj kantu. Ĝi kreskigas ĉiun herbeton kaj donas vivon al ĉiu insekto.

Ĉu vi scias kio fariĝas rilate la okulojn, kiam tra ili rigardas la amo? - Ili fariĝas la plej belaj okuloj, kaj similas al la akvoj lumigitaj de nevidebla suno. Kaj kelkiam ili transformiĝas en stelojn kun oraj rebriloj.

Ĉu vi scias kio fariĝas rilate la vizaĝon, kiu estas vizitata de amo? - Sur ĝi radias luma rideto kaj la lipoj estas pretaj ĉiam malavare doni konsilon, diri tenerajn vortojn kaj doni kuraĝigon.

Ĉu vi scias kio fariĝas rilate la koron penetratan de amo? En ĝi ekkantas kantbirdoj kaj neteraj melodioj sin verŝas sen komenco kaj sen fino.

Ĉu vi scias kio okazas rilate la animon, kiam la amo vizitas ĝin? En ĝi naskiĝas la plej brila impulso - servi al la Bono por ĉiuj. ✨

GREKA BALO, KIEL FENOMENO METAFIZIKA
de Niĉjo Nicholas

I

Ili rondgregas, miaj saminsulanoj;
sonoras la liuta ritmo
kaj la lira rito,
kaj ili ekdancas.

Ili ekdancas:
La komforta sirtós estas por bonhumorigo de ĉiu;
La para sústa por amindumo forsimbolita;
La militira pidiŝtós por senintermita spitado;
La senpaŝa rizítikos estas - la Kreto de nobleco.
Kaj la brakliga pentozális estas - la nobleco de Kreto.
Kaj tiu liro, tiu lido, tiu ludo, tiu liuto
ne havas ĉeson, kaj la raŭkaj voĉfiguroj de la kantanto,
ornamante krudon per potenco,
limon ne trovas;
dum la simpla, dutakta pulskontinuo estas nura
danco, nura svingiĝo de homspirito,
nura pra-vica akordiĝo.
Kaj je la sídiĝo, modalas la ario,
kaj traas, amara, la kadron de analoj pri gloro homa.

Malkomplikas la materialo,
sed el kvar-kvin melodieroj,
liro liuto liuto liro
raŭko distiko danc-rapido rondkant-majesto
teksas tekstas dialektikecas,
kaj mi diras, per insisto
kaj ad-variaci-ado kaj noblovento kaj simpla
kaj per pura dancigo
(tie kuneste dancas per ni kvar jarmiloj),
ĉeson ne havas.

II

Sed Ciftetélis-danco, kontraŭe,
de oriente fontas, fremdĝoje.
Ebrion sensan ĝi mostas fraŭle,
ĝi sugestie sugestas troe.

La sveltulinoj tiel voluptaj
rotaciigas la ventron, logas
per la ondadaĵ leviĝoj ŝultraj,
incite skuas la mamojn (ĵonglas),

ke oni certe rimarkas ne plu
la kelkajn virojn ebriajn sate,
ekvilibrantaj (inercio nepru!)
bierbotelojn plenajn surkape.

Do parojn ofte formas virinoj.
Ne malpli sorĉe ili krurĝlitas
kune, pro tio: forestas timoj,
ĉarmbelas korpoj, talioj niĉas

flanke, kaj tiuj manoradikoj
delikategaj, sperte plektante
pri amindumo, kaj tiuj nigroj
robaj kontraste la blankojn haŭte -

ĉi ĉio - manke de vira helpo -
estas... ja estas belino, nure,
adoradenda ame, sen kulpo-
sentoj, dorlota sensoplezure,

kiu postvivos la majestajn murojn,
kiu postdaŭros la snobecajn morojn,
kiu postlasos eĉ pli belajn mirojn.

RESUMO DE PROPONITAJ JURAJ PRINCIPOJ PRI PROTEKTADO DE LA MEDIO

de Ralph Harry

1. Ĝeneralaj Principoj, Rajtoj kaj Respondecoj

Fundamenta Homa Rajto

1. Ĉiuj homoj havas homan rajton al medio adekvata por iliaj sano kaj bonstato.

Intergeneracia Justeco

2. Ŝtatoj devas konservi kaj uzi la medion kaj naturriĉaĵojn por la bono de la nuna kaj estontaj generacioj.

Konservado kaj Daŭrigebla Uzado

3. Ŝtatoj devas konservi ekosistemojn kaj ekologiajn procezojn esencajn por la funkciado de la biosfero, devas konservi biologian diversecon kaj observi la principon de plej bone daŭrigebla rikolto/rendimento, uzante vivantajn naturriĉaĵojn kaj ekosistemojn.

Mediaj Normoj kaj Monitorado

4. Ŝtatoj devas starigi adekvatajn normojn de medio-protektado kaj monitori ŝanĝojn rilate, kaj eldoni rilatan informadon pri la kvalito de la medio kaj uzado de riĉaĵoj.

Antaŭaj Mediaj Taksoj

5. Ŝtatoj devas fari aŭ postuli antaŭajn mediajn taksojn de proponita agado, kiu eble signife tuŝus la medion aŭ uzadon de naturriĉaĵoj.

Antaŭa Anonco, Aliro kaj Taŭga Proceduro

6. Ŝtatoj devas informi ĝustatempe ĉiujn personojn, kiuj verŝajne estos signife tuŝitaj per planata agado, kaj atribui al ili egalan aliron kaj taŭgan proceduron en administraj kaj juĝejoj procesoj. →

7. Ŝtatoj devas certigi, ke konservado estu traktata kiel integra parto de la planado kaj plenumado de evoluiga agado kaj provizi helpon al aliaj ŝtatoj, super ĉio al evoluantaj landoj, subtene al protektado de la medio kaj daŭrigebla evoluo.

^ Generala Devo Kunlabori

8. Ŝtatoj devas kunlabori bonafide kun aliaj ŝtatoj plenumante la antaŭajn rajtojn kaj devojn.

II. Principoj, Rajtoj kaj Devoj Rilate Translimajn Naturriĉaĵojn kaj Entrudiĝojn en la Medion

Racia kaj Justa Uzado

9. Ŝtatoj devas uzi translimajn naturriĉaĵojn laŭ racia kaj justa maniero.

Prevento kaj Plibonigo

10. Ŝtatoj devas uzi ĉiujn prudentajn preventajn rimedojn por limigi la riskon kiam ili plenumas aŭ permesas iujn danĝerajn sed utilajn agadojn kaj devas certigi, ke kompensopago estu provizata se signifa translima malbono okazis, eĉ kiam la agoj ne estis konataj kiel malbonigaj je la tempo kiam oni ilin entreprenis.

Antaŭaj Interkonsentoj Kiam la Kostoj de Prevento Multe Superas al la Malbono/Damaĝo

12. Ŝtatoj devas intertrakti kun la tuŝita ŝtato pri la justaj kondiĉoj laŭ kiuj la agado povus esti plenumita, kiam ili planas plenumi aŭ permesi agadon, kiu kaŭzos transliman malbonon, kiu estus signifa sed multe malpli ol la kosto preventi. (Se neniu interkonsento estas atingebla vidu artikolon 22.)

Nediskriminacio

13. Ŝtatoj devas apliki minimume la samajn normojn por primediaj konduto kaj efekto rilate translimajn naturriĉaĵojn kaj entrudiĝon en la →

medion, kiujn ili aplikas interne de la Ŝtato (t.e. ne faru al aliaj ŝtatojn, kion vi ne farus al viaj propraj civitanoj).

Ĝenerala Devo Kunlabori pri Translimaj Mediaj Problemoj

14. Ŝtatoj devas kunlabori bonafide kun aliaj ŝtatoj por atingi plej-bonan uzadon de translimaj naturriĉaĵoj kaj efikan preventon aŭ malpliigon de translimaj mediaj enstrudiĝoj.

Interŝanĝado de Informaĵo

15. Originŝtatoj devas provizi oportunan kaj rilatan informaĵon al la aliaj koncernataj ŝtatoj pri translimaj naturaj riĉaĵoj aŭ enstrudiĝoj en la medion.

Antaŭaj Taksoj kaj Avizoj

16. Ŝtatoj devas provizi antaŭan kaj oportunan avizon kaj rilatan informaĵon al la aliaj koncernataj ŝtatoj kaj faros aŭ postulos median takson de planata agado, kiu eble havos signifan transliman rezulton.

Antaŭa Konsultado

17. Originŝtatoj devas konsulti frue kaj bonafide kun aliaj koncernataj ŝtatoj rilate ekzistantajn aŭ eblajn translimajn enstrudiĝojn en ilian uzadon de natura riĉaĵo aŭ en la medion.

Kunlaboraj Aranĝoj por Media Taksado kaj Protektado

18. Ŝtatoj devas kunlabori kun koncernataj ŝtatoj pri monitorado, sciencia enketado kaj la preskribo de normoj rilate translimajn naturriĉaĵojn kaj enstrudiĝojn en la medion.

Krizaj Situacioj

19. Ŝtatoj evoluigos planojn por eventualaĵoj rilate krizajn situaciojn, kiuj verŝajne kaŭzos translimajn enstrudiĝojn en la medion, kaj tuj avertu, provizu rilatan informaĵon al, kaj kunlaboru kun, la koncernataj ŝtatoj kiam krizo okazas.

Egalaj Aliro kaj Traktado

20. Ŝtatoj donos egalan alirrajton, justan jurprocedon kaj egalan traktadon en administraj kaj juĝaj procezoj al ĉiuj personoj, kiu estas aŭ povos esti tuŝitaj de translimaj entrudiĝoj en ilian uzadon de naturriĉaĵo aŭ de la medio.

III. Stata Respondeco

21. Ŝtatoj devas ĉesigi agadon kiu rompas internacian devon rilate la medion, kaj devos provizi kompensopagon pro la damaĝo kaŭzita.

IV. Paca Solvo de Disputoj

22. Ŝtatoj devas solvi mediajn disputojn per pacaj metodoj. Se reciproka interkonsento pri solvo aŭ pri aliaj aranĝoj por la solvo de disputo ne estas atingita antaŭ 18 monatoj, la disputo devas esti submetita al konciliacio, kaj se tio ne ebligas solvon, al arbitracio aŭ juĝa solvo je la peto de iu koncernata Ŝtato.

(Malneto de proponata teksto.) ↔

IO NOVA EN SOVETIO

laŭ raporto de **Sergej Stepanov**

La 23an de julio 1989 prestiĝa sovetia gazeto MOSKVAJ NOVAĴOJ presigis ĝojigan artikolon kun la titolo "MN en Esperanto". Generale dum niaj jaroj ni rare legas sur paĝoj de ne poresperantaj gazetoj pri la internacia lingvo. Sed en la lastaj tagoj la glacio de konscia prisilento je nia movado komencis degeli. En la artikolo la gazeto informas ke ĝi ricevis multe da leteroj el diversaj landoj petantaj eldonon de MOSKVAJ NOVAĴOJ en Esperanto. Ke kvankam oni presas ĝin jam en naŭ lingvoj, la legantoj kiuj ne scipovas tiujn lingvojn ne kapablas legi ĝin.

Nun jam aperis la unua, proveldono de MOSKVAJ NOVAĴOJ en Esperanto uzante artikolojn el la alilingvaj eldonoj plus specialaj paĝoj da raportoj pri la esperanta movado. Tiu unua numero sekviĝos de aliaj se ĝi ricevos sufiĉe da atento kaj akcepto fare de la esperantistaro. La unua numero speciale pritraktas la krimojn de Stalin. ↔

PROVU VIAN VORTOSCION

1. Ĉu konvena estas
 - (a) konforma al la situacio
 - (b) facile akceptebla aŭ uzebla
 - (c) rilata al internacia interakordo

2. Ĉu muso estas
 - (a) fluginsekto
 - (b) aparato utiligata dum uzado de komputilo
 - (c) delikata manĝaĵo origininta en Francio

3. Ĉu kabineto estas
 - (a) ŝranko en kiu oni konservas vestojn aŭ manĝilojn
 - (b) malsaniĝo de la koro
 - (c) ĉambro en kiu oni intelekte laboras

4. Ĉu farti estas
 - (a) vojaĝi per ŝipo, speciale por esplori
 - (b) esti en ia sanstato
 - (c) eligi gason el la intestoj

5. Ĉu farmi estas
 - (a) prilabori teron por kreskigi plantojn kaj aliajn nutraĵojn
 - (b) bakegi argilajn potojn en speciala forno
 - (c) lue preni terparcelon laŭ kontrakto, por kulturi ĝin

6. Ĉu fabriko estas
 - (a) teksaĵo el kiu oni faras vestojn
 - (b) mensogo intencita por trompi iun
 - (c) loko en kiu oni produktas vendaĵojn

7. Ĉu plumo estas
 - (a) frukto tre sukoplena
 - (b) nun eksmoda skribilo
 - (c) angla pudingo manĝata plejofte je Kristnasko

8. Ĉu teroro estas
 - (a) timego
 - (b) tero el kiu oni ekstraktas metalojn
 - (c) sisteme uzata krueleco

9. Ĉu latrino* estas
- (a) necesejo
 - (b) mineralo uzata por protekto kontraŭ radiado
 - (c) vulgara lingvo uzita de la antikvaj romianoj
10. Ĉu etikedo* estas
- (a) regularo pri kiel kondukti en la socio
 - (b) karteto sur objekto, montranta prezon, enhavon, ks.
 - (c) scienco pri la moralo
11. Ĉu sapo estas
- (a) suko en arbo
 - (b) malsaĝa persono
 - (c) purigaĵo
12. Ĉu kacujo* estas
- (a) manĝaĵo el faruno kaj lakto
 - (b) fendo en pantalono, por ebligi al viroj urini
 - (c) ŝranko en kiu oni konservas valorpapirojn
13. Ĉu akcento estas
- (a) maniero prononci, pro influo de onia gepatra lingvo
 - (b) signo super litero por modifi la prononcon
 - (c) plifortigo de la prononco de vokalo
14. Ĉu paletro estas
- (a) tabuleto sur kiu artisto miksas farbojn
 - (b) supra parto de la buŝo konsistanta el du ostoj
 - (c) arabo senhejmigita de la israelanoj
15. Ĉu panelo estas
- (a) parto de aŭtomobilo sur kiu troviĝas la ŝaltiloj kc.
 - (b) ekmalfunkcio de aŭtomobilo
 - (c) grastavolo sub la haŭto

Respondoj sur paĝo 16.

*neoficiala vorto

Vortoj kaj difinoj laŭ PIV kaj la Suplemento al PIV

Kompilita de **Donald Broadribb**

RECENZOJ

5000 JAROJ DE ĈINIO, de Caŭ Bajlong, tr. Faibo. Bejĵingo: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 388p., broŝurita. \$6.70 de la AEA Libro-servo.

Miaj esperoj pri ĉi tiu libro rapide vaporiĝis kiam mi komencis legi. Unuavide, la libro estas tre alloga. Multaj desegnoj (kaj kelkaj fotoj) plibeligas la paĝojn, donante tipan orientartan aspekton. Jen la speco de arto pro kiu Ĉinio famas, kaj kvankam - kun kelkaj esceptoj - ili ne vere helpas kompreni la historion, kion farus amaso da fotoj - pri gravaj historiaj lokoj kaj restaĵoj, ili tamen altiras la leganton.

La libro limiĝas al la periodo ĝis la Revolucio de 1911. Naŭpaĝa fina ĉapitro skize prezentas eventojn inter 1911-1949 por preskaŭ-ĝisdatigi la leganton. Kronologia tabelo ebligas al la leganto rapide trovi la datojn de la diversaj dinastioj, tre granda helpo por okcidenta leganto.

Ĝuste kio estas "historio"? Pri tio disputas jam de multaj jarcentoj kleruloj, kaj mi ne intencas partopreni en la kvereloj. Mi preferas relative simplan difinon: histori-libro estas verko kiu klare kaj fidele informas pri la evoluo de la kulturo kaj popolo, sed interese kaj emfazante la vivon kaj la ĉefkulturajn eventojn kaj verkojn. Laŭ mi libro kiu ĉefe detaladas liston de registaroj, militoj, bataloj, kaj "gloraj nomoj" ne estas vera historilibro, ĝi estas nur kronologie ordita milit- kaj registar- tabelaro pretendanta esti proza teksto. Kiu volas sciiĝi ke tiu invadinto batalis kontraŭ ĉi tiu reĝo, dum alies kavalerio rapidis norden, nu, tio eble povas esti informa, sed 388 paĝoj da ĝi estas 387-paĝa tromulto.

Mi ne rimarkis ian nedigesteblan ideologion en la teksto. Domaĝe, tio estas, mi opinias, ne pro rimarkinda objektiveco de la verkinto sed dank' al preskaŭ plena manko de mencio pri la vivo, pensaro, kaj verkaro de tiu riĉega ĉina kulturo. Por ne tro unuflanke prezenti la libron mi devas agnoski ke kelkaj kulturaj eventoj ja estas menciitaj. Ekzemple la enkonduko de fabrikado de papero, de astronomiaj instrumentoj kc. Sed kion oni verkis sur la nove fabrikita papero, kaj kion oni lernis per la novaj instrumentoj, bedaŭrinde la aŭtoro forgesis (aŭ ial ne emis) informi nin. Mankas en ĉi tiu libro indekso, sed tio ne tre gravas, ĉar se ĝi ekzistus, oni vane serĉus en ĝi la nomojn kiuj famigis la ĉinan kulturon: la filozofojn, la artistojn, literaturistojn kaj →

WINDOW ON THE WORLD

EYE ON CHINA

In our last issue we noted the fragile new freedom of editorial policy in recent issues of the official Chinese Esperanto monthly EL POPOLA CINIO and expressed our concern for the editors in view of the recent tragic events in Beijing and the subsequent purges. The answer: a carefully chosen protest via the age-old method of criticising the present by references to the classical past.

In the June issue of EL POPOLA CINIO, after a studiedly impartial article "What are present-day students in China thinking?" (A poll regarding the most favoured professions, and the interesting fact that 48.4% of students surveyed favour pre-marital sex) a stinging attack on the massacre of students in Tianemen Square, presented under the guise of a literary review of the 13th century opera "The Tragedy of Dou E" by Guan Hanqing. Without direct mention of present events, selections from Act 3 are featured, of which the opening verses are typical:

E, a woman unjustly condemned to death, appeals to her executioner

"How can you call an honest person an outlaw?
How can good people suffer and die so young,
while the evil enjoy their long life of riches?
You fear their power and persecute the miserable,
with no sense of justice you block the path of the suffering."

The editors seem to have been rapped on the knuckles fairly strongly, for the July issue is much more guarded, focusing on corruption in high places, river pollution, rehabilitation of the handicapped, important recent archaeological finds. But the censors have missed a tit-bit here and there: subtitles in an obituary for Hu Yaobang, "Friend of the intellectuals and an honest man". Tucked away among a mass of statistics the intriguing note "In China the democratic parties have 291 000 members, a doubling of their membership in five years." But ominously the regular literary review is this time missing.

We await the arrival of the August issue with the hope that our Chinese colleagues will be able to continue their courageous stand, but at the moment their future looks bleak.

BULGARIA

The World Federation of Scientific Workers was founded in 1946 by Joliot Curie, and has been publishing a popular science journal "Science World" in French, English, Russian and German. An Esperanto edition has been added to the list: "Scienca Mondo", published quarterly with 32 large format pages. Yearly subscription is 10 Swiss Francs (c. A\$8.50, subject to fluctuations due to changes in the rate of exchange) and may be arranged through the AEA Libro-Servo, PO Box 230, Matraville NSW 2036. →

U. S. S. R.

The thaw in the Communist Block in Eastern Europe continues with Esperanto back in favour. The latest event is that the widely read "Moscow News" is beginning publication of an Esperanto edition. "Moscow News" has been in the vanguard in recent times for its policy of "telling it like it is". A trial issue has been published, a thick tabloid compiled from recent articles in other issues of the journal. Regular publication and frequency (presumably monthly) will depend on response to the trial issue which features detailed accounts of the Stalin era by those who managed to survive, and a rehabilitation of Trotski. For details and further information, contact The Hon. Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041. →

NEW SOUTH WALES

The NSW Esperanto Federation is planning a permanent exhibit at Esperanto House in Sydney. The purpose of the exhibit is to show visitors that Esperanto is a living language used by living people.

We need to increase our collection of concrete examples of Esperanto in actual usage: books, journals, cassettes, records, tourist brochures, commemorative Esperanto postage stamps, posters etc.

If you can help in this important project, please contact Dennis Murphy at The NSW Esperanto Federation

143 Lawson St
Redfern NSW 2106

TRAVEL SCHOLARSHIP 1990

As mentioned on p.3 of the English supplement in our last issue, the special \$1000 travel fellowship to enable a new, young Esperantist to attend the International Esperanto Youth Congress this year was not awarded. The proceeds of this fellowship have been paid into the capital for the permanent yearly scholarship paying the full expenses of an Australian youth to represent Australia each year at the International Esperanto Youth Congress. Next year's congress will be held in Havana, Cuba. For details about the scholarship contact Idyss Einihovici, 88 Newry St, Floreat Park WA 6014. Any student who began study of Esperanto on or after 1 June 1988 is eligible. Proficiency in Esperanto will be required at the level of the AEA's "Norma Klereca Ekzameno".

→*

CORRECTION, WITH SOME GOOD NEWS!

In our last issue the information on the Esperanto Competition open to NSW Esperanto students included an error in the name of the group giving the prize. It is the Esperanto Federation of NSW. The address given, however, is correct: 143 Lawson St, Redfern NSW 2016, phone (02) 699 4775.

The good news: the details of the prize should read as follows: An examination towards the end of this year will take place and the winning Esperanto student will be invited to participate in the Australian Esperanto Congress in Melbourne, January 1990, full expenses paid. Next year's award will be to enable the recipient to attend the Esperanto Summer School.

However, if the winner of the award prefers, the award may be taken in the form of an unconditional grant of \$500 plus \$250 in books. The choice of the form of the prize will be at the discretion of the winning student. Candidates for the award will therefore not be limited to those able to travel at the specified times.

→*

ASIAN CONFERENCE ON THE TEACHING OF ESPERANTO

6-11 November 1989, organised by the International League of Esperanto Teachers and Guangxi National University, China.

→*

POST CONGRESS TOUR, MELBOURNE, JANUARY 1990

Members of the Congress who are intending to join the Post Congress tour will be interested in details of the arrangements for the return to Melbourne.

As advertised in the programme, the tour will commence on Sunday morning from St Hilda's College at approximately 9 a.m., and return on Tuesday, 16th January, at approximately 4 p.m. For the benefit of interstate travellers, the coach will go first to Tullamarine Airport - there are flights to Adelaide, Brisbane, Sydney and Perth between 4 and 7 p.m. on that day.

After Tullamarine, the coach will go to St Hilda's College if necessary. The College has agreed to provide overnight accommodation for those who may be travelling by car and may wish to remain at the College overnight. (This arrangement will, of course, be between the College and the member.)

Alternatively, the tour company will arrange motel accommodation in Melbourne for those who would like an extended holiday, and will deliver travellers to any location in the city.

With regard to meals during the tour, the "D.B. & B." referred to in the programme indicates "Dinner, Bed and Breakfast". The tour company has explained that, as breakfast is a full meal, travellers often require only a light mid-day meal. It is their practice to make a lunch-time stop at a spot where refreshments are available according to choice, but at the traveller's expense.

Further details and bookings from the Secretary, Local Congress Committee, 124 Croydon Rd, Croydon Vic 3136. ↔

CORRECTION

In our last issue, p.3 of the English Supplement, it was incorrectly stated that the I.E.J.O. (International Esperantist Youth Organisation) International Congress 1990 is to be held in Kerkrade, Netherlands. That is in fact the venue for the 1989 Congress. The 1990 Congress will be held in Cuba. ↔

poetojn, la skulptistojn kaj potistojn. Porcelano estis inventita en Ĉinio kaj dum multaj jarcentoj nur en Ĉinio oni sciis la metodon fabriki tiun utilan sed ankaŭ artvaloregan varon kiun enviis la tuta mondo. Sed tion oni ne lernas en ĉi tiu libro. Kial?

Nu, mi bedaŭras ne povi rekomendi libron kiu povintus esti kontribuo al la monda kulturo pere de Esperanto. Aĉetemulo povos pli kontentige uzi sian monon.

MALGRANDA RANO FLUGIS KAJ FALIS, URSETO EKKONIS SIAN ERARON, BESTIDOJ KAJ ILIAJ PATRINOJ, GRANDAJ PANDOJ - BRILAJ STELOJ, AVENTURO DE CASISTETO DUM EKSPEDICIADO. Ĉiuj 1988, esc. RANO kaj BESTIDOJ 1986. Ĉiuj eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, Bejĝingo. Broŝuritaj bildlibroj por junaj infanoj esc. AVENTURO kiu estas 81-paĝa libro por infanoj ĉ. 10jaraj kaj havas nur nigra-blankajn desegnojn por ilustrati la rakonton. Prezoj: RANO, URSETO, BESTIDOJ po \$1.20; PANDOJ \$3.90, AVENTUROJ \$2.90, ĉe la AEA Libro-Servo.

Kun escepto de AVENTUROJ, kiun mi preparolos laste, ĉiuj ĉi verkoj estas bele presitaj kolor-bild-libroj kun kelkaj linioj da teksto ĉiupaĝe, destinitaj esti voĉlegataj al malgrandaj infanoj dum ili rigardas la bildojn. La bildoj estas allogaj, kaj la aspekto certe instigos junuletojn postuli ke la gepatroj laŭtlege ilin. Komence PANDOJ desapontis min, ĉar la kovrilo ŝajnas promesi informlibron: "La granda pando estas rara besto propra al Ĉinio. Infanoj tra la mondo ĝin aparte ŝatas, sed ĝis nun ĝi estas malmulte konata. Ni eldonas tiun ĉi libreton kaj esperas, ke ĝi helpos vin en konado de tiu valora besto." Sed tuj oni trovas ke la bildaro kaj teksto pritemas dresitan pandon en cirko. Nenion oni lernas pri pandoj, sed, denove, la malgranda infano ĝuos la bildojn dum vi laŭtlege la tekstetojn.

Plejparte la libretoj estas ideologie neŭtralaj, kvankam fojfoje la verkintoj ne rezistis la tenton fini sian libreton per morala resumo de la temo. Ekzemple, "'Memoru, ke vi ne ofendu malfortulojn estonte!' diris la ĝirafa." "La rano flugis helpe de siaj du amikoj, Fratino Ansero kaj Frato Ansero, sed fine falis pro sia vanta fiereco." Sed, kiel oni bone scias, aŭskultantaj infanetoj neniam atentigas tiajn "moralajn instrukciojn", do ilin ne ĝenos tiuj instrukciaj atentigoj. Mi rekomendas ĉi tiujn librojn, por familioj en kiuj estas 2-4jara infano parolanta Esperanton. (Utopia revo?) →

AVENTUROJN mi bedaŭrosente ne povas rekomendi. La kialo estas tre simpla: kvankam pretendante esti romaneto pri la aventuroj de juna knabo kiu partoprenas en ekspedicio en Latin-Ameriko, efektive ĝi estas nur instrulibro kiu alineon post alineo preparolas la trajtojn de la diversaj bestoj kiujn li observas. La ŝajnigo prezenti ĝin en la formo de rakonto rapide travidiĝas, kaj post kelkaj paĝoj oni oscedante formetas la libron. Almenaŭ, tion faros via leganta infano, eĉ se vi mem, paginte por la libro, sentos moralan devon tutlegi ĝin.

Literaturo por tiuaĝa legantaro ne abundas en Esperanto. Estas tiel tre bedaŭrinde ke eldonante libron por junuloj la eldoninto ne elektis veran aventurromanon por traduko - aŭ eble verkigus ĝin originale en Esperanto? (Aŭ ĉu la vantigataj multmiloj da ĉinaj esperantistoj iel nekompreneble ne inkludas verkemulojn?) Nu, ni nun scias ĝuste ĝis kiu limo la registaro ĉina permesas liberan esprimadon. Kuglojn aŭ interesajn porinfanajn librojn, kia estas via prefero? Ankaŭ niaj ĉinaj kamaradoj volonte elektus. Nu...eble...iam...

Donald Broadribb

↔

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

1.a; 2.b (ne en PIV/Sup.); 3.c; 4.b; 5.c; 6.c; 7,b; 8.c; 9.a; 10.b; 11.c; 12.b; 13.c; 14.a; 15.a; 16.a.

KONKURSO NUMERO 3

La unuan ĝustan respondon sendis Niĉjo Nicholas. Lia respondo: "Mankas la verb-sufikso -es en Esperanto, ĉar ĝi reprezentis la imperfekton en Pra-Esperanto iam inter 1882 kaj 1887, kaj estis forĵetita cele al pli granda simpleco, nur monatojn antaŭ la publikigo de la lingvo. Tion ĉi diras al ni Lingvo kaj Vivo far G. Waringhien, p.57, kaj Leteroj de Zamenhof vol. I, p.351."

KONKURSO NUMERO 4

En la ĝenerala periodo 1940-1960 eldonatis tri altkvalitaj literaturaj gazetoj en Esperanto, en okcidenta Eŭropo kaj kun redaktoroj loĝantaj en okcidenta Eŭropo. Nomu la gazetojn kaj redaktorojn. La unua ĝusta respondo ĝis la 1a de novembro ricevos libropremion. Respondojn sendu al la redaktoro.

RECENZO

de Alan Towsey

NePIVaj Vortoj de André Cherpillod. Montmirail: la aŭtoro, 1988. 180p., broŝurita. "Listo de 6800 vortoj ne troviĝantaj en la PIV, el kiuj kelkaj povus esti utilaj." Kun font- kaj etimologiaj indikoj. 24,80 gld. ĉe UEA, speciale mendebla de la AEA Libroŝerbo je ĉ. \$20.

Jen nova kaj tre utila libreto de André Cherpillod, nelacigebla vortaristo kaj etimologo.

La **Plena Ilustrita Vortaro** entenas iom pli ol 15 000 radikojn, enkalkulante la **Suplementon**, sed malgraŭ tiom granda nombro, oni ofte trovas en la modernaj esperantaj literaturo kaj gazetaro nekonatajn vortojn, kiujn oni vane serĉas en PIV kaj ties Suplemento. Ni ĉiuj konas tiun frustrosenton en tia okazo, bone scipovante la Internacian Lingvon, tamen ne povante kompreni parton de teksto en tiu "facila" lingvo!

Mi ne militas kontraŭ ĉiuj neologismoj. Sen neologismoj nia lingvo - kiel ĉiu lingvo - vere baldaŭ mortus. Kun novaj eltrovoj kaj la teknologia kaj scienca progreso venas novaj terminoj, kiujn ni devas akcepti en nian lingvon. Estas tamen vere, ke, kiel diras Cherpillod en sia "Antaŭparolo", "multaj vortoj certe estas neutilaj aŭ eĉ malutilaj, ĉar maloportune faritaj". (Mi povus aldoni, ankaŭ ofte nenecesaj, ĉar oni povus facile esprimi la saman ideon per jam ekzistantaj vortoj!) Sed, kiel daŭrigas Cherpillod, "ili ekzistas".

En la okazoj, kiujn mi menciis, povas esti utila la **Neologisma Glosaro** de Henri Vatré (dua eldono, Artur E. Iltis, Saarbrücken, 1987), kiu entenas 2000 nePIVajn vortojn, el kiuj (kiel koncedas la aŭtoro) "ja multaj ne estas propre neologismoj", ĉar ili estas registritaj en pli fruaj vortaroj, eĉ se ne multe uzataj praktike. Sed ofte eĉ tiu bona libro ne sufiĉas! La nova kolekto de Cherpillod entenas preskaŭ 5000 vortojn pli ol tiu de Vatré, ĉiuj kun fontindiko, multaj kun etimoj.

Plejparte sekvas ankaŭ konciza difino, sed ne ĉiam - kio ankaŭ povas estiigi frustrosenton! La kompilanto ja donas siajn klarigojn: "Kelkfoje mi aldonis nenium signifon, ĉu pro tio ke ĝi estas evidenta por la kleraj homoj, se la vorto tre similas al pluraj nacilingvaj →

vortoj; Ĉu pro tio ke ĝian signifon mi ne trovis, aŭ ne serĉis; Ĉu pro tio ke tiu informo estus tro longa. Kaj mi devas lasi ion farotan de la leganto, por ke ĉi tiu ne perdu la alkutimiĝon al la laboro"(!).

Nu bone - sed eĉ "klera homo" ne ĉiam estas lingvisto! Kaj tiuj, kiuj ne scipovas la francan, certe cerbumos provante diveni la signifon de dompti (fr. dompter, angla tame, subdue, germ. bändigen, bezingen) aŭ goŝisto (fr. gauchiste, a. leftist, ger. Linker)! Certe tamen oni povas pardoni la kompilinton, kiam li lasas skvizo-n sen difino - li indikas tie nur unu fonton: la **Japana-Esperanto Vortaro** de Miyamoto Masao (1982), kaj mia japana vortaro diras al mi, ke sukuizu (elp. skū-izu) estas vorto pruntita (sendube el la usona!) por indiki ian taktikon en basbalo! (Angla "squeeze (play)" - ne konante la detalojn de tiu ludo populara kaj en Usono kaj en Japanio, mi lasas al la basbalaj spektuloj plene klarigi tion!)

Tamen, tio estas nur malgranda - kaj en la cirkonstancoj, eble neevitebla - manko, kaj en la plej multaj kazoj oni ja aŭ trovas konci-zan signifon aŭ povas trovi la signifon komparante kun nacilingva vortaro. (La font-indiko ofte servas kiel bona gvidilo al la fontlingvo.)

Interesa aldono estas du kaj duona paĝoj da "Kelkaj eraroj trov-eblaj en la PIV kaj en ties Suplemento".

Pri la plej multaj el la Cherpillod-aj "korektoj" oni ne povas disputi, kaj la aŭtoroj de PIV bone farus atentante liajn kritikojn en estontaj eldonoj!

Ne ĉiuj tamen konsentos kun Cherpillod pri liaj kritikoj de la PIVaj formoj Arimano, Javo, Karono, Kartumo, kedivo, ktp. pro tio, ke ili ne respegulas la prononcon de la originalaj vortoj, kaj por kiuj li proponas Ahrimano, Gavo, Ĥarono, Ĥartumo, Ĥedivo ktp. Laŭ tiu sama principo, Javo devus esti la strangaspekta Ĝaŭa, ne Gava, kiel asertas Cherpillod), kaj laŭ mia vidpunkto la esperanta vorto devus ĉiam respeguli la plej simplan internacian ortografion aŭ prononcon prefere ol sian etimon (laŭ la 15a Regulo de la **Fundamento de Esperanto**).

Sed tio estas ja nur diferenco de opinio - pri kiu mi jam korespondis kun la aŭtoro! - kaj entute ĉi tiu tre utila kaj valora kontribuo al la esperanta leksikologio estas vere havenda por ĉiu serioza adepto de Esperanto.

NOMOJ

de Donald Broadribb

Mankanta en la listo de landnomoj preparita de la Akademio de Esperanto kaj represita en nia mart-aprila numero estis la lando ĝis nun konata kiel Burmo. Lastatempe tiu lando oficiale ŝanĝis sian nomon al Mjanmaro (angle: Myanmar) kaj laŭ tiu nomo la lando estos de nun nomata en ĉi tiu gazeto.

Laŭ nia principo respekti indiĝenajn nomojn kiam ili havas oficialan staton en la respektivaj landoj, nia gazeto laŭprincipe nomas la ĉefurbon de Ĉinio Bejĝingo anstataŭ la pli frua nomo Pekino. Ni faras tion eĉ kvankam ĉinaj eldonaĵoj esperante uzas la nomon Pekino, pro respekto al internacia normigo de nomoj. **

FISISTOJ JAPANAJ KAJ TAJVANAJ

Ni ĉiuj scias ke Japanio kaj Tajvano estas nun la solaj landoj kiuj uzas retegojn por kapti maranimalojn. Tiuj retegoj kaptas ne nur la celatajn fiŝojn, sed ĉiujn maranimalojn sendistinge, tiel ke amas-murdo de multaj specioj nuntempe okazas. Nia ĉefministro Bob Hawke jam nome de Aŭstralio protestis al la japana kaj tajvana registaroj pri tiu genocido de maranimaloj. Ni deziras skribi al ĉiuj esperanto-delegitoj en Japanio (neniuj estas en Tajvano) por protesti nome de la aŭstraliaj esperantistaro kaj popolo. Sed estas tro multaj delegitoj por unu skribanto. Tial ni petas ke ĉiu aŭstralia esperantisto kiu kunsentas kun ni skribu al kiel eble plej multaj japanaj delegitoj, petante ke ili prezentu al sia registaro nian proteston.

(Iniciato de Margaret Chaldecott) **

DE LEGANTO

de John Mills

Mi interesiĝas pri la artikolo 'Por tiu kiu ne komprenas komputilojn' (majo-junia numero) kaj mi volas komenti pri kelkaj aferoj.

Ĉiu fako havas sian terminaron, kaj se oni volas regi fakon oni devas lerni terminaron. Kompreneble, ĝuste kiel oni povas ŝofori aŭtomobilon eĉ se oni ne konas la vorton 'karburatoro', oni povas uzi komputeron eĉ se oni ne komprenas 'bito', 'ROM', 'RAM', ktp. Tamen, grave →

malhelpus komprenon, se malsamaj vortoj uziĝus por 'ĝenerala uzado' ol por 'teknikaj terminoj'.

Novaj fakoj bezonas neologismojn, certe, sed komputeroj ne estas novaj! Elektronikaj difigitaj komputeroj jam ekzistis antaŭ kvardek jaroj; mi uzas ilin dum tridek jaroj. La plejparto de la terminaro aĝas dudek-kvin jarojn. Se oni volus vorton por la komputera fako, oni devus unue serĉi la vorton en PIV -ĝi ofte enhavas pli ol oni scias. Ĉu la legantoj scias, ke PIV havas vortojn por la anglaj komputeraj vortoj 'computer', 'assembler', 'compiler', 'character', 'matrix', 'process', 'radix', 'register', 'hardware' kaj 'software'?*

Se taŭga vorto ne troviĝas en PIV, oni devas serĉi en aliaj eldonaĵoj antaŭ ol inventi vortojn. Se ĉiu havus sian propran vortaron, venus ĥaoso! Kiam mi skribas pri komputeraj kaj rilataj aferoj, mi uzas la vortaron de Bertin.**

Mi nun traktos kelkajn vortojn el la A.E. artikolo.

1. bit Bertin donas 'bito', kaj, laŭ mi, tiu neologismo necesas...

2. byte Bertin donas 'bitoko' aŭ 'plurbito' dependantajn je la nombro da bitoj. Oni ne bezonas la neologismon 'bajto'. Mi ne konsentas, ke 'ero' taŭgas. 'Ero' signifas 'elementa peceto', kaj tiu estas 'bito'.***

3. hardware, software... mi neniam trovis malfacilaĵojn pri la signifoj. Tamen, la vortoj ne necesas. Bertin donas 'materialo' kaj 'programaro'.

Teksto mallongigita de la Red.

*Komputero/komputoro/komputilo, asemblero, kompilero, karaktero, matricoj, procezo, radik(at/il/indic)o, registro, hardvaro/firmvaro, softvaro, respektive, laŭ PIV kaj PIV-Suplemento. - Red.

**Christian Bertin (red): "Computer Dictionary, English-Esperanto (draft) 1985", eldonita de Bertin.

***PIV-Sup. donas bito, bajto/bitoko - Red.

ESPERANTO EN RADIO 3ZZZ MELBURNOde **Svetislav Kanački**

Pasis jam ok semajnoj de la komenco de Esperanto-disaŭdigo en Radio 3ZZZ FM en Melbourne. Ni povas diri, ke ĝis nun ni estas kontentaj pri la kunlaboro de niaj samideanoj kiuj sendis al ni siajn kontribuojn por nia disaŭdigo. Ni elkore dankas al S-ro Ralph Harry pro materialoj kiujn ni povis dissendi en kvin niaj programoj, kaj speciale pro kasedo kun lia voĉo kun akompananta manuskripto.

Ni esprimas nian dankon al Vera Payne, kiu sendis materialon kiun ni povis uzi por kompili programojn, kaj kasedon kun enhavo por la unua programo. Sed dankon speciale al la praktika helpado de la estro de la radiostacio kaj aliaj etnogrupoj teknikistoj kiuj ĉiam estis pretaj helpi nin kiam hazarde okazis misfunkcio aŭ misuzo de la ilaro. Ni antaŭregistras niajn programojn ĝis ni estos certaj ke ni pretas iri rekte al viva disaŭdigo. Ni esperas ke tio okazos baldaŭ.

Mallongondaj radiostacioj en Esperanto anoncis la komencon de nia disaŭdigado kaj sendis gratulleterojn - precipe Berno, Vieno, Pollando, kaj Bejĝingo. Laŭ mia kredo, nia radiostacio bezonas tiajn anoncojn kaj leterojn de kuraĝigo ne nur por tiuj kiuj pretas prepari kaj dediĉi sian tempon al la laboro, sed ankaŭ por niaj aŭskultantoj kiam ni komencos legi leterojn en nia programo. Do mi invitas niajn samideanojn sendi leterojn kun proponataj materialoj, viaj esprimoj pri la neceso havi la internacian lingvon en Aŭstralio, kaj gratulkartoj kiuj povos kapti la atenton de la radioprogramistoj. Tio estos granda helpo al ni kaj nia celo. Nia plano estas plilongigi nian programdaŭron kiam eble.

Nia adreso: EPBAV 3ZZZ FM Esperanto, PO Box 422. Carlton South, Vic 3052. Anticipan dankon pro via kunlaboro.

11 aŭgusto 1989

→→

UNA SEMINARO EN PERTO PRI ESPERANTOraportas **Donald Broadribb**

Sabaton posttagmeze, la 2an de septembro, 1989 okazis speciala seminaro organizita de la United Nations Association of Australia: prelegetoj de John Mills, Anne Jeavous, Vera Payne, kaj Donald Broadribb. Oni eldonos la tekstojn, kaj ni planas inkludi ilin venonnumere.

JOACHIM WERDIN

de Ray Ross

Kiam Joachim Werdin unue skribis pri vojaĝo al Aŭstralio, al Esperantistoj "de Emu Park al Perto", li certe ne konsciis pri la distanco inter tiuj du apartaj lokoj. Tamen, post klarigo, li konsentis, ke en la daŭro de dektaga vizito li povus veturi nur al Brisbano, Sidnejo kaj Melburno. Al Pertanoj, kiuj jam aranĝis gastigadon kaj renkontiĝon, Joachim esprimis dankon, kun bedaŭro pri la tempomanko. Joachim alvenis en Brisbanon la 31an de julio, kie Ray Ross renkontis lin kaj veturigis lin al la hejmo de Tom O'Grady, la brisbana gastiganto. Tiun vesperon anoj de la brisbana societo bonvenigis Joachim kaj aŭskultis prelegon pri vizitoj al kaj agoj en landoj de Azio kaj ankaŭ lastatempe al Papuo-Nov-Gvineo, kie nun estas Esperantista Societo de Port-Morsbio. La 1an de aŭgusto, post lunĉo ĉe Peggy kaj Ray Ross, Joachim vizitis nian prezidanton Trevor Steele en hospitalo, kie Trevor, jam vigla kaj sana post operacio intervjuis cele al raporto por MONATO. La 2an Joachim veturis aŭtobuse al Toowoomba, kie anoj de T.E.S. gastigis lin kaj aŭskultis lian raporton. Li revenis al Brisbano la 3an de aŭgusto.

Frumatene la 4an de aŭgusto Joachim flugis al Sidnejo, kie renkontis lin Dennis Murphy, lia gastiganto en tiu urbo. Tiun saman tagon, vespere, Joachim aŭtobusis al Melburno. (Vidu raporton sur la sekvanta paĝo. - red.) Post sia restado en Melburno, Joachim revenis al Sidnejo, kiun li atingis fruvespere. La sekvintan tagon li vizitis vidindaĵojn kaj anoj gastigis Joachim en restoracio per lunĉo kaj babilado. La Sidneja Esperanto-Societo aranĝis specialan kunvenon en Esperanto-Domo por bonvenigi la vizitanton al Sidnejo. Denove Joachim parolis pri la celo de siaj vizitoj al la aziaj landoj.

Joachim ankaŭ vizitis la bahaan templon, kaj tie vespermanĝis. Anoj de la bahaa religia movado ĉiam estis pretaj helpi lin en Azio.

Pro la manko de Esperanto-libroj en Azio, Joachim kunportis du pezajn skatolojn da libroj kiam li denove forflugis al Singapuro.

Vere estis pensinstiga kaj eĉ esperiga vizito, fare de nia Esperantomisiisto al Azio!.

HONORATA GASTO de **Svetislav Kanački**

Ni jam plurfoje legis en ESPERANTO pri juna homo kiu sendas raportojn pri Esperanto en la azia regiono, kaj en nia lasta THE AUSTRALIAN ESPERANTIST ni legis parton de raporto lia. Temas pri Joachim Werdin.

Joachim Werdin estas 26jara. Laŭprofesie li estas kemisciencisto, kaj kiel volontulo por UEA li akceptis respondecon por la aziaj landoj. Li komencis en Israelo, kie li vizitis tri diversajn lokojn renkontante esperantistojn ne por turismo sed laborante pri riserĉo, evoluo kaj organizo de Esperanto. Same ankaŭ por ceteraj landoj: Turkio, Pakistano, Hindio, Nepalo, Malajzio, Singapuro, Papuo-Nov-Gvineo. Aŭstralio estis trairejo, kie Joachim faris prelegojn en ĉiuj lokoj atingeblaj.

En Melburnon Joachim venis sabate la 10an de aŭgusto kaj restis kvar tagojn. Mi atendis lin ĉe aŭtobusejo kaj transportis lin al mia hejmo kie li loĝis dum sia restado en nia urbo. Sabate, la unuan tagon, mi invitis esperantistojn de nia regiono renkonti la gaston. Dimanĉe mi veturigis lin al gesamideanoj Tumman por tagmanĝo, kie ni rekontis kelkajn samideanojn dum la posttagmezo. Tiu nokton ni iris al radiostacio, kie oni intervjuis Joachimon por tri sinsekvaj programoj. Lunden vespere Joachim prelegis, kun videobendo pri siaj spertoj en pluraj lokoj kaj intervjuoj kun novaj esperantistoj instruitaj de Joachim kaj kun malnovaj esperantistoj kiujn li sukcesis reaktivigi. Marde Joachim prelegis al la Oakleigh klubo, kun sukceso kaj kontentigo de la ĉeestantoj.

Joachim estas volontulo kiu vivas per donacoj de samideanoj. Liaj vizitoj al Singapuro kaj Papuo-Nov-Gvineo estis financitaj de la studentoj kiujn li instruis antaŭ ol veni en nian regionon. Nun li reiris al Singapuro por instrui ankoraŭ 200 studentojn, kiujn li ne povis preni en la antaŭan grupon. Post Singapuro li iros al Indonezio, Tajlando, Tajvano, Koreo, Ĉinio - kaj hejmen por prepari filmon pri sia vojaĝo.

Joachim estas tre modesta, inteligenta homo, kiu scias kion li faras kaj kion li volas fari. Li havas Junecon, sindediĉon al Esperanto, plenan posedon de la lingvo, kapablon organizi kaj instrui per la rekta metodo, kaj la sanon kiu estas nepre bezonata por tiom da aktivado. Unuvorte, Esperanto bezonas homojn liaspecajn. Al li ni sendas nian esperon pri ĉia sukceso.

DIVERSAJ INFORMOJ**LA KONGRESO EN MELBURNO, JANUARO 1989****LA POSTKONGRESA EKSURSO**

Anoj de la Kongreso kiuj intencas partopreni en la postkongresa ekskurso bonvenigos detalojn pri la aranĝo de la reveno al Melbourne:

Kiel informas la kongresprogramo, la ekskurso komenciĝos dimanĉe matene ĉe St Hilda's College je proks. 9 atm kaj revenos marde la 16an de januaro je proks. 4 pm. Por la aliŝtataj partoprenantoj la buso unue iros al la aerodromo Tullamarine, de kie oni povos tiutage flugi al Adelajdo, Brisbano, Sidnejo aŭ Perto inter 4-7 pm.

Post Tullamarine la buso pluiros al St Hilda's College se tio estos bezonata. La Kolegio akceptis disponigi dumnoktan loĝon por anoj kiuj aŭtomobile veturos kaj volos resti en la Kolegio dum tiu nokto. Kompreneble tion devos aranĝi la ano mem kun la Kolegio.

Alternative, la turista kompanio akceptas aranĝi loĝadon en motelo en Melbourne por anoj kiuj deziras resti por ferii, kaj ĝi transportos onin al dezirata loko en la urbo.

Rilate al manĝaĵoj dum la ekskurso: La "D.B. & B." menciita en la programo signifas "Dinner, Bed and Breakfast". La turista kompanio eksplikis ke ĉar la matenmanĝo estas granda, ekskursantoj ofte preferas nur malgrandan tagmez-manĝon. La buso haltos ĉe manĝejo kie la veturantoj povos akiri manĝaĵojn je propra kosto.

Dua listo de aliĝintoj:

- | | |
|------------------------------|-------------------------------|
| 26. N. Nicholas (Vic) | 27. F. McDonnell (Nov-Gvineo) |
| 28. M. Gillam (Vic) | 29. A. Hearn (Vic) |
| 30. J. Macleod (Vic) | 31. H. MacLeod (Vic) |
| 32. J. Moore (Qld) | 33. N. Moore (Qld) |
| 34. M. Sanders (S-ino) (Vic) | 35. M. Sanders (F-ino) (Vic) |
| 36. V. Fotheringham (Vic) | 37. T. Elliott (NSW) |
| 38. M. Elliott (NSW) | 39. C. White (Qld) |
| 40. K. Howe (Qld) | 41. P. Keates (Qld) |
| 42. C. Dean (WA) | 43. J. Newell (Qld) |

- | | |
|------------------------|------------------------|
| 44. M. Warr (Vic) | 45. S. Bruton (Vic) |
| 46. I. Peacock (Vic) | 47. T. Metherall (NSW) |
| 48. W. Vathis (Usono) | 49. R. Harry (ACT) |
| 50. I. Timonin (NSW) | 51. D. Pescod (Vic) |
| 52. B. Pescod (Vic) | 53. W. Parkinson (Tas) |
| 54. M. Parkinson (Tas) | 55. R. Chazan (Vic) |
| 56. H. Rosengren (Vic) | 57. I. Slavoff (Vic) |
| 58. H. Osner (Vic) | |

Sumo: Vic 29; Qld 11; NSW 10; SA 2; Tas 2; ACT 1; N.G. 1; Usono 1

→*

TRIKADO

Karaj getrikantoj, ĉu estas iu el vi kiu volas helpi min en la preparado de internacia terminaro de trikado? Mi volas ligi la tutan per Esperanto. Mi havas kelkajn vortojn francajn, germanajn, italajn, hispanajn, danajn, nederlandajn, ĉeĥajn, kaj simbolojn ĉinajn kaj japanajn. Do se vi volas tralegi la ĝis nun preparitan verkon, aŭ simple proponi frazojn, skribu al:

Margaret Chaldecott

16 Grosvenor Rd, Lindfield NSW 2070

→*

DEZIRAS KORESPONDI

Granda kolektanto de poŝtkartoj deziras korespondi tutmonde:

Arbarkultura inĝ. Vasilij Ribakov

Traktovaja 5

SU-613100 Slobodskoj (Kirov) USSR

→*

NOVAJ LIBROJ

La Libroservo de AEA anoncas ke ĝi nun havas stokojn de la sekvantaj libroj:

615: Oktavio, de Seneca. (Klasika verko, tr. el la latina.) \$7.50

383: Por Marto, de Akiko Tanaka. (Kantkasedo). \$16.00

753: Broĉo trikolora, 40mm: "Mi Amas Esperanto-n" \$2.50

→

- 531: Gluemblemoj "Mi Amas Esperanto-n" trikoloraj. \$.60 por 20x20mm plus 2x40mm
- 349: La Dresado de Megero, de Shakespeare. \$15.70
- 633: Esperantaj Paroligaj Ludoj, de Marjorie Ellyard. 6 vortludoj por 3-10 ludantoj. \$15.00
- 683: Socilingvistikaj Aspektoj de la Internacia Lingvo. 205p. \$20.50
- 803: Vetero kaj Klimato de la Mondo, de Riley & Spolton. 128p. \$21.80
- 110: Studoj pri la Internacia Lingvo, de Michel Goninaz. 156p. \$28.80
- 171: Jula Lando Nikolin', de Giorgio Silber. Kantkasedo. \$21.00

Estas planate ke kompleta librokatalogo akompanos la novembran numeron de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST.

...

KONGRESAJ ALIĜILOJ POR HAVANO 14-21 JULIO 1990

Aliĝiloj por la UK estas akceptataj de la AEA Libroservo laŭ la prezlisto de UEA por Landokategorio A. Aliĝiloj devos atingi la Libro-servon pli ol 15 tagojn antaŭ la UEA-limdatoj. La precizaj prezoj estos laŭ la kurzo en la tago de enpoŝtigo. La sekvanta tabelo estis valida je la 29a de julio, do donas nur proksimumajn prezojn en aŭstraliaj dolaroj.

<u>Kategorio</u>	<u>ĝis 31 dec. 1989</u>	<u>ĝis 31 marto 1990</u>	<u>ekde 1 apr. 1990</u>
	<u>guldenoj=dolaroj</u>	<u>guldenoj=dolaroj</u>	<u>guldenoj=dolaroj</u>
UEA-membro	180=\$114.00	225=\$142.00	270=\$171.00
Ne UEA membro	225=\$142.00	270=\$171.00	315=\$199.00
Kunulo-membro	90=\$ 57.00	135=\$ 86.00	180=\$114.00
Kunulo-nemembro	135=\$ 86.00	180=\$114.00	225=\$142.00

Por kalkuli la precizajn prezojn en aŭstraliaj dolaroj, dividu la prezon en guldenoj per la "vendprezo de guldenoj" trovebla en via tag-jurnalo je la koncerna dato. Se la rezulto donas dolarojn kaj cendojn, altigu la sumon ĝis plena dolaro. Ekzemple, se la prezo troviĝas esti \$142.37, via pago estu \$143.00.

ESPERANTO-KURSETO EN FORSTER

De la Lower North Coast Esperanto Club: Nia Unua Esperanto-lernejo - Bonŝance Marjorie Ellyard kaj Magdalena Rozsa troviĝis samtempe en Forster NSW kaj kun Betty Aulsebrook okazigis kurseton je la 15-16a de julio. Invitoj iris al la klubanoj, reklamoj aperis en lokaj ĵurnaloj kaj radio, afiŝegoj en lokaj banko, biblioteko kaj lernejo. Entute 23 klubanoj, 1 komencanto, kaj 3 ne-esperantistoj partoprenis en la kurseto. Oni taksis la eventon sukcesa, kaj esperas denove havi tian semajnfinojn. (Laŭ raporto de Betty Aulsebrook) →

HELPU KIU POVAS!

de Marcel Leereveld

Jam de antaŭ pluraj jaroj ekzistas en Italio politika partio kiu nomiĝas "Partio Radikala" kaj en kiu eblas starigi "frakciojn" pri specialaj intereso. Tiel en ĝi stariĝis ankaŭ Esperanto-frakcio, nomata "Esperanta Radikala Asocio" (ERA), kiu havas frakciojn en italaj urboj kaj nun ankaŭ en aliaj landoj, ĉar intertempe tiu "Partio Radikala" ŝanĝiĝis en "Transnacia Radikala Partio", fariĝante tiel partio internacia, inter kies celoj estas la kreo de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo, la solvo de internaciaj problemoj, i.a. la lingvoproblemo, kaj la malaperigo aŭ malfortigo de naciaj limoj. Ekzistas forta ŝanco ke tiu partio akceptos Esperanton kiel unu el siaj celoj, kaj gravas ke ĝi ricevu multan helpon de la ĉieaj esperantistoj. Por havi Esperanto-sekcion oni bezonas almenaŭ dek membrojn, kaj por estigi tian sekcion en Aŭstralio mi alvokas ĉiujn aŭstraliajn esperantistojn kiuj ne apartenas al iu politika partio pretajn aniĝi, skribi al mi. Se vi deziras pliajn informojn pri tiu partio, bonvolu ekhavi ilin de la sekretario de "Esperanto" Radikala Partio, D-ro Alberto Menabene, Via Monti Sibillini 3, Roma, I-00141 Italio.

Mia adreso: Marcel Leereveld, 17 Heather Grove, Belgrave South, Vic 3160. →

NI ATENTIGAS

ke la Aŭstralia Esperanto-Asocio, kaj ĝia organo The Australian Esperantist, estas politike kaj ideologie neŭtralaj. Ni aperigas atentigojn pri politikaj aŭ ideologiaj utiligoj de Esperanto nur informociele.-Red.

The Australian Esperantist

Numero 258

NOVEMBRO-DECEMBRO 1989

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



- Alvoko al (sin)helpa agado (Trevor Steele)...p.3
La sciuro (Nevena Nedelčeva)...p.8
Provu vian vortoscion (Donald Broadribb)...p.10
Lingva angulo (Marcel Leereveld)...p.14
Nekrologo: Noel Gamble (Ralph Harry)...p.20
"Skvizo" (Ralph Harry)...p.24
Novaj libroj...p.25
Pasporta Servo (Max Wearing)...p.26
English Supplement

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA, 6562. Telefono: (09) 574 1307.
 Prezidanto: Trevor Steele, 7 D'Callaghan St, Holland Park 4121.
 Vicprezidantoj: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park 6014; Justice K. Enderby, 2 Phoebe St, Balmain 2041.
 Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank, Qld 4109.
 Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne 3001.
 Kasisto: Owen Loneragan 16 Deverell Way, South Bentley 6102.
 Libro-Servo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.
 Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park 4702.

Membreco: \$25 por individuo, klubo, aŭ federacio; \$30 por familia membreco (ĉiuj ĉe la sama adreso); \$15 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu pagi al la kasisto aŭ al la LibroServo.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adreŝlipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian adreson kaj/aŭ nomon.

Limdato por presotaĵoj por la venonta numero: 1 januaro.

LA REDAKTORO

pardonpetas pro la nekutima presaspekto de ĉi tiu numero, necesigita de teknikaj problemoj. Ni esperas ke la venonta numero rehavos sian kutiman aspekton.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST, "ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu al ni tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercbildon. Ni ĉiuj volos legi ĝin! Bonvolu atenti: La teksto devas esti klare tajpita. Netajpitaĵoj estos malakceptitaj.

ALVOKO AL (SIN)HELPA AGADO de TREVOR STEELE

Ĉu ankaŭ vi foje emas vin demandi, ĉu iam ajn nia movado progresos en Aŭstralio? Konsentite, de tempo al tempo ni konstatas paŝon antaŭen, sed ni ne parolu pri la perdoj... Ni vivas en praktike unulingva kontinento, kaj tiu lingvo estas aktuale la plej prestiĝa en la mondo. Kiu aŭstraliano do vere bezonas Esperanton? Kaj kiel ni persvadu niajn samlandanojn, kiuj maloftege sentas tian bezonon, pri la avantaĝoj de neŭtrala internacia lingvo?

Por vivteni nian fervoron por la afero ni devas pli larĝigi nian vidpunkton. Unue, mi kredas, ni devas akcepti, ke ni ankoraŭ travivas pioniran epokon en la evoluo de la monda lingvo. Pioniroj semas kaj malofte rikoltas. Ni foje parolas pri Esperanto kiel "ideo, kies tempo jam venis": certe senpartia analizo de la situacio pruvas la urĝan neceson de Esperanto, sed ni ne tro optimismu, ke la homoj baldaŭ analizos senpartie pri tiu temo. Ni tamen "fosu nian sulkon".

Feliĉe la situacio de Esperanto estas pli esperiga en aliaj partoj de la mondo ol ĉe ni. Sendube vi scias pri la progreso en Ĉinio (ni esperu, ke tio daŭros!), Kubo, Koreo...sed ĉimomente mi volas direkti vian atenton al Afriko. Mi esperas, ke vi decidus, ke estas vera rolo por ni en la kresko de la movado en tiu kontinento, kaj ke nia agado por helpi la tieajn esperantistojn povos doni pli da vervo al nia propra esperantista vivo.

Lastatempe mi iom korespondis kun Hans Bakker, la sindediĉa kunordiganto de Esperantoagado en Afriko (feliĉe li havas kapablajn kunlaborantojn). Bakker avertas, ke foje "blankaj" esperantistoj spertas elreviĝon en siaj klopodoj helpi afrikanojn; antaŭ ĉio oni estu realisma.

Apenaŭ necesas, laŭ Bakker, ke oni varbu por Esperanto en Afriko. Oni devas nur informi pri la ekzisto de nia lingvo, kaj tuj sin anoncos multaj lernemuloj. Kial? Ĉar milionoj da inteligentaj afrikanoj soifas al kontakto kun la ekstera

mondo kaj eskapo el la malriĉego de la propra situacio. Multaj naive esperas, ke tia "blankula" lingvo alportos karieron, vojaĝojn al Eŭropo, stipendiojn, edzinojn, brakhorloĝojn... Iom ofte, kiam fine ili komprenas, ke Esperanto ne donas tiajn avantaĝojn, ili perdas la intereson.

Mi mem iam faris tian sperton: respondinte korespondpeton de afrikano, mi tuj ricevis leteron kun longa listo de dezirataj donacoj --- kaj sendube alilandaj esperantistoj ricevis la saman liston de la sama homo. Anstataŭ ĝentile klarigi al li mi simple ne respondis. Ĉu mi agis prudente? Mi ne scias, sed mi ja memoras, ke tiu evidente inteligenta viro povis skribi al mi nur pro tio, ke li lernis Esperanton --- kaj pro tio, ke mi sendis al li internaciajn respondkuponojn. Onidire afrikano, kiu ricevas mezan salajron (kaj multaj estas senlaboraj!), ne povas sendi pli ol du aerpoŝtajn leterojn monate. Ĉu ni kondamnu iliajn naivajn esperojn?

Bakker substrekas du aliajn aspektojn: (1) malgraŭ la tro multaj elreviĝoj rapide kreskas la nombro de vere idealismaj esperantistoj en Afriko. Ofte ili estas unuopuloj en iu urbo aŭ vilaĝo, kiuj siavice instruas buŝe (ĉar mankas plejparte libroj) al aliaj, kaj tiel estiĝas nova klubo, kiu perdos multajn sed altiros aliajn idealistojn. Se la movado estus tiom kreskinta en Aŭstralio dum la lastaj kvar-kvin jaroj, kiom en Afriko, ni ĝojegus! (2) La evoluon en Afriko multege helpis grupoj en aliaj landoj, ĉefe en Eŭropo, kaj la eŭropanoj spertis, ke tio ne estas unudirekta strato --- iliaj grupoj ne nur ricevis novan stimulon en sia poresperanta agado, sed tre profitis kulture pro rekta, neŭtral-lingva kontakto kun afrikanoj, pri kiuj oni kutime sciiĝas nur pere de televidaj raportoj pri katastrofoj.

Nu, post tiu longa enkonduko mi fine diru, kial mi skribas ĉi tion. Ni brisbananoj diskutis la eblecojn helpi la movadon en Afriko kaj mem profiti per tio. Hans Bakker (Kastelenstr. 231-11, NL-1082 EG Amsterdam) pretas provizi al vi multajn informojn pri ĝuste tiu temo. Mi resumos liajn proponojn: Varbado tute ne necesas, sed jes instruado al progresintoj (ni devas lasi la instruadon al komencantoj en la manoj de la

lokaj aktivuloj, ĉar tiuj potencialaj esperantistoj simple tro abundas por la fortoj de la tutmonda movado). Do se en via grupo estas homoj, kiuj bone konas la lingvon kaj estas paciencaj, jen nobla tasko; kompreneble estus ideale, se tiuj instruantoj estus mem perfektaj en la lingvo, sed tio ne estas nepre necesa --- grupa diskutado de la gramatikaĵoj en la letero de la afrikano povus esti valora parto de viaj ĉiusemajnaj renkontiĝoj. Eble la koncerna afrikano iom hezitus esti instruata, sed vi povus proponi korespondadon kaj ĝentile promesi helpi pri la gramatiko, se la afrikano tion dezirus.

Pluraj eŭropaj kluboj/asocioj trovis novan metodon helpi al afrikanoj. Same kiel multaj novaj esperantistoj, la afrikanoj (ofte junaj homoj) emas verki en la fascina nova lingvo. Do la klubo de Kista (Svedlando), ekzemple, transprenis la taskon eldoni ORIENTA STELO, la organon de la klubo en Tabora, Tanzanio (en orienta Afriko). La afrikanoj simple sendas siajn verkojn (pere de loka "redaktanto", mi kredas) al Kista, kaj la samideanoj tie financas la presadon kaj distribuadon al Afriko kaj en Svedlando (kaj al la landaj asocioj de la tuta mondo). Imagu la entuziasmon de juna afrikano, sciante ke lia (malofte ŝia) verko atingas legantojn en foraj landoj...

Alia eldona aktivaĵo konsistas en tio, ke grupo(j) en Eŭropo uzas sian organon por publikigi kaj siajn kutimajn artikolojn kaj la kontribuojn de afrikanoj, kaj distribuas en ambaŭ landoj. Povus esti, ke tiaj organoj, kiaj LA VOĈO (la organo de la kvinlanda federaĵo), trovus novan utilon.

Ankoraŭ alia metodo helpi estas ĝemeliĝi kun Afriko. Mi notas, ke la grupo en Helsinki havas tiajn rilatojn kun tri afrikaj landoj. Ĝemelado estas pli intima formo de kunlaboro, kaj ofte oni interŝanĝas donacojn (kasedoj kun afrika muziko laŭdire kaŭzas etajn sensaciojn en Eŭropo pro sia bona kvalito) kaj eĉ vizitojn (kiuj kostas multe al la eŭropanoj, kaj kostus eĉ pli al ni!). UEA foje financas vojaĝojn por afrikanoj al UK-oj (15 al Varsovio) kaj al Esperanto-institutoj en Eŭropo (Rotterdam, Grésillon, La Chaud-de-Fonds, Pisanica, ktp.). Unuopaj "blankaj" esperantistoj vizitis Afrikon kaj ricevis kortuŝan gastigadon.

Eĉ se vi povas fari nenion alian, vi povus sendi al Afriko viajn malnovajn librojn kaj magazinojn, kiuj estas ege dezirataj de homoj nekapablaj aĉeti legaĵojn.

Hans Bakker povas informi vin pri aliaj helpmanieroj, kaj sendube vi mem povos elpensi pluajn. Ni en Brisbano intencas esplori la eblecojn prudente, unuapaŝe proponante modestan helpon al unuopuloj, sed ne forgesante pri pli grandskalaj metodoj (ekz. komuna bulteno). Por financi tian agadon, ni establis fonduson: ĉiusemajne ni kontribuos ion (kutime po \$1) kaj tiel kreskos (relative "sendolore") sumo disponebla al ĉiu membro kunlaboranta en la projekto.

Se vi establas sukcesan kontakton --- aŭ malsukcesan --- bonvolu raportu al Bakker, ĉar tiaj informoj estas gravaj por lia tasko.

Ĉu oni preferus kontakton kun lando, kie la angla estas unu el la oficialaj lingvoj (ĝenerale temas pri elekto inter la angla, la franca, kaj la svahila)? Se jes, oni povus sendi instrumaterialon en la angla. Aliflanke estus risko, ke la korespondado fariĝus almenaŭ parte anglalingva, kio ne estas la celo, ĉu?

Unu lasta afero estas emfazenda. Kompare kun la afrikanoj, ni estas riĉuloj. Ili simple ne povos vivteni kontakton kun ni, se ni ne financos ankaŭ ilian flankon de la korespondado. En ĉiu sendaĵo via estu almenaŭ unu IRK, sed prefere du (necesaj por aerpoŝto). Kaj registru viajn sendaĵojn: ofte okazas, ke "normalaj" leteroj simple ne atingas siajn celojn; sed eĉ leterportistoj komprenas, ke povas esti problemoj por ili, se ili ŝtelas aŭ forĵetas registritajn.

Mi esperas, ke vi serioze pripensos la proponojn en ĉi tiu alvoko: ili eble prezentos al ni rimedon por trarompi la murojn de nia verda geto. Kompreneble Afriko ne estas la sola mondparto, kie nia movado bezonas helpon, kaj povas esti, ke vi preferus helpi subteni la grupojn, kiujn Joachim Werdin vekis al la vivo en Azio. La speciala faceto de la situacio

en Afriko estas, ke la rikolto povus esti grandega, kaj la argumentoj, kiujn ni ripetfoje kaj ofte vane prezentas al aŭstralianoj, eĉ ne necesas tie!

Se vi decidus agi laŭ la supraj proponoj, mi tre volonte informiĝus pri tio, kaj mi povas provizi al vi adresojn de grupoj kaj individuoj en Afriko. Mia adreso estas:

Trevor Steele
7 O'Callaghan Street
Holland Park Qld 4121

Ni, izolitaj en anglalingva lando, povus multe helpi al homoj izolitaj per malriĉeco sed soifaj al kontakto kun la cetera mondo, homoj por kiuj Esperanto estus la memevidenta solvo. Kaj ankaŭ ni povus grandmezure profiti.

Mi finu per la vortoj de unu el la plej aktivaj afrikanoj:
"Esperanto simple ŝanĝis mian vivon." *_*

LA MEDALIONO-TORR

Ĉi tiu ora medaliono kun bildo de D-ro Zamenhof, donaco de Joyce kaj Harry Torr, estas aljuĝata al la instruisto, kiu instruas la plej grandan nombron de novaj studentoj en la dujara periodo inter kongresoj de AEA.

Grupoj, aŭ individuoj, estas petataj proponi kandidatojn al AEA kune kun detaloj. La gajninto ricevos la medalionon dum la 27a Kongreso de AEA en Melburno, Januaro 1990

Kontaktu:

Ray Ross
41 Agnes Street
Sunnybank Qld 4109

LA SCIURO de NEVENA NEDELČEVA

Antaŭ kelkaj tagoj mi vizitis mian amikinson en Sanatorio Iskreo, kiu troviĝas en la sino de nia amata Balkan-montaro.

Kiam mi alvenis la sanatorion, faris al mi impreson, ke la malsanuloj ne promenadas kiel ordinare sur la aleoj inter la florbetoj, ne sidas sur la benkoj interparolante kun siaj gastoj. Eble mi venis tro frue, mi ekpensis, kaj ili kuŝas ankoraŭ en la ĉambroj sur la litoj.

En tiu momento mi vidis flegistinon suprenirantan la ŝtuparon. Mi ekkuris kaj atingis ŝin. Al mia demando, kie estas la malsanuloj, ŝi diris al mi:

"Venu kun mi por vidi kie ili estas. Sed mi petas vin, marŝu silente kaj senbrue."

Post kelkaj minutoj ni eniris en grandan, luman ĉambron, plenan de homoj. Ĉiuj rigardis ion. Mi alproksimiĝis sur la piedfingroj, kaj estis ege surprizita. Sur unu el la litoj kuŝis tute pala viro, kun fermitaj okuloj. Sur la kuseno, ĉe lia kapo, delikata sciuro karesis per sia kapeto liajn fruntojn kaj vangojn. En tiu momento li malfermis siajn dolorplenaĵojn, kaj kiam li vidis la sciuron, sur liaj lipoj aperis rideto. Per sia pala, maldika mano, li tenere karesis la malgrandan gaston, kiu neordinare brave kaj malkaŝe montris sian amikecon.

La pordo malfermiĝis. Eniris kuracisto. Ankaŭ li rigardis surprizite kelkajn momentojn, poste, turniĝante al la malsanuloj, petis, ke ili forlasu la ĉambron.

Mi vidis mian amikinson kaj kun ŝi kaj aliaj malsanuloj ni iris en la ĝardenon de la sanatorio. Ĉiuj parolis pri la neordinara amikeco inter la sciuro kaj la malsanulo.

Mia amikino rakontis al mi, ke la malsanulo estas tute

sola homo. Pro lia longa malsanado iom post iom liaj parencoj kaj amikoj komencis forgesi lin kaj tre malofte lin vizitis. Eble pro tio, eble pro sia plena koro, la malsanulo, promenante en la arbaro, kiu ĉirkaŭas la sanatorion, ĉiutage ĵetis al la sciuroj juglandojn aŭ avelojn.

Li rakontis al mia amikino, ke eble la sciuroj al kutimiĝinte al la konstanta ĉeesto de la homoj promenantaj en la arbaro pli kaj pli kuraĝe venis preni de li la ĵetitajn nuksojn. Sed unu el ili, malgranda kaj delikata sciuro, ĉiutage alproksimiĝis pli kaj pli al li. Estante tre ĝoja, li parolis al ĝi plej tenerajn vortojn kaj fine la sciuro venis tute proksimen kaj permesis al li karesi ĝin. De tiam, la sciuro prenis la juglandojn kaj avelojn de lia mano. Tio plenigis lian koron je granda ĝojo.

Sed ne nur la malsanulo amis la sciuron. Ankaŭ la malgranda koreto de tiu delikata besteto ekamis lin.

Supozeble la sciuro serĉis lin, kaj tra la fenestro, kiu estis malfermita, trovis lin en la lito.

Ĝis mia forveturo de la sanatorio, ĉiuj interparolis pri la neordinara konduto de la sciuro.

Dum mia reveno en Sofion, mi pensis pri tio, kion mi vidis. Mi miris kiel tiu malgranda besteto trovis sian malsanan amikon. Mi ne povas imagi kiel en la koreto de tiu sciuro estas tiom da amo, kiu donis al ĝi kuraĝon, sen timo je la homoj, resti sur la kuseno kaj karesi la frunton kaj la vangojn de la malsanulo.

Por mi estas problemo ĉu la sciuro povas ne nur ami, sed ankaŭ, almenaŭ iomete, pensi?

Kiu povas respondi al tiu demando?

_

[Nevena Nedelĉeva, jam fama pro siaj romanoj bulgarlingvaj, publikigis sian unuan originalan esperantan rakonton, Patrino Koro en 1988.]

PROVU VIAN VORTOSCION

1. Ĉu kin estas
 - (a) arto fari "moviĝantajn" bildojn
 - (b) medikamento kontraŭ malario
 - (c) zoologia nomo por la hundo kutime nomata "dingo"

2. Ĉu ambasado estas
 - (a) sinkaŝinta atakontaro
 - (b) ambasadoro kun ties asististoj
 - (c) bombado ĝis plena nuligo de la atakitaĵo

3. Ĉu asisti estas
 - (a) ĉeesti dramon, filmmontradon, kc.
 - (b) formale akuzi iun pri krimo
 - (c) profesie helpi, ekz. kuraciston, en banko, kc.

4. Ĉu centr estas
 - (a) astronomie: punkto, ĉirkaŭ kiu revoluas astro
 - (b) ĉefoficejo de kompanio
 - (c) centra funkcio

5. Ĉu impeti estas
 - (a) esti ĉiam agema, nehezitema
 - (b) sin ĵeti antaŭen
 - (c) malfaciligi ies iradon

6. Ĉu lapo estas
 - (a) planto, kies fruktaro kroĉiĝas al oniaj vestoj
 - (b) ŝtofpeceto per kiuj iuj tribanoj kaŝas siajn seksilojn
 - (c) la ĉina nomo de la filozofo kiu inaŭguris Taoismon

7. Kiu frazo estas ĝusta? -
 - (a) li biciklis po dekkvin kilometrojn hore
 - (b) li biciklis dekkvin kilometrojn po horo
 - (c) li biciklis po horo dekkvin kilometroj

8. Ĉu kamion estas
 - (a) artaĵo farita per zorga ĉizado de la surfaco de ovo
 - (b) granda ŝarĝaŭto

(c) porvirina japana vesto

9. Ĉu liva* estas
 - (a) malmultepeza
 - (b) maldekstra
 - (c) ne tre kruta
10. Ĉu konvaleski* estas
 - (a) iom post iom resaniĝi
 - (b) kalkuli la probablan orbiton de satelito
 - (c) nomo de nun kondamnita porStalina politikisto
11. Ĉu satiro estas
 - (a) mokpoemo
 - (b) mitologia estaĵo homfigura sed kun bestaj korpopartoj
 - (c) islama nomo de la Diablo
12. Ĉu sarki estas
 - (a) fari ironian rimarkon
 - (b) eltiri misherbojn
 - (c) fosi sub muro por ĝin renversi
13. Ĉu fraĵto* estas
 - (a) ovaro de fiŝoj uzata por fari kaviaron
 - (b) nun arkaika titolo de monako
 - (c) ŝarĝaĵo de varoj en transportilo
14. Ĉu frandi estas
 - (a) ornami la randojn de vestaĵo
 - (b) nomo de la dektria romkatolika papo
 - (c) manĝi nur pro plezuro
15. Ĉu alies* estas
 - (a) vorto signifanta "foje nomanta sin..."
 - (b) apartenanta al alia persono
 - (c) radiko signifanta "malaŭtentik" pp.pretendata antikv-
aĵo

Respondoj sur paĝo 12.

*neoficiala vorto

RESPONDOJ POR "PROVU VIAN VORTOSCION"

1.a; 2.b; 3.c; 4.c; 5.b; 6.a; 7.a; 8.b; 9.b; 10.a; 11.a; 12.b; 13.c; 14.c; 15.b. Ĉiuj vortoj laŭ PIV aŭ PIVSUPLEMENTO. Kompilita de Donald Broadribb. *_*

KONKURSO NUMERO 4

La unuan ĝustan respondon sendis Niĉjo Nicholas. La tri gazetoj estis Malgranda Revuo, red. Stellan Engholm; Norda Prismo, red. Ferenc Szilágyi; kaj La Nica Literatura Revuo, red. Gaston Waringhien.

KONKURSO NUMERO 5

En sia traduko de la Malnova Testamento Zamenhof tradukis la hebrean nomon de Dio (Javeo) per "La Eternulo".

(a) Kial li faris tion?

(b) Kiel oni povas pravigi la specifan tradukon de la nomo per "La Eternulo"?

Respondojn sendu antaŭ la 1 januaro 1990.

Ĉiu persono ĝuste respondinta ambaŭ demandojn ricevos libropremion. *_*

ESPERANTAJ PAROLIGAJ LUDOJ

recenzas MARGARET CHALDECOTT

ESPERANTAJ PAROLIGAJ LUDOJ, de Marjorie Ellyard. 6 vortludoj por 3-10 ludantoj. \$15 ĉe la AEA Libro-Servo.

Marjorie Ellyard estas konata pro siaj multaj kaj diversaj ludoj kiuj fakte estas insidaj instruiloj. Sidantoj en ŝia grupo ĉe somerlernejo aŭ aliloke baldaŭ scias ke la sola uzota lingvo estas la internacia; vi serĉas ion kaŝitan, kaj devas nomi ĝin esperante; vi dankas la donanton esperante; vi proponas ion al serĉanto esperante; kaj ho, ve al la krokodilemaj!

Nun, dank'al aro de ses diversaj ludoj, haveblaj ĉe la AEA Libro-Servo, ni povas sekvi ŝian gvidadon dum ni parigas vortojn. La temoj estas: iloj, ejoj, maloj, fontoj, korpopartoj, kaj kutimaj paroj. Por ĉiu estas la propra sugestita dialogo.

Estas klare ke Marjorie ja multe laboris, elektante kaj parojn kaj ludmetodojn; sed ludantoj sendube faros siajn proprajn ŝanĝojn dum ili ekkonos ĉiun serion.

Kvankam ĉi tiuj ludoj estis elpensitaj por uzo de tri-ĝis-dek personoj, eĉ unuopuloj povus bone utiligi ilin.

Ĉi tiuj kaj eblaj pliaj ludoj, kun aŭ simila aŭ malsimila formato, estus utilaj aldonoj al la posedaĵoj de kluboj aŭ individuoj. *_*

KOMUNA LINGVO POR EŬROPO?

recenzas TREVOR STEELE

EUROPÄISCHE HOCHSPRACHE ODER SPRACHIMPERALISMUS de Richard Schulz. Bleicher Verlag, 1979. 256p.

En 1992 la okcidenteŭropaj landoj unuiĝos politike. Tio estas certe grava evento en la monda historio.

Unu el la problemoj solvotaj estas la lingva. Ĉu oni daŭrigos la ĝisnunan stumbladon kun pluraj lingvoj aŭ ĉu oni adoptos racian solvon, nome Esperanton?

Jen la ĉefa temo de ankoraŭ alia libro de la senfine fekunda maljunulo Rikardo Ŝulco. La traduko de la titolo estas "Eŭropa Komuna Lingvo aŭ Lingva Imperiismo?". La subtitolo estas "pledo por civitana iniciato por sekurigi kulturan pluralecon kaj samrajtecon". Oni memoras, ke tiutempe (1979) aperis en Germanio la multaj "civitanaĵoj", kiuj provizis la bazon de la Verda Partio. Bedaŭrinde la lingva elemento de egaleco ankoraŭ ne ricevis vastan eŝon.

Ŝulco ekzamenas la aktualan situacion en Eŭropo. Ni

ĉiuj scias, ke la angla kaj la franca estas la konkurencaj kandidatoj por la rolo de "imperiisma lingvo" en okcidenta Eŭropo, do estas utile sciigi el tiu ĉi libro, ke la nombre plej grandaj lingvoj tie estas unualoke la germana kaj dualoke la ...itala. La supereco de la planlingvo Esperanto kiel pontlingvo kompare kun la naciaj lingvoj estas konvinke, elokvente kaj multfacete prezentita. Ni ekstereŭropanoj mense anstataŭigu "Eŭropo" per "la mondo".

Unuavide mi trovis la libron tro heterogena. Ŝulco presis diversajn paroladojn, kiuj iom tro foren vagas de la titolo. Sed oni ricevas informojn pri la historio, la literaturo, la gramatiko, afiksoj, vortkonstruado kaj la vortstoko de Esperanto. Lingve talenta leganto post atenta studado jam povus pli-malpli legi Esperanton. Se tio okazus, Ŝulco atingus pli ol nur abstraktan pledon por nia lingvo.

Se vi povas legi germane, jen valora fonto de argumentoj el la vidpunkto de poligloto, kies fervoron por Esperanto ne estigas nekono de la "grandaj" lingvoj. La libro estas ankoraŭ alia produkto de la meritplena germana eldonejo Bleicher, kiu presas ankaŭ en la IL. *_*

LINGVA ANGULO

kontribuis MARCEL LEEREVELD

KREI NOVAJN VORTOJN (LAŬ FUNDAMENT'AJN)

Por traduko aŭ por verkado mi oftete bezonas Esperanto-vorton por nocio por kiu mi ankoraŭ ne konas vorton. Temas ĝenerale pri novaj nocioj sciencaj, teknikaj kaj sociaj, sed ankaŭ pri malnovaĵoj specialismaj. Trovi la plej taŭgan vorton postulas ofte multan tempon. Necesas rezoni en diversajn direktojn, ĝis kontentiga solvo estas trovita. Tion mi faras dum la tago, aŭ, kutime, dum la nokto, sed kiam la problemo estas malfacila, kaj tio ne maloftas, mi rerezonas la proksima(j)n tago(j)n aŭ nokto(j)n aŭ semajnfino(j)n. Estas rimarkinde kiom da tempo tio foruzas. Mi intence ne serĉas la vorton en tradukvortaro aŭ en enciklopedio, ĉar en mia

27th AEA CONGRESS Melbourne, January 1990

Youth Programme:

The Committee is pressing ahead with its plan to offer travel grants to encourage young Esperantists under 25 to come and join us in Esperantoland. A special fund has been opened for the purpose. Ralph Harry heads the list with a donation of \$50 and has promised a further \$50 when we reach \$400.

Members of the Committee are conscious of the urgent need to attract young people to Esperanto, and would like the fund to become a permanent AEA Fund available for future congresses within Australia. Donations to date are:

Ralph Harry	- \$50
Ruth & Gerald Tumman	- \$50
Harry Beechey	- \$50
Svetislav Kanacki	- \$25
Ivy & Jack Fallu	- \$25

All clubs have been contacted for support, and we ask Esperantists who are able to help to send their donation to the Treasurer, Youth Fund, C/o Jack Fallu, 10 Summersett Avenue, South Oakleigh Vic 3167.

T-Shirts and Windcheaters:

T-Shirts and Windcheaters are now available for Christmas presents. The design is a map of the world, encircled by links of a chain, with the words "Esperanto - Linking the World". Lettering is in Esperanto green and colours are white and Olympic gold. (Windcheaters in gold only.) Sizes are: Small (90 cm); medium (100 cm); large (110 cm) (M & L only for the Windcheaters) and prices are: TShirts \$10 and Windcheaters \$20. All are in top quality cotton.

We have already had to re-order some sizes, so be early! Order from Margaret Young, 39 Sesame St, Mt Waverley Vic 3149.

Registration:

St Hilda's College has asked us to let them know the number of members who will be attending the Congress, not later than 12 December 1989, as they will need to make arrangements before the staff go on holidays for the Christmas/New Year break. Intending visitors are kindly asked to register as early as possible before that date.

Members who expect to arrive at the College on Friday 5th are asked to advise arrival times so that we can inform the College accordingly.

SAT, Radio Amateurs, Bah'ai, TEJO:

Provision has been made in the Congress programme for members of SAT, Radio Amateurs, Bah'ai and TEJO to hold a meeting during the period of the Congress. Rooms will be available for this purpose at 10.30 a.m. on Thursday, 11 January.

WINDOW ON THE WORLD Eye on China

Our regular readers will be aware that we have been following developments on the China scene in regard to Esperanto, particularly as reflected in the official monthly EL POPOLA ĈINIO which earlier this year was in the vanguard of promoting reform and human rights. We regret to say that as of the September 1989 issue, EL POPOLA ĈINIO HAS been brought sharply into line with official pronouncements. History has been rewritten and the Tiananmen Square Massacre never took place - which we doubt will be of little consolation to the families of those students who died merely because of their wish to hold a peaceful protest against official corruption and for the establishment of human rights.

TEJO, the world Esperantist youth organisation, has signed a formal protest to the Chinese government, along

with 50 other national and international delegations at the 13th World Student and Youth Festival in Pjongjang.

U. N. A.

The United Nations Association of Australia (U.A. Division) held an Esperanto Seminar on September 2, 1989, at the University of Western Australia. Keith Suter, President, introduced the seminar. Speaking were Dr John Mills, Ms Anne Jeavons, Ms Vera Payne, and Dr Donald Broadribb. The papers were followed by a question and answer period. Four workshops then took place, and reported back to the total gathering. The seminar was well attended. The four papers presented have been published in full in United Nations Outreach, published by the U. N. A. of Western Australia in its October 1989 issue.

The U. N. Association policy reads:

We encourage the teaching of Esperanto. We urge upon Unesco a recommendation that Esperanto teaching be introduced more generally into schools. We ask Australian educational authorities to introduce Esperanto into the syllabuses of Advanced Education and other teacher training colleges. We encourage the Australian Esperanto Association to set up a top level committee of people from different national origins to prepare a plan for WFUNA [World Federations of UN Associations], Unesco etc to bring about the climate of opinion that appreciates the imperative of having a world language, the introduction of such a language in schools of learning throughout the world, and research to determine a suitable world language if Esperanto is found to be inadequate. We recommend that when students begin to learn a foreign or ethnic language they be given an introductory course in a world language.

Copies of the October issue of U.N. Outreach may be

obtained from the United Nations Association of Australia (W.A. Division), Room 5, Trinity Buildings, 671 Hay Street Mall, Perth WA 6000.

74th UNIVERSAL CONGRESS in Brighton, England, 1989

Each year since 1905, except for the war years, a general international Esperanto congress has been held during the summer months of the northern hemisphere, each year in a different city and country. This year's Congress was held in Brighton, England, July 29-August 5, with 2265 participants from 55 countries. Highpoint of the Congress was the presentation in Esperanto of Tennessee William's play "Cat on a hot tin roof" and Alan Ayckbourn's "How others love" enacted by a German and a British theatrical group respectively. Next year's Congress will be held in Havana, Cuba.

NEW VIDEO IN ESPERANTO

Video films in Esperanto are nothing new, but a new musical video film from Belgium can lay claim to being unique. Titled "Kiam Parizo estis Parizo eĉ por ni esperantistoj" ("When Paris was Paris even for us Esperantists"), the film features a romantic stroll through Paris in the springtime, with songs sung by Nicole Pairoux accompanied on an accordion.

ESPERANTO IN FIRST-GRADE

In September a special experimental course for six year olds was begun in Budaörs (near Budapest), Hungary, following the principles of Polgár László (whose three daughters won the chess championships at the Olympic Games 1988). The all-day class program consists of teaching in Hungarian in the morning and Esperanto in the afternoon. One of the two Esperanto teachers is a Polish woman who does not know Hungarian. The guiding principle of the course is "not to learn the language but to live in it".

rezonado mi ne volas, en la komenco, esti influata de la proponoj de aliaj lingvistoj (aŭ de verkistoj).

Mi kompreneble ne kreas neologismon, almenaŭ ne antaŭ ol miaj kaj ĉies neneologismaj proponoj estas studitaj. Facil-anime kreante nenecesajn neologismojn mi kulpus balasti la lingvon tiele ke ĝi fariĝus simila al la por internacia uzo maltaŭgaj etnaj lingvoj ŝanĝe evoluintaj, iĝintaj malregulaj kaj miskomprenigemaj dum siaj historioj. Mi do uzas "Fundament'ecajn" kaj okaze aliajn vortojn oficialajn.

Preskaŭ ĉiam la nova vorto estas vortkombino, kaj sendubas ke mi tiam devas sekvi la senesceptajn regulojn de la Fundament'eca Esperantovortfarado per kunmetado: 1. la precipa senco, la "determinato", staras (tuj) post la aldonita senco, la "determinanto"; 2. inter du elementoj ne troviĝas streketo, nek finaĵo (kiaj "a" aŭ "n"), nek alia litero krom la nenion signifanta kaj nur sondona "o", nek grandlitero; 3. la nova vorto havu unuecan signifon plian ol la simplan adicon de la nocioj de la elementoj (ekz. "vagonaro" estas pli ol "aro de vagonoj"); 4. valoras plejble apliki la "leĝon de neceso kaj sufiĉo".

Por montri la procedon, mi ĉi sekve donas kvin ekzemplojn.

A. Bezoniĝas la traduko por "bottom-line cost efficiency".

Mi decidas ke "cost efficiency" estas la grado de produktkapableco en rilato kun la kosto necesa por iu entrepreno. Mi do povus uzi "kosto", sed por la "efficiency" mi bezonus tri vortelementojn, kune do kvar: "kostproduktkapablecgrado", sed tiu vorto ne komprenatus ĉar ne temas pri "produktado de kosto". Kaj ĉar temas pri kapitalisma funkcio, efektive temas pri grado de profitdono, en rilato kun la kosto. Mi nun elektas "kostrilata profitdoneco"n. Se estas prezo kiu estas bottomline", ĝi estas minimuma, sed se grado de profiteco estas bottomline, ĝi devas esti maksimuma, montrante interesan kontraŭecon dusencecon de la angla esprimo (ĝi vere de devus esti "topline efficiency"). Rezulto: maksimuma ko-

strilata profitdoneco.

En la vortaroj mi trovas nur la neologismon "rendimento" anstataŭ mian "Profitdon(ec)o"n. Mi esperas ke aliu trovos pli bonan solvon ol mian kaj ol la neologismon.

B. Mi bezonas vorton por "roundabout"

Mi kompreneble ne elektas "raŭndabaŭto"n aŭ alian neologismon, nek "ĉirkaŭaĵo"n, nek "vojkrucĉirkaŭo"n kiu povus signifi "ĉirkaŭaĵo aŭ ĉirkaŭvojo ĉirkaŭ vojkruc". Kio ĝi efektive estas? Ĝi estas rondaĵo kiu funkcias kiel vojkruc. Do ĝi precipe estas rondaĵo, sed ĉar la rondirado kaj la ronda formo estas pli gravaj ol la konstruaĵo, mi preferas nomi ĝin "rondo" anstataŭ "rondaĵo" (kaj ankaŭ pro la regulo de neceso kaj sufiĉo). Do mia propono estas "vojkrucrondo". Post tio legante en la vortaroj mi trovas nur "trafikcirklo"n. Nun mi devas decidi kiu estas pli preciza. Por tio mi ankaŭ devas imagi kiu vorto estus pli komprenebla por iu kiu neniam vidis ilin, ekzemple eskimo. Li povus pensi, vidante "trafikcirklo"n, pri rondo aŭ cirklo (ambaŭ vortoj preskaŭ samsignifas) en la maro aŭ en golfo aŭ ĉirkaŭ insulo, en tiuj kazoj la akvotrafiko (kaj eĉ la mona trafiko) rondiras. Pro tio mi preferus "vojkrucrondo"n aŭ "vojkruccirklo"n, spite ke dum samvaloreco preferiĝas elekti la jam uzitan vorton (ĉikaze bazitan laŭvorte sur la esprimo en la latinidaj lingvoj). Mi fine konsultas PIV, ne trovante solvon, ĉar PIV ne havas ilustritan sekcion pri urbopartoj, kaj neniam mencion sub "trafiko" nek sub "rondo" nek sub "cirklo).

C. Mi deziras vorton por "overtake" (ekz. en "My truck is overtaking that small car").

Unue mi certigas min pri la ekzakta signifo de la vorto, se necese informiĝante en anglolingva vortaro aŭ ĉe special-istoj. Mia ago estas "iri preter iranta veturilo (aŭ eĉ persono aŭ besto)". Rekta traduko de la anglaj vortelementoj estas

Ĉi tie maltaŭga, ĉar ne temas pri iri "trans" nek pri "preni" ion. Ĉar mi "iras preter", mi preteriras, aŭ "pasas", sed tiuj ne sufiĉas ĉar ili uzeblas ankaŭ por pasi neirantajn aŭ kontraŭirantajn aĵojn. Mi forte penas sed ne kapablas trovi elementon aldonendan al "pasi" signifantan "iranta en la sama direkto veturilo"n, almenaŭ ne per sufiĉe mallonga vorto radika aŭ kunmetita. Mi plu rezonas: "kion ni ekzakte faras, aŭ kie ni estas en rilato kun la alia veturilo?". Respondo: "mi iras pli rapide pretere por veni antaŭ la alian". Do eble "iri preter antaŭ" aŭ, pli ĝuste, "iri antaŭ preter". Do "preterantaŭiĝi" taŭgas, ĉar mi ne "preteras" post "antaŭi". Sed mi povas "preterantaŭiĝi" ankaŭ antaŭ nemoviĝanta konstruaĵo ktp., ĉar mi povas veturi pasante preter ĝi kaj antaŭ ĝi. Do mi devas serĉi en alia direkto. Por pasi la malgrandan aŭtomobilon, mi devas esti pli rapida, mi devas fari ion pli, mi devas "plii" (komparu "pliigi") en iu rilato. Mi devas samtempe "preteri" kaj "antaŭiĝi" kaj "plii en la irado" aŭ "irplii" aŭ "veturplii". Do mi "irplias preter la aŭto" (sufiĉas) aŭ (nenecesas) "mi irplie preterantaŭiĝas preter ĝi" sufiĉas por traduki la nocion "overtake" kaj ĉar mi ne povis trovi pli mallongan kunmetaĵon sufiĉantan, mi findecidas pri ĝi. Post tio mi rigardas en miaj angla-esperanta-j vortaroj, por vidi kiujn solvojn aliaj lingvistoj trovis; en ĉi tiu kazo, bedaŭrinde, mi ne povas trovi iun taŭgan el la donitaj: atingi, ĝisiĝi, preterveturi, preteratingi, plupasi, devanci, ĉar ili aŭ ne signifas "ion kio moviĝas en la sama direkto" aŭ ili estas neologismoj (fari neologismojn estas la plej malaktiva serĉo: ĉiu kapablas fari kaj faradi ilin facile kaj senfine el naciaj lingvoj). Pro legado de la aliaj proponoj, mi eble, sed ne certe, preferos "mi veturplias preter ĝi" (ne uzebla se temas ekz. pri kuranto) ol "irplias".

Ĉ. Mi bezonas vorton por esprimi la nocion "to park a car".

Mi kompreneble ne elektas "parki" aŭ "parkumi", ĉar la portempa metado de aŭtomobilo ĉe la stratflanko aŭ sur (plej ofte pavimita) tereno havas neniun rilaton al parko, eĉ ne metafore. Do mi kreus neologismon, kies dua krimeto estus ke ĝi estigus unu vorton kun du malsamaj signifoj

(kiel ekz. *"karo" por aŭtomobilo): Esperanto fideblas i.a. ĉar ĝi ne havas tiajn miskomprenigajn vortojn. Do mi rezonas. Kion mi faras kiam mi metas aŭtomobilon en lokon kie ĝi, ĝenerale laŭleĝe, povas esti? Mi ne nur metas ĝin ien, mi metas ĝin portempe ien kie ĝi povas stari kun la motoro nefunkcianta, en ripozo. Jen do du eblecoj: "starigi ĝin" kaj "ripozigi ĝin". Sed starigi ne taŭgas, ĉar tiu ago oftas kiam io aŭ iu kuŝas (ekz. sur sia flanko) aŭ sidas. Do "ripozigi ĝin en ripozlokon en strato aŭ en aŭtomobilripozejo" estus uzbla, kvankam metafore uzita. Kiam mi, ial ajn, iras en la urbcentron, mi tie iras de unu butikoj aŭ oficejoj al alia, sed ankaŭ al restoracio aŭ al parko aŭ al kinejo; tiuj lastaj lokoj estas miaj "restejoj". La samo okazas pri aŭtomobilo: ĝi cirkuladas, kaj kelkfoje restas ie. Do mi "restigas ĝin" en restloko, apud stratflanko aŭ en "aŭtomobilrestejo". Mi pripensas, kaj trovas tiujn vortojn ne malkompreneblaj aŭ miskomprenigaj. Do mi provizore elektas ilin, antaŭ ol konsulti aliajn lingvistojn. En miaj vortaroj mi trovas la Esperantiste neakcepteblan "enparkigi" (escepte se temas pri vera parko aŭ metafora parko kie oni promenas inter arboj kaj aliaj plantoj), "parkometro"n, kiu estas neologismo (ĉar ĝi ne estas metro), "haltadi", kiu ne taŭgas ĉar aludas pri aŭtobushaltejo (kaj krome, oni laŭleĝe devas halti en aliaj lokoj, ekz. antaŭ ruĝa trafiklumo), kaj, en PIV, la neakcepteblan "parki". Kaj ĉar PIV mencias ankaŭ la verbon "restigi", mi kontentas pri la "aŭtomobilrestejo" aŭ "-restloko".

D. Tradukendas "the milkbar next to the op shop".

Mi ne uzas "milkbar"n kvankam, laŭ la enciklopedioj, la aŭstralia "milkbar" estas specialaĵo nesimila al tiuj en aliaj landoj, kie ĝi precipas pri trinkado de nealkoholaĵoj. Pensante pri la precipa uzado de tia loko en Aŭstralio mi konstatas, ke ĝi estas multe pli vendejo de forprenataĵoj ol trinkejo, kaj ke krome la trinkaĵoj estas nur malgranda parto de la vendataĵoj. Karaktereco grava estas ke ĝi malfermitas ĝenerale ĉiun tagon, ankaŭ dimanĉon, kaj vespere, kiam la aliaj butikoj estas fermitaj. Ankaŭ ke la vendataĵoj estas plejparte aferoj kiujn oni aĉetas aŭ bezonas ĉiutage (ĵurnalo, lakto, pano, frandaĵoj, trinkaĵoj, manĝaĵetoj, eĉ iom da

spicistaĵoj kaj legomoj kaj viandaĵoj). Mi do elektas "ĉiutagaĵbutiko". La vortaroj ne donas tradukon, kaj "laktobufedo" ne taŭgas. Por "next to" la vortaroj ĉiam proponas "apud", sed mi opinias ke la du butikoj ne simple apudas, sed ke ili situas unu ĉe la flanko de la alia (kontraŭe al ĉe la antaŭo aŭ ĉe la malantaŭo), do "(ĉe)flanke de". Por "op shop" mi bezonas multan tempon por trovi ion, kaj eble ne sukcesinte. Do mi esperas alies solvon. Se mi estus senenergia, malpenema, animfacila, Esperantaĉema, pri Esperanto malserioza Esperantisto, mi tuj elektus la vorton "opŝopo" (kaj ĝi sonas bele ankaŭ!), same kiel oni kreas la neologismojn "spekti", "povra", kaj "futbalo" (kaj centojn da aliaj: kompatinda Esperanto!), vortoj por kiuj estas haveblaj klaraj Esperantaĵoj. Mia unua penso temis pri "oportunbutiko". Sed oportuna por kiu? Se por la aĉetanto, ekzistas multaj aliaj butikoj kiuj kunrajte deklarus vendi oportune. Se por la vendisto, nu, preskaŭ ĉiu vendisto vendas oportune, kun la celo havi bonajn ŝancojn en la vendado. Do mi bezonas detale priskribi en mia menso la karakteron de la "op shop". La precipa eco estas ke ĝi apartenas al, kaj produktas financon por, bonfarema societo, plejofte eklezia. Do "bonfarbutiko"? Ĉu eskimo komprenus ke ne temas pri butiko kiu vendas por bonfari nur al la aĉetantoj? Krome, ĝi ĝenerale vendas nenovajn ("duamanaj" povus signifi ke ili vendatas tra (pere de) dua kompanio) artiklojn, do nenovaĵojn, kaj ĝi ĝenerale ricevas ilin senpage (tre oportune!), tial povante vendi ilin tre malmultekoste (tre oportune por la aĉetantoj!) Tamen oni ne povas diri ke la aĉetantoj ĝenerale estas malriĉuloj (kvankam tio devus esti la kazo). Ke la butiko ricevas la artiklojn senpage, mi ne trovas sufiĉe grave por esprimi tion, kaj cetere esprimeble malfacilege en unu vorto. La precipaĵoj estas ke temas pri nenovaĵoj kaj ke profitas bonfara societo. Se ĉiuj eskimoj devas kompreni mian esprimon (kaj ĉu tio ne estas la celo de Esperanto?), mi devas uzi "filantropisocieta nenovaĵbutiko" ("societa", por ke oni ne pensu ke ĝi estas bonfara al la aĉetantoj). En literaturaĵo mi uzus tiun longan esprimon la unuan fojon kaj poste la mallongan "butiko filantropia", kiun mi uzus ekskluzive por aŭstralia, eŭropa kaj amerika legantaroj, ankaŭ ĉar la nenoveco aŭ noveco de la varoj ne tre gravas. *_*

NEKROLOGO

NOEL FREDERICK GAMBLE

raportas RALPH HARRY

Noel Gamble, iama Prezidanto de la Kanbera Esperanto-Klubo kaj aktivulo en la Aŭstralia Esperanto-Asocio, mortis dum dormo en Austinmer, NSW, la 7an de septembro. Li postlasis sian edzinon, Betty, kaj du infanojn, al kiuj ni sendis kondolencon.

Noel Frederick Gamble naskiĝis en Melburno la 11an de oktobro, 1917. Lia patro, J.F. Gamble estis leĝprojektisto por la parlamento. En 1927, kiam la Parlamento stariĝis en Kanbero la familio tien moviĝis kaj Noel estis lernanto en la Gimnazio de Telopea Park. Tie li studis la latinan kaj la francan kaj ankaŭ la aŭstralian literaturon, kun Dymphna Cusack kiel instruisto. Li ludis futbalon kaj tenison kaj ŝatis la naĝadon.

Li fariĝis oficisto en la Departemento de la Ĉefministro, poste en la Oficejo de la Ministro de Justeco. Li studis la juron en la Universitata Kolegio de Kanbero kaj la komercon en la Universitato de Melburno, kie li ricevis la diplomon B.Com.

En 1952 li lernis pri Esperanto per prelego, kiun mi faris en Rotaria Klubo kaj komencis la lernadon en klaso de Harry Torr. Li estis bona organizanto kaj dank'al liaj klopodoj la Kanbera Klubo havis bonajn rilatojn kun la Bonnajbara Konsilio en kies kunveno la Klubo havis ekspozicion kaj kunvenojn. Li estis motoro de la Kongreso de AEA en Kanbero en 1956.

Noel estis redaktoro de KEK KURIERO dum multaj jaroj. Li ankaŭ stimulis agadon de AEA sur la kampo de informado. Li mem sukcesis konatigi la Kanberan Klubon per bona publiko.

La plej ambicia projekto pri kiu Noel sin okupis estis

la eldono de volumo de aŭstralia literaturo en Esperanto. Lia laboro ne perdiĝis, ĉar ĝi estis unu etapo en la preparado de AŬSTRALIA ANTOLOGIO.

Noel havis aliajn interesojn, ekzemple la reformon de literumado de la angla lingvo, kaj la historion de sia familio. Sed eĉ post sia emeritiĝo pro malsano en 1972 li daŭrigis sian laboron por Esperanto en Kanbero, Yeppoon kaj Sidnejo. La libroj, kiujn li kolektis kaj transdonis al la biblioteko de AEA memorigos la legantojn pri lia amo al la esperanta kulturo. *-*

ESPERANTO EN RADIO 3ZZZ 92.3 FM

laŭ raporto de SVETISLAV KANAĈKI

Al Melburno venis nia AEA-membro Max Wearing, kiu dum la pasintaj 3-4 monatoj vojaĝadis tra la mondo vizitante esperantistojn kaj Esperanto-eventojn.

Mi tuj ekpensis ke jen oportuno intervjui Max por nia radioprogramo. Ni renkontis problemon, studio 2 estis duoble rezervita kaj ni devos fari nur 15-minutan intervjuon kun iom da konfuzo! Feliĉige nia vietnama amiko Toni Lee donis al ni parton de sia programo, tiel ke ni disponis pri 15 minutoj pli ol anticipite. Nia programo estis "viva" la unuan fojon kaj sen preparo! Sed la aŭskultantoj tre favore reagis.

Nia radiostacio komencas "Radiothon", petante aŭskultantojn donaci por helpi financi la perradian dissendadon. La direktoro diris al mi "Se vi kolektos \$200 mi donos al unu horon." Ni prezentis al li liston de donacantoj, kaj ricevis unu horon da radiodissendado lunde la 23an de oktobro.

Nun mi invitas esperantistojn kiuj venos por la kongreso anonci sin antaŭe se ili povos dediĉi iom da tempo por prepari paroladojn surbendigotajn por estontaj programoj en 1990. Ni ankaŭ bonvenigos interjvuojn. Espereble ni ankaŭ povos disponi pri iom pli da radiotempo dum la kongressemajno.

ANKORAŬ JUNULAR-FONDUSO

raportas NIĈJO NICHOLAS

Ĉar la L.K.K. de la venonta Aŭstralia Esperanto-Kongreso opinias, ke estas esence ne nur varbi gejunulojn en la movadon, sed ankaŭ ilin reteni, ĝi organizas fonduson por ebligi al gejunuloj sub la aĝo de 25 jaroj alveturon kaj loĝadon ĉe la kongreso. La celo estas subvencii kvar-kvin gejunulojn per monsumo ĝis \$250. Ni kuraĝigas ĉiujn ĉi-landajn Esperanto-klubojn kaj -individojn subteni ĉi tiun projekton, niaopinie gravegan por la plua ekzistado de la movado. Espereble ĉi tiu fonduso fariĝos post la AEA kongreso daŭranta stipendio. Ĉi-rilatajn demandojn kaj/aŭ mondonacojn sendu al la Sekretario de la L.K.K., c/o 124 Croydon Road, Croydon Vic 3136.

La junulara parto de la kongreso enhavos multe da diskutoj, iom da ludado per komputiloj (inkluzive de la Esperanto-kurso recenzita en la julia numero), eventuale ankaŭ lingvajn diskutetojn. Prienthavajn proponojn bonvenigas la ĉifaka organizanto, Niĉjo Nicholas, 17 Renowden St, Cheltenham Vic 3192. *_*

KONGRESAĴOJ

Tria listo de aliĝintoj

- | | |
|------------------------|-----------------------|
| 59. R. Dunbar (NSW) | 60. V. Payne (WA) |
| 61. B. Menary (SA) | 62. C. Sullivan (Qld) |
| 63. M. Leereveld (Vic) | 64. M. Maxwell (Vic) |
| 65. M. Ellyard (ACT) | 66. M Ross (NSW) |
| 67. E. Chick (Vic) | 68. M. Melton (UK) |
| 69. B. Loh (NSW) | |

Sume: Vic 32; NSW 13; Qld 12; SA 3; Tas 2; WA 2; ACT 2; PNG 1; Usono 1; UK 1.

St Hilda's College petis nin, ke ni sciigu al ili plej malfrue la 12an de decembro 1989 la nombron da partoprenontoj en la Kongreso. Do bonvolu registri vin kiel eble plej baldaŭ.

"SKVIZO" de RALPH HARRY

En sia recenzo de NePIVaj Vortoj (en la septembra numero) Alan Towsey senkulpigis la kompilinton, kiu lasis "skvizo"n sen difino.

Mi ne estas basbala spertulo, sed mi dediĉis konsiderindan parton de mia vivo al la evoluigo de la terminaro de Esperanto rilatanta al la sporto. Estas grave, ke ni havu ĉiujn necesajn radikojn por partopreni, spirite se ne korpe, en la ĉefaj sportspecoj. Tial la termino por "squeeze play" estas serioza problemo - ĉar "squeeze play" estas grava parto de basbalo.

Webster's New World Dictionary (Second College Edition) donas la sekvantan difinon:

A play in which the batter tries to bunt so that a runner on third base, starting to run at the pitcher's first pitching motion may have a chance to score.

(Ludero en kiu la batanto penas bateti tiel ke kuranto sur la tria bazo, komencante kuri je la unua ĵetmovo de la ĵetanto, eble havos ŝancon poenti.)

Eble oni povus trovi terminon, uzante ekzistantajn radikojn, por esprimi tiun ideon, sed mi kredas, ke la esperantisto, kiu enkondukis la neologismon "skviz" estas pardonebla.

Mi havis la saman problemon, kiam mi kompilis la terminaron de briĝo, ludo en kiu ankaŭ estas "squeeze play". Mi notis, ke por la vorto "squeeze" briĝludantoj en Francio diras "un squeeze"! , en Germanio "Abwurfzwang" aŭ "Zwangsposition", en la itala "la compressione", en la hispana "compresión", en la nederlanda "de dwangpositie". Mi proponis por Esperanto "stringi/o", kiun mi difinis (termino 131): "daŭre kaptadi trekojn ĝis la kontraŭulo devas forĵeti karton, kiu

superas karton en la mano de la deklarinto, kaj per kiu konsekvence li tiam povas gajni trekon". Webster's havas malpli longan difinon: "squeeze play Bridge any play that forces an opponent to discard a potentially winning card".

Eble en la venonta eldono de "Brigo: 5-lingva terminaro" mi devas pripensi la meritojn de "skviz". *_*

[Noto de la redaktoro: PIV difinas "string/i" per "Forte ĉirkaŭpremi, ĉirkaŭstreĉi". La apliko de tiu vorto al brigo ŝajnas pravigebla metafora etendo de tiu difino al la kartludo. Por la basbala terminaro la afero estas malpli simpla, ĉar la esenco de la ago estas tre malsimila al tiu en brigo, nome, temas pri trompcela ago de la batanto por ebligi ke la kuranto sur la tria bazo "ŝtelu" la "hejmbazon". La naciaj esprimoj ne donas akceptindan alternativon por anstataŭi la usonan terminon. (Temas pri speciala formo de trompbatado.) Pro tio, kaj ĉar basbalo ja estas la nacia sporto usona, ŝajnas al mi (eksusonano!) ke la usona termino "skvizi" estas uzinda.]

EUROKKA ESPERANTO-ROK-ASOCIO

En la anglalingva suplemento de nia maja numero ni atentigis pri la franca rokmuzika grupo kies esperanta fako perradie dissendas ĉiusemajne. Eurokka produktas nun disketon kiu aperos komence de 1990, kun muziko de du Esperanto-rokbandoj: "AMPLIFIKI" (jam fama inter esperantistoj) kaj "LA ROZMARIAJ BEBOJ", tute nova Esperanto-Rokbando el Tuluzo, kies kantisto uzas la pseŭdonimon "La Fuĝinto el Alkatraz".

La nova rokdisketo estas antaŭmendebla je rabato. La prezo, inkl. poŝtkostojn, estas 36.50 francaj frankoj (= proks. A\$7.50), pagebla per internacia ĉeko aŭ poŝtmandato. Mendu de

EUROKKA Esperanto-Rok-Asocio
F-31450 Donneville
FRANCIO

NOVAJ LIBROJ

Lastatempe la Libro-Servo de AEA enstokigis la sekvantajn librojn. AEA-membroj rajtas ricevi 5% rabaton. La poŝtkosto estas kutime \$2.50 por sendaĵo, negrave ĉu por unu, ĉu por pluraj verkoj.

- 98. Antikvaj Filozofoj de Ĉinio, de Hou Ĝjueljang. 224p. \$4.60.
- 751. Bovisto kaj Tekstistino. (Ĉina folkloro.) 56p. \$1.90
- 8. Falsaj Amikoj en Esperanto, de Bernard/Ribot. (Leksikologio, franclingvaj klarigoj). 40p. \$3.75
- 172. Fundamento de Esperanto. (Nova eldono.) 335p. \$6.30
- 093. Kamelo Ŝangzi, de Laù Ŝe. (Bele verkita biografia romano). 320p, bindita. \$9.00
- 612. Karnavaletoj. (LP-disko.) \$19.00
- 319. Marta. Tr. Zamenhof. (Klasika verko reeldonita.) 213p. bindita. \$14.20
- 398. Per Mia Nura Vol'. (Kantkasedo, kun libreto.) \$16.00
- 051. Tra l' Mondo, de Tzaut/Oliver. (LP-disko.) \$19.00

Mendojn sendu al: Libro-Servo de AEA, P O Box 230, Matraville NSW 2036.



JUVELO DE LA JARO



via redaktoro rekomendas

KURIOZAJ FLOROJ KAJ ARBOJ, de Zhang Qitai, Feng Zhizhou kaj Yang Zenghong, tr. Seimin. Bejĝingo: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 146 kolorplenaj paĝoj. Bindita. \$32.90. (Speciale mendenda, de la AEA Libro-Servo.)

Kiel kristnask-donaco, donaco pro naskiĝtago, aŭ nur pro amo (al iu alia, aŭ...al vi mem!), unika libro prezentanta artkvalitajn fotojn de arboj kaj floroj kun esencaj botanikaj komentoj, kaj mallongaj enkondukoj antaŭ ĉiu sekcio de la libro. Gemo por ĉiu, kiu amas belecon.

PASPORTA SERVO

informas MAX WEARING

Ĉu vi deziras disponigi senpagan loĝadon dum almenaŭ du noktoj al esperantistoj vizitantaj vian urbon aŭ distrikton? Ĉu vi deziras akcepti tian proponon de aliaj esperantistoj dum vi vojaĝas? Se jes, eble vi volas konsideri partoprenon en la PASPORTA SERVO.

En 1989 la PASPORTA SERVO listigis 904 gastigantojn en 53 landoj. Nur 6 estis en Aŭstralio (neniu en QLD, TAS, ACT kaj NT), dum en kelkaj landoj estis preskaŭ 100. Partopreno en la Servo donas al vi inspiron sperton de parolado en Esperanto kaj oportunon plivigligi la socian vivon de via loka klubo.

PASPORTA SERVO ofertas eblojn de senpaga gastado por siaj membroj. Ĉiu, kiu posedas propran ekzempleron de la listo de gastigantoj estas membro kaj rajtas uzi sian liston por trovi gastiĝon.

Ekzistas du manieroj por membriĝi:

1. Oni aĉetas liston de gastigantoj. Nova listo estas eldonata ĉiujare, sed ĉiu listo validas du jarojn.

2. Oni fariĝas gastiganto. Ĉiu, kiu mem aperas en la listo kiel gastiganto senpage ricevas ekzempleron kaj tiel fariĝas membro. Gastiganto devas ĉiujare re-aliiĝi por resti en la listo. En la fino de ĉiu jaro gastiganto ricevas responduilon, per kiu eblas realiĝi aŭ malaliiĝi.

Por aliiĝi al PASPORTA SERVO de TEJO kiel gastiganto, plenigu la ĉi-sekvan kuponon kaj sendu ĝin antaŭ la 31 decembro 1989 al: Pasporta Servo, Folkungagatan 126, S-116 30 Stoc-kholm, Svedio.

SKRIBU PLEJEBLE KLARE!

 Lando _____

Urbo (loĝurbo aŭ proksima urbo) _____

La urbo situas km norde/sude/okcidente/oriente de _____

Familia nomo _____

Persona nomo _____

Mi estas: Viro/Virino (substreku!) Naskiĝjaro _____

Adreso (kun poŝtkodo) NACILINGVE - NE ESPERANTIGU!

 Telefonnumero _____

Mi ofertas senpagan gastigon al Esperanto-parolantoj laŭ la jenaj kondiĉoj:

Nombro da gastoj _____ Nombro da tagoj _____

Necesas: skriba peto / telefona peto / nenia antaŭa anonco

Aliaj kondiĉoj aŭ precizigoj: _____

 Dato _____ Subskribo _____